

george orwell

la bestia-farmo

george orwell

la bestia-farmo

George Orwell: LA BESTO-FARMO

El la angla tradukis: Gerald Tucker

GEORGE ORWELL

LA BESTO-FARMO

**Eldonentrepreno LANTERNO
Munkeno, 1970.**

Esperantlingva eldono de la eldonetrepreno
LANTERNO

D – 8000 München 25, Postfach 473

Presejo „Iskra“, D – 8000 München 90, Ohlmüllerstr. 16

ENKONDUKO por la esperantlingva eldono

POST FAMA Jonathan Swift (li vivis en la XVII-a jarc.) la angla literaturo, kvankam riĉa je humoristoj kiel apenaŭ iu alia eŭropa literaturo, ne havis pli grandan, pli profundan kaj pli senpardonan satirverkiston ol George Orwell (1903–1950). Lia majstro-verko, „La Besto-Farmo“, simile kiel tiu de Swift „(En la Lando de Intelligentaj Ĉevaloj)“, prezentas, priridas kaj frapas la homan socion en spegulo de: porkoj, ĉevaloj, bovoj, kokoj, katoj, hundoj, azenoj kaj ceteraj. Dum sia junaĝo Orwell estis komunisto. Kiel multaj idealistaj intelektuloj, li atendis, ke la komunismo progresigos la homan socion, alportante antaŭ ĉio socialan justecon kaj sukcesigante la homojn vivi pli humane, pli noble, pli bele ol tio estis la kazo tra jarcentoj, jarmiloj. Sed simile kiel multegaj aliaj, ankaŭ Orwell seniluziiĝis. Ĉiuj promesoj de la komunista revolucio pretertrafis la celon;

sub la komunistaj sistemo kaj reĝimo la homo fariĝis ververa sklavo kaj degradiĝis al la nivelo de bestoj. Tion per klasika ekzemplo pruvis Sovetunio, la citadelo de l' komunismo. Ĝin havis antaŭ siaj okuloj Orwell, skribinte antaŭ kvarona jarcento sian „Besto-Farmon“.

Kiam „La Besto-Farmo“ aperis, ĝi vekis sensacion en la mondo kaj fariĝis baldaŭa furor-verko, tradukata en plurajn mondlingvojn. Neniu sociologia studo aŭ analizo tiel plastike kaj samtempe sprite pentris la komunistan socion kaj ĝiajn funkciulojn, kiuj en tio sukcesis ĉi-libro. En diversaj bestoj Orwell verfidele prezentis komunistajn diktatorojn, iliajn plej proksimajn kunlaborantojn, ideologojn, fakulojn, ekzekutistojn kaj ceterajn el la arsenalo. La bestoj de Orwell sidas en preskaŭ ĉiuj komitatoj de la kompartioj, komunistaj registaroj, ŝajnparlamentoj, pseŭdodemokratiaj-institucioj kaj t. n. popol-organizaĵoj.

Hodiaŭ „La Besto-Farmo“ multe pli aktualas, ol antaŭ 25 jaroj, kiam Orwell skribis ĝin. Dum la lastaj du kaj duono da jardekoj la komunistaj reĝimoj tute deformiĝis, ili komplete fiaskis sur la kampoj: idea, ekonomia, socia kaj ĝeneral-politika. En la komunistaj landoj hodiaŭ fakte ĉio eventas kiel sur „La Besto-Farmo“ de Orwell. La gvidantoj grasiĝis kiel porkoj – dum la proletaro malsatas. Ĉiuj planoj montriĝis utopioj: Anstataŭ „surtera paradizo“ la komunistaj reĝimoj efektivigis surteran inferon, ĉar la homoj ne nur malposedas liberecon, sed ofte eĉ la plej bagatelajn bezonaĵojn. Intrigoj, disputoj, imputadoj, envio, reciprokaĵ kulpigadoj, „purigadoj“ – precize kiel en la „Besto-Farmo“ – ĉio ĉi hodiaŭ plene konfirmiĝas en la komunista socio. La eventoj 1968 k. 1969 okazintaj en Ĉeĥoslovakio, konfliktoj inter Moskvo kaj ĝiaj fidelaj satelitoj unuflanke, Prago aliflanke, malkaŝas antaŭ ni George Orwell granda viziulo, lian verkon „La Besto-Farmo“ – vera antaŭdiraĵo.

Eldonentreveno LANTERNO

SINJORO JONAIIDO, de Nobeldoma Farmo, estis ŝlosinta la kokinejojn por la nokto, sed li estis tiel ebria, ke li forgesis fermi la kok-truojn. La lum-ringo de lia manlanterno danĉis de flanko al flanko dum li stumble transiris la korton; ĉe la malantaŭa pordo deskuante la botojn, li elkranis lastan glason da biero el la barelo, kiu staris en la lavejo, kaj supreniris por enlitiĝi, kie ŝinorino Jonaido jam ronkis.

Tuj post la estingiĝo de la lumo en la dormoĉambro, estis ekmovado en ĉiuj remizoj. La tutan tagon estis cirkulinta onidiro pri tio, ke Olda Majoro, la premiongajninta mezblanka virporko, dum la pasinta nokto songis strangan songon, kaj ke li deziras ĝin komuniki al ĉiuj. Estis interkonsentite, ke ĉiuj venu tuj kiam Jonaido estos sekure for. Olda Majoro (tiel oni ĉiam lin nomis, kvankam lia ekspozicinomo estis Belulo de Vilindono) estis tiel altestimata, ke ĉiu estis preta oferi unu horon da dormo por aŭdi tion, kion li diros.

Je unu fino de la granda fojnejo, sur ia levita platformo, Majoro estis jam aranĝinta sin sur sia pajla lito sub lanterno pendanta sur trabo. Li estis dekdu-jaraĝa kaj lastatempe iom korpulentema, sed tamen porko de majesta, saĝa kaj bonvola aspekto, malgraŭ la fakto, ke liaj dentegoj neniam estis pritrancitaj. Postnelonge la aliaj bestoj komencis alveni kaj komfortiĝi laŭ siaj diversaj manieroj. Kiel unuaj venis tri gehundoj: Viola, Jesinjo kaj Grifo, kaj post ili la porkoj, sidiĝantaj sur la pajlo antaŭ la platformo. La kokinoj birdsidiĝis sur la fenestrojloj, la kolomboj flugetis supren sur la trabojn, la ŝafoj kaj bovinoj kuŝiĝis malantaŭ la porkoj kaj ekmaĉis sian remaĉaĵon. La du ĉar-ĉevaloj, Boksulo kaj Trifolia, eniris kune, ir-

ante malrapidege, kaj metante la harkovritajn hufegojn singardeme pro tio, ke iu besteto povus esti kaŝita en la paŝto. Trifolia estis korpulenta patrineca ĉevalino proksimiĝanta al la mezo de sia vivo, kiu depost la nasko de sia kvara ido neniam tute reakiris sian junecan figuron. Boksulo estis giganta besto, preskaŭ dekok manojn alta, kaj tiel forta, kiel iuj ajn du ordinaraĵ ĉevaloj. Blanka strio laŭlonge de lia nazego donis al li iomete stultan aspekton, kaj li efektive ne posedis unuarangan intelekton, sed estis pro sia konstanteco de karaktero kaj kolosa laborkapablo de ĉiuj respektata. Post la geĉevaloj venis Muriela, la blanka kaprino, kaj Benjameno, la azeno. Benjameno estis la plej maljuna besto de la farmo, kaj la plej malbonhumora. Li maloftege parolis, kaj se entute, tiam nur por diri ion cinikan – ekzemple, li diris, ke Dio donis al li voston por teni la muŝojn for, sed li preferus havi nek voston nek muŝojn. Li sola inter ĉiuj bestoj neniam ridis. Se oni demandis kial, li respondis, ke li observis nenion ridindan. Tamen, kvankam li neniam malkaŝe konfesus tion, li admiregis Boksulon; tiuj ambaŭ kutime pasigadis siajn dimanĉojn kune en la malgranda rajdejo malantaŭ la fruktarbareto, paŝtiĝante unu apud la alia, neniam parolante.

La du geĉevaloj estis ĵus kuŝiĝintaj, kiam aro da anasidetoj, perdintaj sian patrinon, eniris en vico la fojnejon, pepetantaj kaj vagadantaj de flanko al flanko, serĉante iun lokon, kie ili ne estus distretataj. Trifolia faris kvazaŭ-mureton ĉirkaŭ ili per sia granda antaŭgambo, kaj la anasidetoj ennestiĝis tie kaj akurate ekdormis. En la plej lasta minuto Manjo, la stulteta, sed bela, blanka ĉevalino, kiu tiradis la malgrandan ĉaron de ŝinjoro Jonaïdo, delikate entrotis, maĉante pecon da sukero. Ŝi prenis sidlokon en la antaŭo kaj komencis flirtigadi siajn blankajn kolharojn, esperante tiri atenton al la ruĝaj rubendetoj interplektitaj en ili. La plej

lasta eniris la kokino, kiu elserĉis al si, kiel ĉiam, la plej varman lokon, finfine enprenante sin inter Boksulo kaj Trifolio; tie ŝi ŝpinadis kontente dum la tuta parolado de Majoro, aŭskultante eĉ ne unu vorton.

Ĉiuj bestoj nun ĉeestis, escepte de Moseo, la malsovaĝa korvo, kiu dormis sur birdsidejo post la malantaŭa pordo. Majoro, vidante ke ĉiuj komfortiĝis kaj scivole atendas, tusetis, kaj ekparolis:

„Gekamaradoj, vi jam aŭdis pri la stranga sonĝo kiun mi pasintnokte sonĝis. Sed poste mi pritraktos la sonĝon. Unue mi havas ion alian por diri. Mi ne kredas, gekamaradoj, ke mi longtempe plu estos inter vi, kaj antaŭ ol mi mortos, mi sentas, ke estas mia devo transdoni al vi la modestan saĝon, kiun mi akiris. Mi vivis longan vivon; mi havis multe da tempo por pensado, kuŝante sola en mia stalo, kaj mi opinias, ke mi tiel bone, kiel iu ajn besto vivanta, scias la naturon de la vivo. Guste pri tio ĉi mi nun volas paroli al vi.

„Nu, gekamaradoj, kia do estas la naturo de tiu ĉi nia vivo? Ni rigardu ĝin vizaĝ-al-vizaĝe: nia vivo estas mizera, laborplena, kaj kurta. Ni naskiĝas, ni ricevas sufiĉe da nutraĵo nur por daŭrigi la respiradon, kaj kiam nia utileco finiĝas, nin buĉas per terura krueleco la homoj. Neniu besto en Anglio post sia unua vivojaro scias la signifon de feliĉo nek de libertempo. Neniu besto en Anglio estas libera. La vivo de besto estas mizero kaj sklaveco: jen la klara vero.

„Sed ĉu ĉi tio simple estas parto de la ordo de la naturo? Ĉu tiu ĉi nia lando estas tiel malriĉa, ke ĝi ne povas doni al siaj loĝantoj decan vivon? Ne, gekamaradoj, milfoje ne! La humo de Anglio estas fekunda, ĝia klimato estas oportuna, ĝi kapablas doni nutraĵojn abundajn al ege pli granda nombro da bestoj ol ĝi nuntempe estas. Nia eta farmo mem sufiĉas por dekduo da ĉevaloj, dudeko da bovinoj, centoj da ŝafoj – ĉiuj vivantaj en komforto kaj digno kiuj trans-

iras nian imag-kapablon. Kial ni do daŭrigas en tiu ĉi mizera farto? Pro tio ke preskaŭ ĉia tutan produktaron de nia laborado ŝtelas de ni la homoj. Jen, gekamaradoj, la kialo de ĉiuj niaj problemoj. Ili sumiĝas en unu vorto – Homo. Homo estas nia sola vera malamiko. Forigu Homon, kaj la radika kaŭzo de malsato kaj trolaborado estos por ĉiam abolita.

„Homo estas la sola kreito kiu konsumas, mem ne produktante. Li ne donas lakton nek ovojn, li estas tro malforta por tiri plugilon, li ne kapablas sufiĉe rapide kuri por kapti kuniklojn. Tamen li estas dominanto super ĉiuj bestoj. Li laborigadas ilin, li redonas al ili la nudan minimumon, kiu fortigas la malsaton, kaj la reston li retenas por si mem. Nia laboro kultivaĵas la humon, nia sterko fekundigas ĝin, kaj tamen neniu el ni posedas ion ajn krom sia nuda haŭto. Vi bovinoj, kiujn mi vidas antaŭ mi: kiom da galonoj da lakto vi donis dum la ĵus pasinta jaro? Kaj kio okazadis kun tiu lakto, kiu devus esti uzata por kreskigi fortajn bovidojn? Ĉiu guto malaperis en la gorĝoj de niaj malamikoj. Kaj vi kokinoj, kiom da ovoj vi metis pasintjare, kaj el kiom da tiuj ovoj iam elkoviĝis kokidoj? La aliaj estis venditaj por enspezigi monon por Jonaido kaj liaj homoj. Kaj vi, Trifolia, kie estas tiuj kvar ĉevalidoj, kiujn vi naskis, kiuj devus esti la helpo kaj plezuro de via maljuneco? Ĉiu estas vendita en la unua vivojaro – vi neniam plu vidos iun ajn el ili. Rekompence por viaj kvar gravedecoj kaj por via tuta laborado sur la kampoj, kion vi iam ajn ricevis krom minimumaj porciumoj kaj stalo?

„Kaj eĉ ne estas permesate al ni, ke la mizera vivo, kiun ni vivas, atingu sian naturan longecon. Pro mi mem mi ne grumbblas, ĉar mi estas unu el la feliĉaj. Mi estas dekdu-jara kaj naskis pli ol kvarcent idojn. Tia estas la natura vivo de porko. Sed neniu besto en la fino eskapas la kruelan tranĉilon. Vi junaj porkidoj, sidantaj

apud mi: ĉiu el vi estos forkriaĉanta sian vivon ĉe la buĉisto antaŭ la fino de unu jaro. Al tiu hororo ni ĉiuj devas veni – bovinoj, porkoj, kokinoj, ŝafoj – ĉiuj! Eĉ ĉevalojn kaj hundojn ne atendas pli bona sorto. Vi, Boksulo, je tiu sama tago kiam viaj fortaj muskoloj ekperdos sian potencon, Jonaĉo vin vendos al ĉevalmortigisto, kiu tranĉos vian gorĝon kaj disboligos vin por la ĉas-hundoj. Koncerne la hundojn: kiam ili maljuniĝas kaj perdas la dentojn, Jonaĉo ligas brikon al ilia koto kaj dronigas ilin en la plej proksima lageto.

„Ĉu do ne estas tute klare, gekamaradoj, ke ĉiuj malbonoj de nia vivo originas en la tiraneco de la homoj? Nur forigu Homon, kaj la produktoj de nia laborado estus niaj propraj. Preskaŭ en unu tago ni riĉiĝus kaj liberiĝus. Kion ni devas do fari? Nu, laboradi ja, tage kaj nokte, korpe kaj spirite, por la faligo de la homaro! Jen mia mesaĝo al vi, gekamaradoj: Revolucio! Mi ne scias, kiam okazos tiu Revolucio – eble post unu semajno, eble post cent jaroj, sed mi scias, tiel certe kiel mi vidas tiun ĉi pajlon, sur kiu mi staras, ke ĉu baldaŭ aŭ ĉu pli poste, justeco estos atingita. Fiksu vian rigardon al tio, gekamaradoj, dum la mallonga resto de via vivo! Kaj antaŭ ĉio, transdonadu tiun ĉi mian mesaĝon al viaj posteuloj, por ke estontaj generacioj daŭrigu la bataladon ĝis la venko.

„Kaj memoru, gekamaradoj: Via determineco neniam malfortiĝu! Nenia argumento miskonduku vin! Neniam aŭskultu, kiam oni diros al vi, ke Homo kaj bestoj havas komunan intereson, ke la prospero de unu estas la prospero de ambaŭ. Tio estas mensogaro. Homo servas al la intereso de neniu kreito krom al si mem. Kaj inter ni bestoj estu perfekta solidareco, perfekta kamaradeco en batalado. Ĉiuj homoj estas malamikoj. Ĉiuj bestoj estas kamaradoj.”

Je tiu momento eksonis granda bruego. Dum Majoro paroladis, kvar grandaj ratoj estis venintaj el siaj

truoj kaj sidis aŭskultante. La gehundoj estis rimarkintaj ilin, kaj nur per rapidega forkuro en siajn truojn la ratoj sukcesis savi sian vivon. Majoro levis sian hufon, postulante silenton.

„Gekamaradoj“, li diris, „jen punkto inda je interkonsento. La sovaĝaj kreitoj, ekzemple ratoj kaj kunikloj – ĉu ili estas niaj amikoj aŭ ĉu niaj malamikoj? Ni voĉdonu. Mi proponas al la kunveno jenan demandon: Ĉu ratoj estas kamaradoj?“

La voĉdonado estis tuj farata, kaj interkonsentiĝis je granda plimulto da voĉoj, ke ratoj estas kamaradoj. Nur kvar voĉdonis kontraŭ, nome la tri gehundoj kaj la katino; poste konстатиĝis, ke ĉi tiu donis sian voĉon kaj por kaj kontraŭ. Majoro pluparolis:

„Mi ne havas multe pli por diri. Mi nur ripetas: memoru ĉiam vian devon de malamikeco kontraŭ Homo kaj lia manieraro. Kio ajn iras dupiede estas malamiko. Kio ajn iras kvarpiede, aŭ havasflugilojn, estas amiko. Kaj memoru ankaŭ ke en batalado kontraŭ Homo, ni ne eksimiliĝu al li. Eĉ venkinte lin, ne akceptu liajn malvirtojn. Neniu besto iam ajn loĝu en domo, aŭ dormu en lito, aŭ portu vestaĵojn, aŭ trinku alkoholaĵojn, aŭ fumu tabakon, aŭ tuŝu monon, aŭ komercu. Ĉiuj kutimoj de Homo estas malbonaj. Kaj antaŭ ĉio, neniu besto iam ajn tiraniĝu super sia propra speco. Ĉu malfortaj, ĉu fortaj, ĉu ruzaj, ĉu stultaj, ni ĉiuj estas gefratoj. Neniu besto iam ajn mortigu alian beston. Ĉiuj bestoj estas egalaj.

„Kaj nun, gekamaradoj, mi rakontos al vi mian sonĝon de la pasinta nokto. Tiun sonĝon mi ne povas priskribi al vi. Tio estis sonĝo pri la mondo, kia ĝi estos, kiam Homo estos malaperinta de ĝia surfaco. Sed ĝi rememorigis al mi ion, kion mi antaŭlonge estis forgesinta. Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis malgrandega porketo, mia patrino kaj la aliaj porkinoj kantadis malnovan kanton, de kiu ili sciis nur la melodion kaj

la unuajn du vortojn. Mi sciis tiun melodion dum mia infaneco, sed ĝi estis antaŭlonge foriginta el mia memoro. Kaj krome, la teksto de la kanto ankaŭ revenis – la teksto, mi estas certa, kiu estis kantata de bestoj de praaĵ tempoj, kiuj perdiĝis el memoro dum generacioj. Mi nun kantas al vi tiun kanton, gekamaradoj. Mi estas maljuna, kaj mia voĉo raŭka, sed kiam mi estos instruinta al vi la melodion, vi mem povos pli bone ĝin kanti, Ĝi titoliĝas „Bestoj Anglaj“.

Olda Majoro tusetis kaj ekkantis. Kiel li diris, lia voĉo estis raŭka, sed li sufiĉe bone kantis, kaj la melodio estis emociiga, simila jen al „Klementino“, jen al „La Cucaracha“. La teksto estis jena:

Bestoj anglaj, kaj irlandaj,
ĉiu best' en ĉiu land'
nun aŭskultu, nun aŭdiĝos
al vi ĉiuj ĝoja kant'.

Baldaŭ estas iun tagon
faligota l' homtiran',
kaj neniam plu Anglion
suferigos lia man'.

Niaj nazoj ne plu portos
liajn ringojn de sklavec'
disfaligos direktilojn,
kaj vipaĉojn la pravec'.

La riĉaĵoj estos niaj:
pajl', sukero kaj farun'.
Ĉio bela, ĉio bona
apartenos al ni nun.

Belaj estos anglaj kampoj,
bela ankaŭ la akvar',
kaj la bestoj liberiĝos
ne ĉi-vivo de amar'.

Jen por tio ni laboru
ja per ĉiu fortecer',
ĉiu bruto, ĉiu besto
por estonta la liber'.

Bestoj anglaj, kaj irlandaj,
ĉiu best' en ĉiu land'
disvastigu mian kanton
ĉar ĝi estas via kant'!

La kantado de ĉi tiu kanto fortege ekscitis la bestojn. Preskaŭ antaŭ ol Majoro atingis la finon, ili jam ekkantis ĝin. Eĉ la plej stultaj jam regis la melodion kaj kelke da vortoj, kaj la inteligentaj, ekzemple la porkoj kaj la hundoj, post kelke da minutoj jam parkeris la kanton. Kaj tiam, post pluraj antaŭaj provoj, la tuta bestaro ekkantis „Bestoj Anglaj” en laŭtega unisono. La bovinoj muĝis ĝin, la hundoj hurlis ĝin, la ŝafoj blekis ĝin, la ĉevaloj henis ĝin, la kolomboj kveris ĝin kaj la anasoj kvakis ĝin. Ili estis tiel ĉarmitaj de la kanto, ke ili finkantis ĝin kvinfoje, kaj eble plu kantadus, se ili ne estus interrompitaj.

Malfeliĉe, la bruego vekis s-ron Jonaidon, kiu eksaltis el sia lito, certa ke en la korto estas vulpo. Li kaptis la fusilon, kiun li ĉiam havis en la angulo de sia dormoĉambro, kaj pafis ŝargon da kugletaĵo, grado n-ro 6, en la malhelon. La kugletoj enfosiĝis en la muron de la fojnejo, kaj la kunveno rapide finiĝis. Ĉiuj fuĝis al siaj respektivaj dormlokoj. La birdoj saltis sur siajn sidstangojn, la brutoj komfortiĝis sur la pajlo, kaj la tuta farmano post minuto jam dormis.

POST TRI DIURNOJ Oĉda. Majoro pace mortis dum dormado. Lian kadavron oni enterigis apud la frukt-arbareto.

Tio ĉi okazis frue en Marto. Dum la sekvantaj tri monatoj estis multe da sekreta aktiveco. La parolado de Majoro estis doninta al la pli inteligentaj bestoj tute novan vidpunkton pri la vivo. Ili ne sciis, kiam la – de Majoro antaŭvidita – revolucio okazos, havis neniun bazon por kredi, ke ĝi dum ilia vivotempo efektiviĝos, sed klare konsciis, ke estas ilia devo sin prepari por ĝi. La instruado kaj organizado de la aliaj nature farigis la tasko de porkoj, kiuj estis ĝenerale rigardataj kiel la plej inteligentaj el la bestoj. Plej eminentaj inter la porkoj estis du junaj virporkoj nomitaj Neĝobulo kaj Napoleono, kiujn s-ro Jonaido bredis por vendo. Napoleono estis granda, iom sovaĝaspekta virporko berkŝira, la sola berkŝira de la farmo, ne tre parolema, sed havanta reputacion de atingado de tio, kion li deziras. Neĝobulo estis pli vigla porko ol Napoleono, pli rapideparola kaj pli inventema, sed oni ne opiniis lin same profund-karaktera. Ĉiuj aliaj porkoj virseksaj estis porkidetoj. La plej konata el ili estis malgranda dika, nomita Kvikulo, kun tre rondaj vangoj, briletantaj okuloj, leĝitaj movoj, kaj akresona voĉo. Li estis brila oratoro, kaj kiam li argumentis pri iu malfacila punkto, li kutimis saltetadi de flanko al flanko kaj svingetadi la voston, kio estis iel tre persvada. La aliaj diris pri Kvikulo, ke li kapablas konvinki pri la nigreco de blanko.

Ĉi-trio estis el la lecionoj de Oĉda Majoro ellaborintaj tutan pensmanieron, al kiu ili donis la nomon bestarismo. Plurajn noktojn posemajne, post la enlitiĝo de s-ro Jonaido, ili sekrete kunvenadis en la fojnejo kaj prezentis al la aliaj la principojn de la bestarismo. Ko-

mence ili renkontadis multe da stulteco kaj apatio. Kelkaj bestoj parolis pri la devo de lojaleco al s-ro Jonaido, kiun ili nomas „mastro“, aŭ faris naivajn rimarkigojn, kiel ekz.: „S-ro Jonaido nutras nin. Sen li ni malsatmortus.“ Aliaj demandis, „Kial nin intereso tio, kio post nia morto okazos?“ aŭ „Se tiu ĉi revolucio ĉiukaze okazos, kial gravas, ĉu ni por ĝi laboru aŭ ne?“ kaj por la porkoj estis malfacilege ilin konvinki, ke ĉi tio estas kontraŭa al la principoj de bestarismo. La plej stultajn demandojn faris Manjo, la blanka ĉevalino. Ŝia unua demando al Neĝobulo estis: „Ĉu estos post la Revolucio sukero?“

„Ne“, Neĝobulo firme respondis. „Sur tiu ĉi farmeto ni ne havas ekipaĵaron por fabriki sukeron. Krome, vi ne bezonas sukeron. Vi ricevos tiom da aveno kaj fojno, kiom vi deziras.“

„Kaj ĉu mi ankoraŭ rajtos porti rubandojn en la kolharoj?“ – demandis Manjo.

„Kamaradino“, diris Neĝobulo, „tiuj rubandoj, kiujn vi tiel amas, estas etikedo de la sklaveco. Ĉu vi ne komprenas, ke libereco pli multe valoras ol rubandoj?“

Manjo konsentis, sed ne ŝajnis esti tre konvinkita.

La porkoj renkontis eĉ pli grandan malfacilaĵon en la mensogoj, rakontataj de Moseo, la malsovaĝigita korvo. Moseo, kiu estis la preferata hejmbesto, estis spiono kaj informaĉanto, sed ankaŭ ruza parolanto. Li asertis scii pri la ekzisto de mistera lando nomata Sukerbombonujo, kien ĉiuj bestoj iras post la morto. Ĝi situas, laŭ la rakontado de Moseo, ie alte en la ĉielo, iom transe de la nuboj. En Sukerbombonujo estas, oni-dire, ĉiuj sep tagoj dimanĉo, trifolio kreskas la tutan jaron, kaj sukerbuloj kreskas en la heĝoj. La bestoj malamis Moseon pro tio, ke li informaĉadis kaj ne laboris, sed kelkaj el ili kredis al Sukerbombonujo, kaj la

porkoj devis tre diligente argumenti por konvinki ilin, ke tia loko ne ekzistas.

Iliaj plej fidelaj disĉiploj estis la du ĉarĉevaloj, Boksulo kaj Trifolia. Por tiuj estis ege malfacile ion ajn mem elpenŝi, sed, fine, akceptinte la porkojn kiel instruantojn, ili ĉion absorbis, kion tiuj ĉi al ili diris, kaj pludonis ĝin per simplaj argumentoj al la aliaj bestoj. Ili neniam mankis ĉe la sekretaj kunvenoj en la fojnejo, kaj ili direktadis la kantadon de „Bestoj Anglaj“, per kiuj la kunvenoj ĉiam finiĝadis.

Montriĝis ke la revolucio multe pli frue kaj facile efektiviĝis ol iu ajn atendis. Dum pasintaj jaroj s-ro Jonaïdo, kvankam malfacila mastro, estis estinta kapabla farmisto, sed liaj aferoj tamen lastatempe ne tiel bone marŝis. Li estis forte malkuraĝiĝinta post monoperdo en proceso, kaj ekkutimis pli multe trinkadi ol estis bone por li. Dum tutaj tagoj li sidadis en sia preferata seĝo, legante gazetojn, drinkante, kaj de tempo al tempo donante al Moseo pankrustojn trempitajn en biero. Liaj dungitoj estis maldiligentaj kaj malhonestaj, la kampoj estis plenaj je fiherboj, la domoj bezonis novajn tegolojn, la heĝoj estis neglektataj, kaj la brutaro estis nesufiĉe nutrata.

Junio venis kaj la fojno estis preskaŭ rikoltoĉpreta. Je la tago de s-ta Johano, sabaton, s-ro Jonaïdo veturis al Vilindono kaj en la gastejo Ruĝa Leono tiel ebriiĝis, ke li ĝis dimanĉo tagmeze ne revenis. La dungitoj estis melkintaj frumatene la bovinojn, kaj poste foriris por ĉasi kuŝiklojn, ne doninte al la brutaro por manĝi. Kiam s-ro Jonaïdo revenis, li tuj ekdormis sur la sofo en la salono, kovrinte la vizaĝon per ekzemplero de la gazeto „Navaĵoj el Tutmondo“, kaj do kiam la vespero venis, la brutaro estis ankoraŭ nenutrita. Fine ili ne plu eltenis. Unu el la bovinoj per siaj kornoj enrompis la pordon de la stokejo, kaj la bestoj komencis memservi sin el la furaĝujoj. Ĝuste tiumomente s-ro Jonaïdo

vekiĝis. Post momento li kun siaj kvar dungitoj estis en la remizo, kun vipoj en la manoj, vipantaj en ĉiuj direktoj. Tio ĉi estis pli ol la malsataj bestoj povis elteni. Unuanime, kvankam nenio tia estis antaŭplanita, ili ekĵetis sin kontraŭ siajn turmentantojn. Jonaĭdo kaj liaj dungitoj subite sentis sin puŝataj kaj tretataj de ĉiuj flankoj. La situacio ne plu estis regata de ili. Ili neniam estis spertintaj tian konduton flanke de bestoj, kaj ĉi tiu subita ribelo de kreitoj, kiujn ili kutimis laŭvole vipadi kaj mistraktadi, timigis ilin preskaŭ ĝis frenezo. Post nur kelke da momentoj ili ĉesis sin defendi kaj ekkuris. Post minuto ĉiuj kvin fuĝis laŭ la ĉarvojo kondukanta al la ĉefstrato, kaj la bestoj triumfe persekutis ilin.

S-ino Jonaĭdo rigardis tra la fenestro de la dormoĉambro, vidis kio okazas, haste ĵetis en sakon kelke da posedaĵoj kaj malaperis laŭ alia vojo de la farmo. Moseo saltis de sia sidstango kaj flugis post ŝi, laŭte grakante. Dume, la bestoj estis ĉasintaj Jonaĭdon kaj ties dungitojn eksteren sur la ĉefstrato kaj klakfermitaj la kvin-stangan pordegon post ili. Do, preskaŭ antaŭ ol ili sciis, kio okazas, la revolucio estis sukcese efektivigita. Jonaĭdo estis elpelita, kaj la bieneto Nobeldoma Farmo nun apartenas al ili.

Dum la unuaj minutoj la bestoj apenaŭ povis kredi al sia bonsorto. Hia unua ago estis galopo laŭ la limoj de la bieneto, kvazaŭ ili volus certiĝi, ke ne kaŝiĝas sur ĝi iu Homo; post tio ili vetkuris reen al la domaro por forviŝi la lastajn spurojn de la malamata regado de Jonaĭdo. Ili rompmalfermis la jungilejon, situitan apud la stalaro; la mordopecojn, la nazringojn, la hundoĉenojn, la kruelajn tranĉilojn per kiuj Jonaĭdo sistempe kastradis la porkojn kaj ŝafidojn, ĉion ĉi ili ĵetis en la puton. La rimenojn, la kolbridojn, la blindumilojn, la maldignigajn nazosakojn oni ĉiujn ĵetis en la fajron kiu flamis en la korto. Tiel ankaŭ la vipojn. Ĉiuj bestoj

ĝojdancis, vidante la brulantajn vipojn. Neĝobulo ankaŭ enĵetis rubandojn, per kiuj estis kutime dekorataj la koltharoj kaj vostoĵoj de la ĉevaloj.

„Rubandoj“, li diris, „estas rigardendaj kiel vestaĵoj, kiuj estas la markilo de la homoj. Decas, ke ĉiuj bestoj estu nudaj.“

Kiam Boksulo tion aŭdis, li prenis la malgrandan pajloĉapelon, kiun li dumsomere portadis por protekti siajn orelojn antaŭ la muŝoj, kaj ĵetis ankaŭ ĝin en la fajron, aldone al la aliaj objektoj.

Post nur iomete da tempo la brutaro estis detruinta ĉion, kio rememorigis pri s-ro Jonaido. Tiam Napoleono rekondukis ilin en la stokejon, kaj disdonis al ĉiu po duobla porcio da greno, kaj al ĉiu hundo po du biskvitoj. Ili poste kantis sepfoje sinsekve „Bestoj Anglaj“ de komenco ĝis fino, post kio ili iris dormi kaj dormis pli bone ol iam ajn antaŭe.

Tamen ili vekiĝis, kiel kutime, je sunleviĝo, kaj subite rememorante la gloran okazon de la ĵusa vespero, ili rapidegis kune al la paŝtejo. En la paŝtejo estis monteto, de kiu estis videbla la pli granda parto de la bieneto. La bestoj kuris sur ĝian pinton kaj ĉirkaŭrigardis en la klara lumo de la mateno. Jes, ĝi apartenis al ili – ĉio videbla estis ilia posedaĵo! En la ekstazo de tiu penso ili lude ĉirkaŭkuris, ili saltegis pro ekscito. Ili ruladis en la roso, ili elŝiradis plenbuŝojn da dolĉa somerherbo, eltretadis erojn da nigra humo, kaj flaradis ĝian riĉan odoron. Tiam ili faris kontrolpromenadon tra la farmo, kaj ekzamenis en senvorta admirado la plug-terenon, la fojnkampon, la fruktarbaron, la lageton, la vepraron. Estis kvazaŭ ili neniam antaŭe tiujn lokojn vidus, kaj eĉ nun ili apenaŭ povis kredi ke tio estas ilia propraĵo.

Tiam ili envice reiris al la domaro kaj haltis silentante ekster la pordo de la mastrodomo. Ankaŭ ĝi apartenis al ili, sed ili tro timis por eniri ĝin. Post momento,

tamen, Neĝobulo kaj Napoleono rompmalfermis la pordon per siaj ŝultroj, kaj la bestoj eniris unu post alia, irante plej singardeme por nenion delokigi. Ili piedopintiris de ĉambro al ĉambro, timante pli laŭte paroli ol flustre, kaj rigardante kvazaŭ terurigite la nekredblan lukson, la litojn kun la plum-matracoj, la spegulojn, la per ĉevalharoj remburitan sofon, la bruselan tapiŝon, la litografaĵon de la reĝino Victoria, pendantan super la kamenbreto en la saloneto. Ili ĝuste revenis malsupren kiam oni rimarkis ke forestas Manĝo. Reirante, la aliaj trovis ke ŝi en la plej bona dormoĉambro postrestis. Preninte el la tualeta tablo de s-ino Jonaïdo bluan rubandon, ŝi tenis ĝin al sia ŝultro, stulte admirante sian respegulaĵon en la spegulo. La aliaj ŝin akre riproĉis, kaj ili forlasis la domon. Kelke da porkaĵ-femuroj oni kunprenis por ilin enterigi, kaj la en la lavejo trovitan barelon da biero Boksulo per unu treto de hufego frakasis; nenio alia en la domo estis tuŝita. Tuj akceptiĝis unuanima rezolucio, nome: ke la mastrodomo estu konservata kiel muzeo. Konsentis ĉiuj ke neniu besto ĝin iam ajn ekloĝu.

La bestoj matenmanĝis kaj post tio Neĝobulo kaj Napoleono ilin denove kunvenigis.

„Gekamaradoj“, diris Neĝobulo, „la horo estas la sesa kaj duono, kaj nin atendas longa tago. Hodiaŭ estas komencota la fojnorikoltado. Sed antaŭ ol io ajn alia, estas ordigenda unu afero.“

La porkoj nun malkaŝis la fakton ke ili dum la pasintaj tri monatoj pere de malnova legolibro, aparteninta al la infanoj de Jonaïdo kaj ĵetita al la rubaĵoj, instruis al si legadon kaj skribadon. Napoleono alportigis potojn de nigra kaj blanka farboj, kaj kondukis la bestaron al la pordego ĉe la ŝoseo. Tiam Neĝobulo (ĉar Neĝobulo plej bone regis la skribarton) prenis penikon inter la du duonoj de sia antaŭpiedo, farbkaŝis la vortojn Nobeldoma Farmo sur la plej supra breto de

la pordego, kaj ilin anstataŭigis per la vortoj Besto-Farmo. Tio estis ekde tiu momento ĝia nomo. Post tio ili reiris al la domaro, kie Neĝobulo kaj Napoleono alportigis ŝtuparon, kiun ili apogis kontraŭ la fina muro de la granda fojnejo. Ili klarigis ke pere de sia studado dum la pasintaj tri monatoj la porkoj sukcesis resumi la principojn de bestarismo en Sep Ordonoj. Tiuj Sep Ordonoj estis nun sur la muro surskribotaj kaj estis prezentataj neŝangeblan leĝon, laŭ kiu ĉiam vivu ĉiu besto de la Besto-Farmo. Kun iom da malfacilaĵo (ĉar por porko ne estas facile sin balanci sur ŝtupetaro) Neĝobulo suprengrimpis kaj eklaboris, dum Kvikulo sur pli malalta ŝtupo tenis por li la farbopoton. Li skribis la Ordonojn, en grandaj blankaj literoj de tridek metroj videblaj, sur la peĉkovrita muro. Ili estis jenaj:

LA SEP ORDONOJ

1. Dupieduloj estas malamiko.
2. Kvarpieduloj kaj flugilhavuloj estas amikoj.
3. Neniu besto portu vestaĵojn.
4. Neniu besto dormu en lito.
5. Neniu besto trinku alkoholaĵojn.
6. Neniu besto mortigu iun ajn alian beston.
7. Ĉiuj bestoj estas egalaj.

Ili estis tre nete skribitaj kaj – escepte ke „ajn“ estis skribita „ain“, kaj unu „s“ renverse – la literumado estis tute korekta. Neĝobulo ilin laŭtleĝis por la aliaj. Ĉiuj bestoj kapjesis en plena konsento, kaj la inteligentaj tu komencis parkeri la Ordonojn.

„Nun, gekamaradoj“, diris Neĝobulo, terenĵetante la penikon, „ek al la fojnokampo! Pro nia honoro ni pli rapide rikoltu ol povus Jonaido kaj lia dungitaro!“

Sed jen je tiu momento la tri bovinoj, jam sufiĉe longe malkomfortaj, laŭte ekmuĝis. Ili dum tuta diurno

ne estis melkitaj kaj iliaj mamoj estis preskaŭ krevontaj. Post ioma pensado, la porkoj alportigis sitelojn, kaj per siaj antaŭpiedoj, kiuj por tia tasko bone taŭgis, sufiĉe sukcese melkis la bovinojn. Baldaŭ staris tie kvin siteloj da ŝauma, kremoplena lakto, kiun pluraj bestoj kun interese rigardis.

„Kio estos farata kun tiu lakto?“, iu demandis.

„Jonaido iam miksadis iom da lakto en nian nutraĵon“, diris unu el la kokinoj.

„Pri la lakto ne ĝenu vin, gekamaradoj!“ – kriis Napoleono, postenigante sin antaŭ la sitelojn. „Ĝi jam estos disponata. Pli gravas la rikolto. Kamarado Neĝobulo vin kondukos. Mi post kelke da minutoj sekvos. Antaŭen, gekamaradoj! La fojno atendas.“

La bestoj do ekmarŝis al la fojnkampo por komenci la rikoltadon, kaj kiam ili vespere revenis, rimarkis iu ke la lakto malaperis.

KIEL ILI LABORIS kaj ŝvitis por kolekti la fojnon! Sed iliaj penoj rekompenciĝis, ĉar la rikolto estis eĉ pli sukcesa ol ili esperis.

Kelkfoje la laboro estis severa; la iloj estis por homoj intencitaj, ne por bestoj, kaj estis granda malavantaĝo ke neniu besto povis utiligi instrumenton, kies uzado postulas, ke oni staru sur la malantaŭaj piedoj. Sed la porkoj estis tiel ruzaj ke ili povis venki ĉiujn malfacilaĵojn. La geĉevaloj konis ĉiun kvadratcentimetron de la kampo kaj verdire pli bone ol Jonaido mem scipovis la falĉadon kaj rastadon. La porkoj mem ne efektive laboris, sed direktadis kaj koordinis la aliajn. Estante pli kleraj, ili kvazaŭ nature prenis al si la estradan oficon. Boksulo kaj Trifolia sin ĵungis al la falĉilo aŭ la ĉeval-rastilo (kompreneble ne plu estis bezonataj buŝpecoj kaj direktilo) kaj paŝegadis nedeturneble tra la kampo kaj reen, dum iu porko ilin postiris, vokante „Hot, hot, kamarado!“ aŭ „Halt, kamarado, halt!“ – laŭnecese. Kaj ĉiu besto, eĉ la plej modestaj, helpis en la renversado kaj kolektado de la fojno. Eĉ la anasinoj kaj kokinoj tuttage tien kaj reen kuradis sub la varmega suno, portantaj en la beko pecetojn de fojno. Finfine ili du tagojn pli frue kompletigis la rikolton ol tion normale faris Jonaido kaj lia dungitaro. Krome, tio estis la plej granda rikolto iam ajn farita sur tiu farmo; la kokinoj kaj anasinoj per siaj bonegaj okuloj povis kolekti ĉiun unuopan tigeton. Kaj neniu besto eĉ plenbuŝon ŝtelis.

Dum tiu somero la laboro kvazaŭ horloĝa mekanismo progresis. La bestoj estis pli feliĉaj ol ili tion iam ajn imagis ebla. Ĉiu plenbuŝo da manĝaĵo estis akute pozitiva plezuro, ĉar ĝi estis ilia manĝaĵo, de ili mem kaj por ili mem produktita, ne de avara mastro al ili porciumata. Pro tio ke la parazitaj homoj

nun forestis, ĉiuj havis pli por manĝi. Ili havis ankaŭ pli da libertempo, kvankam la bestoj estis senspertaj pri la uzado de ĝi. Ili renkontis multe da malfacilaĵoj – ekzemple, kontraŭ la fino de la jaro, rikoltinte la grenon, ili devis ĝin laŭ la malnovega maniero tretmueli kaj per sia spiro forblovadi la grenventaĵon, ĉar la farmo ne posedis draŝmaŝinon – sed la porkoj per sia inteligenteco kaj Boksulo per siaj gigantaj muskoloj tion ĉiam sukcesigis. Boksulo estis por ĉiuj mirindaĵo. Eĉ dum la tempo de Jonaĉo li estis bona laboranto, sed nun li efikis pli kiel tri ĉevaloj ol kiel unu; dum certaj tagoj ŝajnis, kvazaŭ la tuta taskaro de la farmo kuŝus sur lia dorsego. De la mateno ĝis la nokto li senĉese ŝovadis kaj tiradis, ĉiam tie troviĝante, kie la laboro estis la plej malfacila. Kun unu el la virkokoj li aranĝis ke ĉi tiu lin ĉiumatene unu horon pli frue veku ol la aliajn, kaj li propravole plenumis iun taskon plej urĝan, antaŭ ol la komenco de la taga rutino. Lia respondo al ĉiu problemo, al ĉiu malprogreso, estis „Mi pli klopodos!” – kion li prenis kiel sian personan devizon.

Sed ĉiu laboris laŭ sia kapablo. La kokinoj kaj anasinoj, ekzemple, savis dum la rikoltado kvin buŝelojn da greno, kolektante la postlasitajn grajnojn. Neniu ŝtelis, neniu murmuris pri siaj porciumoj, la kverelado, la mordado, la ĵaluzo, normalaj ecoj de la antaŭa vivo, estis preskaŭ malaperintaj. Neniu maldiligentis – tio estas, preskaŭ neniu. Manĝo, konfesinde, emis ne povu vekigi frumatene, kaj kutimis frue forlasi la laboron, laŭ ŝia aserto pro ŝtono en la hufo. Kaj la konduto de la katino estis iomete stranga. Oni baldaŭ rimarkis, ke kiam estas laboro fareda, la katino ne troveblas. Dum horoj ŝi malaperis, reapante je la manĝotempoj, aŭ vespere post la laborfino, kvazaŭ ŝi neniam mankus. Sed ŝi ĉiam havis tiajn bonegajn pretekstojn kaj ĉiam tiel afekcie ŝpinis, ke ne eblis ne kre-

di pri ŝiaj bonintencoj. Benjamen, la maljuna Azeno, ŝajnis esti tute ne ŝanĝita de post la revolucio. Li same malrapide kaj obstine plenumadis siajn taskojn kiel dum la tempo de Jonaido, nek maldiligentante nek farante propravole iujn ajn aldonajn laborojn. Pri la revolucio li nenium opinion esprimis. Se oni lin demandis ĉu li ne estas pli feliĉa, kiam Jonaido estas for, li nur diris: „Azenoj longe vivas. Neniu el vi iam vidis mortintan azenon.“, kaj la aliaj devis esti kontentaj pri tiu mistera respondo.

Dimanĉe oni ne laboris. Oni unu horon malpli frue ol kutime matenmanĝis, kaj post tio estis praktikata ĉiusemajne senŝanĝe certa ceremonio. Neĝobulo trovis en la jungilejo malnovan verdan tablokovraĵon de s-ino Jonaido kaj pentris sur ĝi blankajn hufon kaj kornon. Ĉiun dimanĉon matene oni ĝin levis sur la flagmasto en la ĝardeno ĉe la mastrodomo. La flago estis verda, klarigis Neĝobulo, por reprezenti la verdajn kampojn de Anglio, dum la hufo kaj korno reprezentis la estontan Respublikon de Bestoj starigotan post la fina faligo de la homaro. Post hiso de la flago ĉiuj bestoj marŝis en la grandan fojnejon por ĝenerala interkonsiliĝo, nomita la Kunveno. Tie oni planis la taskaron de la venonta semajno kaj oni proponis kaj diskutis rezoluciojn. Proponantoj de la rezolucioj ĉiam estis la porkoj. La aliaj bestoj scipovis voĉdoni, sed neniam povis elpensi iujn ajn proprajn rezoluciojn. Decide la plej aktivaj en debatoj estis Neĝobulo kaj Napoleono. Sed oni rimarkis, ke tiuj ĉi neniam konsentis unu kun alia: kiun ajn sugeston unu el ili proponis, la alia nepre kontraŭis ĝin. Eĉ kiam estis proponita rezolucio – afero per si mem ne protestebla – rezervi malgrandan paŝtejon kiel ripozejon malantaŭ la fruktarbareto por bestoj tro maljunaj kaj ne povantaj labori, sekvis ŝtorma debato pri la justa aĝo de emeritiĝo por ĉiu klaso de bestoj.

La kunveno ĉiam finiĝis per la kantado de „Bestoj anglaj“, kaj la posttagmezon oni dediĉis al sindistrado.

La porkoj rezervis al si la jungilejon kiel ĉefkvarteron. Tie ili dumvespere studadis forĝadon, ĉarpentadon kaj aliajn necesajn metiojn, laŭ libroj prenitaj el la mastrodomo. Neĝobulo krome okupadis sin pri organizado de la aliaj bestoj en la de li tiel nomataj Bestaj Komitatoj. Li estis ĉe tiu agado nelacigebla. Li fondis por la kokinoj la Komitaton pri Ov-Produktado, por la bovinoj la Ligon de Puraĵ Vostoj, la Komitaton por Reedukado de Sovaĝaj Kamaradoj (kies celo estis malsovaĝigi la ratojn kaj kuniklojn), por la ŝafoj la Movadon por Pli Blanka Lano, kaj diversajn aliajn, krome instigante la instruadon de legado kaj skribado. Plejparte tiuj projektoj estis malsukcesaj. Ekzemple la provo malsovaĝigi la sovaĝajn bestojn preskaŭ tuj disfalis. Ili daŭrigis la saman konduton kiel antaŭe, kaj se oni malsevere traktis ilin, tion ili simple eluzadis. La katino aliĝis al la Komitato pri Reedukado kaj dum pluraj tagoj estis tre aktiva. Unu tagon oni observis, kiel ŝi sidas sur tegmento, parolante kun kelke da paseroj sidantaj ĝuste tro malproksime por ke ŝi povu ilin atingi. Ŝi informis ilin, ke ĉiuj bestoj nun estas gekamaradoj, kaj ke ĉiu pasero kiu deziras, rajtas veni kaj eksidi sur ŝia antaŭpiedo; sed la paseroj gardis sian distancon.

Tamen la instruado de legado kaj skribado estis ega sukceso. En aŭtuno preskaŭ ĉiu besto de la farmo estis jam certagrade klerigita.

Koncerne la porkojn, ili jam perfekte skribis kaj legis. La hundoj sufiĉe bone lernis, sed ilin interesis neniu alia legaĵo ol la Sep Ordonoj. La kaprino Muriela iom pli bone legis ol la hundoj, kaj ŝi laŭtlegadis de tempo al tempo al la aliaj gazeterojn trovitajn inter la rubaĵoj. Benjameno legis same bone kiel iu ajn porko, sed li neniam praktikis sian kapablon. Laŭ lia scio,

li diris, ne ekzistas io ajn leginda. Trifolia parkeris la tutan alfabeton sed ne povis kunmeti vortojn. Boksulo sukcesis lerni nur „A“ ĝis „Ĉ“. Li desegnaĉis en la polvo per sia ega hufo „A B C Ĉ“ kaj poste li fiksrigardis la literojn, kun la oreloj premitaj malantaŭen, de tempo al tempo skuante la fruntobuklon, penante per sia tuta spirita forto rememori, kio sekvas, kaj neniam sukcesante. Plurfoje ti ja efektive lernis „D E F G“, sed ĝis li ilin parkeris, estis konstatite, ke li forgesis „A B C Ĉ“. Finfine li decidis esti kontenta kun la unuaj kvar literoj, kaj skribis ilin kelkfoje ĉiutage por refreŝigi sian memoron. Manĝo rifuzis lerni pli ol la literojn de sia propra nomo. Ilin ŝi formis tre bele en branĉeteroj, poste ilin dekorante per kelke da floroj, kaj ĉirkaŭradis mirante pri ili.

Neniu el la aliaj bestoj de la farmo povis parkeri pli ol la litero „A“. Konstatigis krome, ke la malpli inteligentaj bestoj, ekzemple la ŝafoj, kokinoj kaj anasinoj, ne kapablis parkeri la Sep Ordonojn. Post longa konsiderado Neĝobulo deklaris, ke la Sep Ordonoj fakte estas redukteblaj en unu maksimumon, nome: „Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – malbonulo“. Tio, li diris, ampleksas la esencan principon de la bestarismo. Kiu ĝin regas, estas sekura kontraŭ homaj influoj. La birdoj komence protestis, ĉar ŝajnis al ili ke ili estas dupieduloj, sed Neĝobulo pruvis al ili, ke tio estas malprava.

„Flugilo de birdo, gekamaradoj“, li asertis, „estas organo de movado, kaj ne de manipulado. Ĝi estas do rigardenda kiel piedo. La distinga signo de Homo estas la mano, la instrumento, per kiu li efektivas siajn malbonagojn.“

La birdoj ne komprenis la longajn vortojn de Neĝobulo, sed ili akceptis lian klarigon, kaj ĉiuj malpli inteligentaj bestoj komencis parkeri la novan maksimumon. KVARPIEDULO, JEN BONULO; DUPIEDULO – MALBONULO — estis enskribita sur la ekstrema mu-

ro de la fojnejo, super la Sep Ordonoj kaj en pli grandaj literoj. Parkerinte ĝin, la ŝafoj ekŝategis la maksimum kaj ofte, kuŝante en la kampo, ili ĉiuj eklekadis „Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – malbonulo!” kaj tion daŭrigis senlace dum horoj.

Napoleonon ne interesis la komitatoj de Neĝobulo. Li asertis, ke la edukado de la junularo estas pli grava ol io ajn, kion oni povus fari por la jam plenkreskintoj. Okazis ke Jesinjo kaj Viola baldaŭ post la fojnorikolto naskis, akuŝante ambaŭ kune naŭ sanajn hundidetojn. Tuj kiam ili demamiĝis, Napoleono ilin forprenis de la patrinoj, dirante ke li persone prirespondos ilian edukadon. Li kunprenis ilin en subtegmentejon, atingeblan nur per ŝtupetaro el la jungilaro, kaj tenis ilin en tia privateco, ke la aliaj farmanoj baldaŭ forgesis, ke ili ekzistas.

La mistero pri la lakto baldaŭ solviĝis. Ĝi estis ĉiutage miksa kun la nutraĵo de la porkoj. La fruaj pomoj nun maturiĝis kaj la herbo de la fruktarbaro estis punktita per pomoj deblovitaj per vento. La bestoj supozis, ke tiuj memkompreneble estos egale disdonataj; tamen venis unu tagon ordono, ke ĉiuj deblovitaj pomoj estu kolektataj kaj portataj en la jungilaron por la uzo de la porkoj. Pri tio kelkaj el la aliaj bestoj murmuris, sed senutile. Pri tiu ĉi punkto ĉiuj porkoj plene interkonsentis, eĉ Neĝobulo kaj Napoleono. Oni sendis Kvikulon por fari la necesan klarigon al la aliaj.

„Gekamaradoj!”, li kriis. „Mi espèras ke vi ne imagas, ke ni porkoj pro egoismo aŭ pro privilegio faras tion? Multaj el ni eĉ malŝatas pomojn kaj lakton. Mi mem ilin malŝatas. Nia sola intenco kiam ni prenas tiujn aĵojn, estas konservi nian sanon. Lakto kaj pomoj (ĉi tio estas science pruvita, gekamaradoj) enhavas substancojn absolute necesajn por la bonfarto de porkoj. Ni porkoj estas cerb-laborantoj. La tuta administrado kaj organizado de tiu ĉi bieneto dependas de

ni. Tage-nokte ni zorgas pri via bonfarto. Ja pro vi ni trinkas tiun lakton kaj manĝas tiujn pomojn. Ĉu vi scias kio okazus, se ni porkoj malsukcesus plenumi nian devon? Jonaido revenus! Jes, Jonaido revenus! Certe, gekamaradoj", kriis Kvikulo preskaŭ plede, saltetante de flanko al flanko kaj svingetante per la vosto, „certe neniuj el vi deziras ke Jonaido revenu?”

Nu, se la bestoj pri io ajn estis tute certaj, tio estis, ke ili ne deziras la revenon de Jonaido. Kiam la afero estis en tiu ĉi nuanco prezentita al ili, ili havis neniun respondon. La graveco de la konservado de la sano de la porkoj estis nur tro evidenta. Do sen plua argumentado oni interkonsentiĝis, ke la lakto kaj la deblovitaj pomoj estu rezervataj sole por la porkoj.

ĜIS LA FINO de la somero la novaĵo pri tio, kio okazis ĉe Besto-Farmo estis disvastiĝinta tra la duono de la graflando. Ĉiun tagon Neĝobulo elsendadis arojn da kolomboj kun la instrukcio, intermiksiĝi kun la bestoj de la najbaraj farmoj, rakonti al ili la historion de la Revolucio, kaj instrui al ili la melodion de „Bestoj Anglaj“.

La plejparton de tiu tempo Jonaido estis pasiginta en biertrinkejo de la gastejo Ruĝa Leono en Vilindono, plendante al ĉiu, kiu aŭskultemis pri la monstra maljustaĵo kiun li suferis: forpelo el sia bieneto fare de aro da sentaŭgaj bestoj. La aliaj farmistoj principe simpatiis kun li, sed en la komenco ne estis tre helpaj. Enkore ĉiu el ili sekrete scivolis, ĉu li ne povus iel fari el la malbonsorto de Jonaido propran avantaĝon. Estis feliĉe ke la posedantoj de la du farmoj senpere najbaraj kun tiu de Jonaido havas permanentajn malbonajn rilatojn unu kun la alia. Unu el ili, Vulpoboska Farmo, estis granda, neglektata, malnov-moda farmo, superkreskita de arboj, kun elĉerpitaj paŝtejoj kaj aĉe flegataj heĝoj. La posedanto de ĝi, s-ro Pilkintono, estis nefervora ĝentilhomo-farmisto, kiu pasigadis la plimulton de sia tempo ĉe fiŝkaptado kaj ĉasado, depende de la sezono. La alia farmo, Pinĉokampa Farmo, estis pli malgranda kaj pli bone flegata. Ĝia posedanto estis iu s-ro Frederiko, robusta, ruza viro, senĉese enmiksata en procesoj kaj havanta reputacion de necedema negocanto. Ambaŭ ĉi-personoj tiel malŝatis sin reciproke, ke estis por ili malfacile pri io ajn interkonsenti, eĉ se temis pri defendo de la propraj interesoj.

Tamen ili ambaŭ estis forte timigitaj pro la ribelo ĉe Besta Farmo kaj nepre deziris malhelpi, ke iliaj propraj bestoj multe eksciu pri ĝi. Komence ili pretendis ridmoki la ideon, ke bestoj mem povus produkti-

vi. Ili opiniis, ke la tuta afero post kelke da semajnoj kolapsos. Ili disvastigis la famon, ke la bestoj de Nobeldoma Farmo (ili insistis pri la nomo Nobeldoma Farmo; la nomon „Besto-Farmo” ili ne agnoskis) konstante interbataladas kaj krome rapide malsatmortas. Kiam pasis iom da tempo kaj la bestoj evidente ne malsatmortis, Frederiko kaj Pilkintono ŝanĝis sian propagandon kaj komencis rakontadi pri la terura malbono, kiu nun floras ĉe Besto-Farmo. Raportiĝis ke la tieaj bestoj praktikas kanibalismen, torturas unu la alian per ardantaj hufoferoj kaj interŝanĝadas siajn inojn. Jen, asertis Frederiko kaj Pilkintono, la rezulto de ribelado kontraŭ la naturaj leĝoj.

Tamen, neniu tute kredis tiun rakonton. Famoj, pri mirinda farmo, de kie la homoj estas forpelitaj kaj la bestoj gvidas siajn proprajn aferojn, en tordita formo cirkuladis, kaj dum tiu ĵaro trafluis la kamparon ondo de ribelemo. Virbovoj ĝis tiam bonhumoraj eksovaĝis, ŝafoj disrompis heĝojn kaj sin paŝtis per trifolio, bovinoj tretis la melksitelojn, ĉasĉevaloj rifuzis salti, kaj ĵetis siajn rajdantojn trans la barilojn. Plej grave, la melodio kaj eĉ la teksto de „Bestoj anglaj” estis ĉie konataj. Ili surprize rapide disvastiĝis. La homoj, aŭdante tiun kanton, ne povis regi sian ĉagrenon, kvankam ili pretendis trovi ĝin nur ridinda. Ili asertis, ke ili ne povas kompreni, kiel eĉ bestoj povas persvadi sin kanti tian abomenindan sensencaĵon. Ĉiun beston, aŭditan dum kantado de ĝi, oni tuj vipis. Kaj tamen la kanto estis nesubpremebla. La merloj en la heĝoj ĝin fajfis, la kolomboj en la ulmoj ĝin kveris, ĝi aŭdiĝis en la martelado de la forĝistoj kaj en la sonorado de la kirkaj sonoriloj. Kaj ĝin aŭdante la homoj sekrete ekstremis, perceptante en ĝi profetaĵon pri sia estonta pereco.

En la komencaj tagoj de oktobro, kiam la greno estis tranĉita kaj staplita kaj iom da ĝi jam draŝita,

aro da tre ekscititaj kolomboj ensvarmis la korton de Besto-Farmo. Jonaido, kun sia dungitaro kaj seso da dungitoj de Vulpobaska Farmo kaj Pinĉokampa Farmo, jam estis enirinta tra la kvinstaba pordego kaj nun marŝis laŭ la ĉar-vojo kondukanta al la bieneto. Ĉiu portis bastonon, escepte Jonaido, kiu iris antaŭe, portante pafilon. Evidente ili intencis rekapton de la farmo.

Tio estis jam longe atendata, kaj ĉio estis jam preparita. Neĝobulo, kiu estis studinta malnovan libron pri la kampanjoj de Juljo Cezaro, trovitan en la mastro-domo, estis responsa pri la defend-preparoj. Li rapide disdonis siajn ordonojn, kaj post kelke da minutoj ĉiu besto jam postenis.

Dum la homoj proksimiĝis al la domaro, Neĝobulo komencigis sian unuan atakon. Ĉiuj kolomboj, nombrante tridek kvin, flugadis tien kaj reen super la kapoj de la viroj kaj bombardis ilin per ĉeskrementoj; kaj dum la homoj al tio reagis, la anseroj, sin kaŝintaj malantaŭ la heĝo, elkuris kaj furioze ekpikadis ilian tibikarnon. Tamen, tio ĉi estis nur bataleta manovro, intencita por krei malordon, kaj la viroj per siaj bastonoj facile forpelis la anserojn. Neĝobulo nun komencigis sian duan atakon. Muriela, Benjamenino kaj la ŝafaro, gvidataj de Neĝobulo, rapidis antaŭen kaj de ĉiuj flankoj pikadis kaj puŝadis la virojn, dum Benjamenino sin turnis kaj tretadis al ili per siaj hufetoj. Sed denove la homoj kun siaj bastonoj kaj botegoj estis tro fortaj por ili; kaj subite, je ekgrunto de Neĝobulo, la signalo por malavanco, ĉiuj bestoj sin turnis kaj kuris tra la pordego en la korton.

La viroj aŭdigis triumfan krion. Ili vidis, ŝajne, siajn malamikojn fuĝantaj, kaj ili postkuris ilin en malordo. Guste tion Neĝobulo intencis. Kiam ili estis penetrintaj sufiĉe internen de la korto, la tri geĉevaloj, la tri bovinoj, kaj la ceteraj porkoj, kiuj embuskis en la bovin-

ejo, subite aperis malantaŭe, detranĉante ilian returnvojon. Neĝobulo je tiu momento donis la signalon: ataki. Li mem kuris rekte al Jonaido. Jonaido lin vidis, levis sian pafilon kaj pafis. La kugloj faris sangajn striojn laŭ la dorso de Neĝobulo, kaj unu ŝafo falis mortigita. Eĉ ne sekundon haltante, Neĝobulo ĵetis siajn ducent dek funtojn al la gamboj de Jonaido. Tiu ĉi falis sur amason da sterko kaj la pafilo flugis el liaj manoj. Sed la plej teruran spektaklon preparis Boksulo, kiu bastionsimile ekstaris sur la malantaŭaj piedoj kaj frapadis dise per siaj ferŝuitaj hufegoj. Lia unua frapo trafis la kranion de stalknabo el Vulpo-boska Farmo, kaj faligis lin senviva en la koton. Je tio kelkaj el la viroj terenĵetis siajn bastonojn kaj penis forkuri. Ili panikis, kaj post momento persekutis ilin ĉiuj bestoj kune ĉirkaŭen en la korto. Ili estis traborataj, tretataj, mordataj, piedbatataj. Neniu el la bestoj de la farmo malsukcesis siamaniere sin venĝi al ili. Eĉ la katino subite saltis de sur tegmento sur la ŝultrojn de bovinpaŝtisto kaj enigis siajn ungojn en lian nukon, tiel ke li kriegis pro teruro. Je iu momento kiam la vojo estis nebarita la homoj sufiĉe volonte forkuris el la korto al la ĉefŝoseo. Do, kvin minutojn post ilia invado, ili jam humiligite retiriĝis laŭ la sama vojo, laŭ kiu ili venis, kaj siblanta anseraro persekutis ilin, pikadante iliajn surojn.

Ĉiuj homoj estis for — escepte unu. En la korto Boksulo per sia hufo puŝadis la stalknabon, kiu kuŝis vizaĝaltere en la koto, penante turni lian korpon. La knabo ne movis sin.

„Li mortis“, Boksulo malĝoje konstatis. „Tion mi ne intencis. Mi forgesis ke mi portas ferŝuojn. Kiu kredos, ke mi tion ne faris intence?“

„For la sentimenton, kamarado!“ kriis Neĝobulo, de kies vundoj ankoraŭ gutetis sango. „Milito estas milito. La sola bona homo estas la mortinta homo.“

„Mi ne deziras mortigi – eĉ homojn“, insistis Boksulo, kaj liaj okuloj estis larmoplenaj.

„Kie do estas Manjo?“ iu demandis.

Efektive, Manjo ne ĉeestis. Dum unu momento oni ege timis; oni timis ke la homoj ŝin iel vundis aŭ eĉ forprenis kun si. Fine oni tamen trovis ŝin, en sia stalo sin kaŝintan, kun la kapo enfosita en la fojno en la manĝejo. Je la bruo de la pafilo ŝi estis tuj fuĝinta. Kaj kiam la aliaj revenis de la serĉado, ili trovis ke la stalknabo, kiu fakte estis nur senkonsciigita, jam rekonsciigis kaj fuĝis.

La bestoj rekunvenis, ege ekscititaj, kaj ĉiu plejlaŭtvoĉe rakontis siajn proprajn batalfarojn. Iniciatiĝis senprepara venkofesto. Oni hisis la flagon kaj kantis plurfoje „Bestoj anglaj“, tiam la mortigita ŝafo ricevis solenan funebran ceremonion, ĉe kiu oni plantis kratagon sur la tombo. Apud la tombo Neĝobulo faris paroladeton, emfazante la neprecon, ke ĉiu besto estu preta morti pro Besta Farmo, se tio necesas.

La bestoj unuanime decidis, krei militan ordenon „Besta Heroo, Unua Klaso“, kiun oni tuj prezentis al Neĝobulo kaj Boksulo. Ĝi konsistis en latuna medalo (fakte ili estis iuj malnovaj ĉeval-latunaĵoj, trovitaj en la jungilejo), kiun ili portu dimanĉe kaj festotage. Krome estis medalo „Besta Heroo, Dua Klaso“, postmorte prezentita al la mortigita ŝafo.

Multe diskutata estis la nomo de la batalo. Fine oni decidis nomi ĝin la Batalo de la Bovinejo, ĉar tie efektiviĝis la embusko. En la koto oni trovis la pafilon de Jonaido, kaj oni sciis ke estas en la domo skatolo da patronoj. Oni decidis ĝin starigi, kvazaŭ artilleri-pecon, apud la flagmaston, kaj dufoje po jaro ĝin pafigi – la dekduan de Oktobro, kiu estis la datreveno de la Batalo de la Bovinejo, kaj la tagon de Somermezo, la datrevenon de la revolucio.

DUM LA VINTRO daŭris, Manjo pli kaj pli ĝenemis. Ĉiun matenon ŝi malfruadis kaj sin senkulpigis, dirante, ke ŝi tradormis la ellitiĝan tempon, kaj ŝi plendis pri misteraj doloroj, kvankam ŝia apetito estis bonega. Pro ĉia preteksto ŝi forkuris al la trinklageto, kie ŝi stulte rigardis sian propran respegulaĵon en la akvo. Sed ankaŭ estis pli seriozaj onidiroj. Unu tagon, kiam Manjo gaje promenis en la korto, flirtante per la longa vosto kaj primordante fojnotigeton, Trifolia ŝin kondukis flanken por privata konversacio.

„Manjo“, ŝi diris, „mi devas diri al vi ion tre seriozan. Mi vidis ĉi-matene kiel vi rigardis trans la heĝo inter Besto-Farmo kaj Vulpoboŝka Formo. Unu el la dungitoj de s-ro Pilkintono staris sur la alia flanko. Kaj – mi staris malproksime, sed mi estas preskaŭ certa ke mi tion vidis – li parolis kun vi kaj vi permesis al ti karesi vian nazon. Kion tio signifas, Manjo?“

„Li ne...! Mi ne...! Tio ne estas vera!“ Manjo kriis, ekdancante kaj gratante la teron.

„Manjo! Rigardu en miajn okulojn! Ĉu vi ĵuras al mi, ke la viro ne karesis vian nazon?“

„Ne veras!“ , Manjo ripetis, sed ŝi ne povis rigardi en la okulojn de Trifolia, kaj post unu momento ŝi turnis sin kaj forgalopis al la kampo.

Al Trifolio venis ideo. Al la aliaj nenion dirante, ŝi eniris la stalon de Manjo kaj per la hufo turnis la pajlon. Kaŝitaj sub ĝi estis amaseto da sukerkubo kaj pluraj diverskoloraj rubendoj.

Post tri tagoj Manjo malaperis. Dum pluraj semajnoj ŝia kio ne estis sciata; tiam la kolomboj raportis ke ili ŝin vidis transe de Vilindono. Ŝi staris inter la firstangoj de ŝika ruĝa kaj nigra ĉareto antaŭ publika trinkejo. Dika, ruĝvizaĝa viro, kun kvadratumita pantalono kaj gamaŝoj kaj impostista aspekto, karesis ŝian

nazon kaj enbuŝigis al ŝi sukeron. Ŝia felo estis nove pritrancita kaj ĉirkaŭ la fruntobuklo estis skarлата rubendo. Laŭ la raporto de la kolomboj ŝi ŝajnis esti kontenta. Neniu el la bestoj plu parolis pri Manjo.

En januaro komenciĝis amara vetero. La tero estis malmola kiel fero kaj la kampoj estis nekultiveblaj. Okazis en la granda fojnejo multe da kunvenoj, kaj la porkoj sin okupis pri planado de la laboro de la venonta sezono. Jam akceptiĝis la kutimo, ke la porkoj, kiuj estis ege pli inteligentaj ol la ceteraj bestoj, decidu ĉiujn demandojn pri la ferma politiko, kvankam iliaj decidoj estas akceptendaj pere de pozitiva voĉdono de la majoritato. Tiu aranĝo sufiĉe bone funkcias, se ne okazus la disputoj inter Neĝobulo kaj Napoleono. Tiuj du malkonsentis pri ĉio, pri kio malkonsento eblas. Se unu sugestis, ke estu semata pli multe da hordeo, la alia nepre postulis pli da aveno, kaj se unu el ili asertis, ke tiu aŭ alia kampo taŭgas ĝuste por brasiko, la alia deklaris, ke ĝi taŭgas por radik-legomoj kaj por nenio alia. Ĉiu havis sian propran subtenantaron, kaj ofte okazis interesaj debatoj. Dum la kunvenoj Neĝobulo per siaj brilaj paroladoj ofte gajnis la majoritaton, sed Napoleono malantaŭ la kulisoj pli sukcese rekrutadis al si subtenon. Li precipe sukcesis ĉe la ŝafoj. Dum la lasta tempo la ŝafoj komencadis sian blekadon. „Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – malbonulo“, kaj oportune kaj neoportune, kaj ili ofte per tio interrompadis la kunvenon. Oni rimarkis, ke ili emas ekreciti precipe je la decidaj momentoj en la paroladoj de Neĝobulo. Li estis detale trastudinta kelke da malnovaj numeroj de la periodaĵo „Farmisto kaj Bestobredisto“, kiujn li trovis en la domo, kaj lia menso estis plenigita je planoj por novigoj kaj plibonigoj. Li klare paroladis pri kampo drenado, konservado de verda furaĝo, kaj fundamentaj forĵetindaĵoj, kaj li ellaboris kompleksan planon, laŭ kiu ĉiuj bestoj faltas sian

sterkon en la kampoj mem, ĉiutage en malsama loko, por ŝpari la laboron de transportado. Napoleono prezentis neniujn proprajn planojn, sed private diradis, ke tiuj de Neĝobulo neniigos, ŝajne ion trankvile atendante. Sed el ĉiuj iliaj disputoj neniu estis tiel akra kiel tiu, kiu koncernis la ventmuelilon.

En la longa paŝtejo, ne malproksime de la farma domaro, estis ronda monteto, la plej alta loko de la farmo. Mezurinte la grundon, Neĝobulo deklaris, ke ĝi estas ekzakte la ĝusta situo por ventmuelilo, kiu funkciigus dinamom kaj provizus la farmon je elektra energio. Tio lumigus la stalojn kaj dumvintre varmigus ilin, kaj krome ĝi funkciigus rotacian segilon, maŝinojn por tranĉado de paŝlo kaj rapobetoj, kaj elektran melkilon. La bestoj neniam aŭdis pri tiaj maŝinoj (ĉar la farmo estis eksmoda kaj havis nur la plej primitivan maŝinaron), kaj ili atente aŭskultis, kiam Neĝobulo priskribis mirindegajn maŝinojn, kiuj plenumos iliajn taskojn, dum ili laŭdezire sin paŝtos en la kampoj aŭ pliriĉigados sian spiriton per legado kaj konversacio.

Post pluraj semajnoj la desegnoj de la ventmuelilo de Neĝobulo estis plene finverkitaj. La mekanismaj detaloj venis plejparte el tri libroj apartenintaj al s-ro Jonaĵo — **Mil Utilaj Domtaskoj, Ĉiu la Propra Masonisto, kaj Elektro por Komencantoj.** Kiel studejon Neĝobulo uzis remizon, kiu iam estis uzata por koviloj kaj kiu havis glatan lignan plankon, konvenan por desegnado. Dum tutaj horoj li restis enŝlosita. Kun la libroj tenataj per ŝtono malfermitaj, kaj kun peco da kreto inter la maleoloj de sia antaŭpiedo, li rapide movigadis tien kaj reen, endesegnadis strekon post streko, kaj eligadis ĝojgruntetojn pro ekscito. Iom post iom la planoj fariĝis komplika amaso da turniloj kaj dentradoj, kovranta duonon de la planko, kaj la aliaj bestoj trovis ilin tute ne kompreneblaj, sed tre imponaj. Almenaŭ unu fojon ĉiutage ĉiu venis por rigardi la deseg-

naĵojn de Neĝobulo. Eĉ la kokinoj kaj anasinoj venadis, kaj klopodis ne paŝi sur la kretaj strekoj. Nur Napoleono restis ne interesata. Li tamen neatendite alvenis unu tagon, por inspekti la planojn. Li peze paŝis tra la remizo, detale kaj kritikplene rigardis la desegnaĵojn, flaris ilin kelke da fojoj, tiam li kontemplantis ilin iom da tempo el okulangulo; poste li subite levis piedon, urinis sur la desegnaĵojn, kaj eliris, eĉ ne unu vorton dirinte.

La opinioj pri la ventmuelilo estis profunde fenditaj. Neĝobulo ne malkonfesis, ke la konstruado de ĝi estus malfacila afero. Oni devus elhaki ŝtonojn kaj konstrui el ili murojn, tiam estus farendaj la veloj, kaj post tio estus bezonataj dinamoj kaj kabloj. (Kiel ĉi-objektoj estu akirataj, Neĝobulo ne klarigis). Sed li insistis, ke ĝi povus esti kompletigita post unu jaro. Kaj post tio, li deklaris, estus ŝparata tiom da laboro, ke la bestoj devus labori nur tri tagojn de ĉiu semajno. Napoleono, aliflanke, argumentis, ke la granda neceso de la momento estas la produktado de pli da nutraĵoj, kaj ke se oni malŝparus sian tempon pro ventmuelilo, ĉiuj malsatmortus. La bestoj dividiĝis en du partioj sub la sloganoj „Voĉdonu por Neĝobulo kaj la tritaga labor-semajno” kaj „Voĉdonu por Napoleono kaj la plena trogo”. Benjamenoj estis la sola besto, kiu ne enviciĝis ĉe iu ajn el la du partioj. Li rifuzis kredi, ke la manĝaĵoj plimultiĝos aŭ ke la ventmuelilo ŝparos laboron. Ĉu kun ventmuelilo, ĉu sen ventmuelilo, li diris, la vivo restos la sama – tio signifas: malbona.

Aparte de la disputoj pri la ventmuelilo, ekzistis la demando pri la defendado de la farmo. Estis plene komprenite, ke kvankam la homoj estis venkitaj en la Batalo de la Bovinejo, ili povus fari novan kaj pli decidan provon, rekapti la bieneton kaj reestabli s-roon Jonaidon. Ili havis pli urĝan kialon, ĉar la novaĵo pri la venko estis disvastiĝinta tra la lando kaj pli ol iam

malkvietigis la bestojn de la najbaraj farmoj. Kiel normale, Neĝobulo kaj Napoleono malkonsentis unu kun la alia. Laŭ Napoleono la bestoj devus akiri pafarmilojn kaj instrui al si la uzadon de ili. Laŭ Neĝobulo ili devus elsendadi pli kaj pli da kolomboj kaj inciti ribelon inter la bestoj de la aliaj farmoj. Unu argumentis, ke se ili ne povos sin defendi ili nepre estos venkataj, la alia argumentis, ke se ĉie okazus ribeloj, ne necesus sin defendi. La bestoj aŭskultis jen Napoleonon, jen Neĝobulon, kaj ne povis decidi, kiu pravas; verdire ili ĉiam trovis, ke ili kun tiu simpatias, kiu momente parolas.

Fine venis la tago, kiam la planoj de Neĝobulo estis kompletaj. En la kunveno de la venonta dimanĉo estis pribalotota la demando, ĉu komenci aŭ ne la konstruadon de la ventmuelilo. Kiam la bestoj estis kunvenintaj en la granda fojnejo, Neĝobulo ekstaris kaj, kvankam okaze interrompate de ŝafmekado, prezentis sian rezonaron por la konstruo de la ventmuelilo. Poste ekstaris Napoleono por repliki. Li kviete diris, ke la ventmuelilo estas sensencaĵo, konsilis ke neniu por ĝi voĉdonu, kaj simple reeksidis; ti parolis apenaŭ tridek sekundojn, kaj por li ŝajne ne gravis, kian reagon li elvokas. Je tio Neĝobulo reekstaris, kaj superkriante la ŝafojn, kiuj rekomencis sian blekadon, li komencis pasian apelacion, favore al la ventmuelilo. Ĝis tiam la simpatioj de la bestoj estis proksimume egale dividitaj, sed dum unu momento la elokventeco de Neĝobulo ilin ĉiujn kunigis. Per brilaj frazoj li pentris bildon pri Besta Farmo, kia ĝi povus esti post kiam la laboraĵo estus levita de sur la bestaj dorsoj. Liaj imagoj nun transcendis pajlo- kaj beto-tranĉmaŝinojn. Elektro, ti diris, povus funkciigi draŝmaŝinojn, plugmaŝinojn, erpilojn, rulcilindrojn, falĉmaŝinojn kaj garbigilojn, krome provizante ĉiun stalon je propra elektra lumo, varmega kaj malvarma akvo, kaj elektra hejĵado. Ĝis la

fino de lia parolado ne plu ekzistis ajna dubo, al kiu la voĉoj estas donotaj. Sed ĝuste tiumomente Napoleono ekstaris kaj, ĵetante strangan flankrigardon al Neĝobulo, eligis alt-piĉan blekon, kian neniu iam ajn aŭdis de li.

Je tio ekaŭdiĝis ekstere terurega bojado, kaj ĵen enkuris naŭ grandaj hundoj kun lad-ornamitaj kolumoj. Ili kuris rekte al Neĝobulo, kiu saltis de sia loko ĝustatempe por eskapi de iliaj klakantaj buŝegoj. Post unu momento li jam estis tra la pordo, kaj ili lin persekutis. Tiel mirigitaj kaj timigitaj, ke ili ne povus paroli, ĉiuj bestoj iris al la pordo, por observi la persekutadon. Neĝobulo kuregis trans la longa paŝtejo al la strato. Li kuris tiel, kiel nur porko povas kuri, sed la hundoj estis proksimę de liaj kalkanoj. Subite li glitis, kaj ŝajnis certe ke li kaptiĝos. Tiam li estis denove surpiede, eĉ pli rapide kurante, kaj la hundoj denove proksimiĝis al li. Unu el ili preskaŭ fermis la buŝegon sur la vosto de Neĝobulo, sed Neĝobulo ĝuste ĝustatempe tiris ĝin el lia atingokampo. Post tio li plirapidigis sian kuradon, kaj, kelke da centimetroj antaŭ la hundoj, malaperis tra truo en la heĝo.

Silentaj kaj ege timigitaj, la bestoj reeniris la fojn-ejon. Post momento la hundoj revenis. Komence neniu povis imagi, de kie venas tiuj kreitoj, sed la demando estis baldaŭ solvita: tio estis la hundidoj, kiujn Napoleono prenis de iliaj patrinoj kaj mem edukis. Kvankam ili ne estis tute plenkreskintaj, la hundoj estis grandkorpaj kaj aspektis kiel ĵupoj. Ili restis proksime de Napoleono. Oni rimarkis, ke antaŭ Napoleono ili sammaniere svingas la voston, kiel faris iam la aliaj hundoj antaŭ s-ro Joanido.

Napoleono, sekvate de la hundoj, nun surpaŝis la levitan parton de la planko, kie Majoro siatempe staris por paroladi. Li anoncis ke la dimanĉmatenaj kunvenoj ekde tuj ĉesas. Ili ne estas necesaj, li diris, kaj

malŝparas tempon. Estonte, ĉiuj demandoj, rilataj al la laboro de la farmo estas pritraktotaj de speciala komitato de porkoj, de ti mem prezidota. Tiuj ĉi kunvenos private kaj poste komunikos siajn decidojn al la aliaj. La bestoj ankoraŭ kunvenados dimanĉmatene por saluti al la flago, kanti „Bestoj Anglaj“ kaj ricevi siajn ordonojn por la venonta semajno; sed debatoj ne plu estos.

Spite de la ŝoko de la elpeliĝo de Neĝobulo, la bestoj estis pro tiu ĉi anonco konsternitaj. Pluraj el ili protestus, se ili povus trovi taŭgajn argumentojn. Eĉ Boksulo estis iel maltrankviligita. Li retiris la orelojn, plurfoje skuis la fruntobuklon kaj penegis klarigi siajn pensojn; sed finfine li ne povis diri ion ajn dirindan. Tamen, kelkaj el la porkoj mem estis pli esprimopovaj. Kvar junaj porkidoj en la antaŭa vico eligis altajn tonojn de malaprobo, kaj ĉiuj kvar ekstaris kaj samtempe ekparolis. Sed subite la hundoj ĉirkaŭ Napoleono aŭdigis basan, minacan grumbladon, kaj la porkoj eksilentis kaj reeksidis. Tiam la ŝafoj komencis laŭtegan blekadon de „Kvarpiĉulo, jen bonulo; dupiĉulo -- malbonulo!“ kiu ĉirkaŭ unu horon daŭris kaj ĉian diskutadon malebligis.

Poste Kvikulo estis sendita tra la bieneto por ekspliki al la aliaj bestoj la novajn aranĝojn.

„Gekamaradoj“, li diris, „mi supozas, ke ĉiu ĉitiea besto dankemas pro la ofero, kiun alportas kamarado Napoleono, prenante sur sin tiun ĉi aldonan laboron. Ne imagu, gekamaradoj, ke estrado estas plezuro. Male, ĝi estas profunda kaj peza respondeco. Neniu kredas pli firme ol kamarado Napoleono, ke ĉiuj bestoj estas egalaj. Li estus ege kontenta permesi al vi, ke vi faru viajn proprajn decidojn. Sed vi povus iam fari malpravajn decidojn, kaj kia estus tiam nia stato? Imagu, se vi estus decidintaj sekvi Neĝobulon kun lia

freneza ventmuelilo – Neĝobulon, kiu, kiel ni nun scias, estas ne pli bona ol krimulo?”

„Li kuraĝe batalis en la Batalo de la Bovinejo”, asertis iu.

„Kuraĝo ne sufiĉas”, diris Kvikulo. „Lojaleco kaj oboe estas pli gravaj. Kaj koncerne la Batalon de la Bovinejo, mi opinias ke venos tempo, kiam ni konstatos la rolon de Neĝobulo ege troigita. Disĉiplino, gekamaradoj, fera disĉiplino! Jen la hodiaŭa devizo. Ĉe unu falsa paŝo, jen denove niaj malamikoj. Certe, gekamaradoj, vi ne deziras, ke revenu Jonaïdo?”

Denove tiu argumento estis nedisputebla. Komprenoble la bestoj ne deziris, ke revenu Jonaïdo; se la dimanĉmatena debatado povus lin revenigi, la debatado devas ĉesi. Boksulo, kiu nun havis sufiĉe da tempo por mediti, esprimis la ĝeneralan senton, dirante: „Se kamarado Napoleono ĝin diras, ĝi ja devas esti ĝusta.” Kaj ekde tiam li adoptis la maksimon „Napoleono ĉiam pravas” aldone al sia privata moto „Mi pli klopodos”.

Ĉirkaŭ tiu tempo la vetero ŝanĝiĝis kaj jam komenciĝis la printempa plugado. La remizo, kie Neĝobulo desegnis siajn planojn, estis ŝlosita, kaj oni supozis ke la desegnaĵoj estas forfrotitaj. Je la deka ĉiun dimanĉmatenon la bestoj kunvenadis en la granda fojnejo por ricevi siajn ordonojn por la semajno. La kranio de Olda Majoro, nun senkarniĝinta, estis elfosita el la fruktarbaro kaj ekspoziciata sur stumpo ĉe la piedo de la flagmast, apud la pafilo. Post la hiso de la flago la bestoj estis devigataj riverence pretermarŝi la kranion, antaŭ ol eniri la fojnejon. Ili ne plu sidis ĉiuj kune, kiel antaŭe. Napoleono, kun Kvikulo kaj alia porko nomita Minimo, kiu havis rimarkindan talenton de verkado de kantoj kaj poemoj, sidis antaŭe sur la platformo, la naŭ hundoj sidis en duoncirklo ĉirkaŭ ili, kaj la ceteraj porkoj sidis malantaŭe. Napoleono legis en bruska soldata stilo la semajnajn ordonojn, kaj post

unu sola elkanto de „Bestoj anglaj“, ĉiuj bestoj disiris.

La trian dimanĉon post la elpeliĝo de Neĝobulo, Napoleono iomete surprizis la bestojn anoncante, ke tamen estas konstruota la ventmuelilo. Kialojn li ne donis, sed simple avertis la bestojn, ke tiu ĉi aldona tasko postulos multege da laboro; povus eĉ esti necese redukti la manĝoporciojn. Sed la planoj estis preparitaj, ĝis la plej eta detalo. Speciala komitato de porkoj estis prilaborinta ilin dum la pasintaj tri semajnoj. Oni taksis, ke la konstruado de la ventmuelilo, kun diversaj aliaj plibonigoj, daŭros proksimume du jarojn.

Tiun vesperon Kvikulo private klarigis al la bestoj, ke Napoleono fakte neniam kontraŭis la ventmuelilon. Male, li mem la unua ĝin proponis, kaj la plano desegnita de Neĝobulo sur la planko de la kovilejo estis efektive ŝtelita el la dokumentaro de Napoleono. La ventmuelilo estis verdire kreaĵo de Napoleono mem. Kial, iu demandis, li do tiel forte kontraŭparolis ĝin? Je tio Kvikulo aspektis ege ruza. Tio, li asertis, estis la ruzo de kamarado Napoleono. Li ŝajnigis sin kontraŭ la ventmuelilo, simple kiel manovro por forigi Neĝobulon, kiu estis danĝera karaktero kaj malbona influo. Nun, depost Neĝobulo estas for, la plano povas sen ties enmiksiĝado antaŭeniri. Tio, Kvikulo klarigis, estas afero nomita taktiko. Li kelkfoje ĝin ripetis, „Taktiko, gekamaradoj, taktiko!“ saltetante kaj kun gaja rido svingetante per la vosto. La bestoj ne estis certaj, kion signifas la vorto, sed Kvikulo tiel persvade parolis, kaj la tri hundoj lin hazarde akompanantaj tiel minace grumblis, ke ili sen pluaj demandoj akceptis lian klarigon.

DUM TIU TUTA JARO la bestoj laboradis kvazaŭ sklavoj. Sed ili estis en sia laborado feliĉaj; volontege ili penadis kaj sin oferadis, bone sciante ke ĉio, kion ili faras, estas por ilia propra bono kaj tiu de iliaj samspedaj posteuloj, kaj ne por araĉo da maldiligentaj, ŝtelemegaj homoj.

Tra la printempo kaj somero ili laboris sesdek horojn ĉiusemajne, kaj en aŭgusto Napoleono anoncis, ke oni ankaŭ komencos labori dimanĉojn posttagmeze. Tiu laboro estis nur por voluntuloj, sed al tiuj, kiuj ne kunhelpis, la manĝoporcio estis reduktota je duono. Malgraŭ tio necesiĝis lasi kelkajn taskojn nefaritaj. La rikolto estis malpli sukcesa ol tiu de la pasinta jaro, kaj en du kampoj, en kiuj devis esti plantataj radiklegomoj, tio malebliĝis ĉar la plugado ne estis sufiĉe frue kompletigita. Estis antaŭvideble, ke la proksimiĝanta vintro estos malfacila.

La ventmuelilo prezentis neatenditajn malfacilaĵojn. La farmo havis bonan minejon de kalkŝtono, kaj en unu el la remizoj estis trovita abundo da sablo kaj cemento, tiel ke ĉiuj konstrumaterialoj estis je tuja dispono. Sed la por la bestoj en la komenco nesolvebla problemo estis, kiel disrompi la ŝtonegojn en uzeblajn pecojn. Ŝajne ne estis iu ajn rimedo por tion efektivigi, escepte hakfosiloj kaj levostangoj, kiujn la bestoj ne povis uzi, ĉar neniu besto kapablis stari sur la malantaŭaj piedoj. Nur post semajnoj de vana penado, al iu venis saviga ideo – nome la uzado de la forto de graviteco. Egaj ŝtonegoj, multe tro grandaj por esti uzataj en tia formo, kuŝis en la fundo de la kavigitejo. La bestoj ilin ĉirkaŭligis per ŝnuregoj, tiam ĉiuj kune, la bovinoj, la ĉevaloj, la ŝafoj, ĉiu besto kiu povis teni la ŝnuregon – eĉ kunhelpis de tempo al tempo, je krizaj momentoj, la porkoj – ili trenegis ilin malesperige lante supren sur la

deklivo, eksteren de la kavigitejo, de kies rando ili faligis ilin, tiel ke ili disrompiĝis malsupre. La transportado de la ŝtonegoj estis kompare simpla. La ĉevaloj ilin forportis en ĉaretoj, la ŝafoj trenis unuopajn pecegojn, eĉ Muriela kaj Benjamenio aljungis sin al malnova ĉaro kaj faris sian parton. Ĝis la malfruo de la somero estis amasigita sufiĉa provizo da ŝtonoj, kaj komenciĝis la konstruado, sub kontrolo de la porkoj.

Sed la procedo estis malrapida kaj laboregiga. Ofte estis necese uzi tutan tagon de laciga klopodado, por treni unusolan ŝtonegon ĝis la supro de la fosaĵo, kaj de tempo al tempo, ruligita en la profundon, ĝi tamen ne rompiĝis. Nenio estus efektivebla sen Boksulo, kies forto ŝajnis egali la kombinitan forton de ĉiuj bestoj. Se la ŝtonego komencis regliti, kaj la bestoj ekkriis malespere, vidante sin trenataj malsupren, estis ĉiam Boksulo, kiu sin streĉis kontraŭ la ŝnurego kaj haltigis la ŝtonon. Je la vido de li, prilaboreganta colon post colo de la deklivo, dum la eĝoj de liaj hufoj tranĉis la teron, kaj la haroj de liaj largaj flankoj pro ŝvitado feltiĝis, ĉiuj pleniĝis je admiro. Trifolia de tempo al tempo lin admonis, ne superstreĉi siajn fortojn, sed Boksulo neniam atentis. Liaj du sloganoj „Mi pli klopodos“ kaj „Napoleono ĉiam pravas“ ŝajnis al li sufiĉa solvo de ĉiaj problemoj. Li aranĝis kun la virkoko, ke ĉi tiu lin je tri kvaronhoroj, anstataŭ je duonhoru, pli frue veku. Kaj dum siaj liberaj momentoj, nun malmultaj, li iradis sola al la ŝtonejo, prenis ŝarĝon da rompitaj ŝtonoj kaj senhelpe ĝin trenis al la muelilsituo.

Spite al la pezo de la laboro la bestoj tiun someron ne malbone fartis. Se ili ne havis por manĝi pli ol dum la erao de Jonaido, almenaŭ ili ne havis malpli. La avantaĝo, esti devigata nur sin mem nutradi, kaj ne aldone kvin malŝparemajn homojn, estis tiel granda, ke ĝi povus esti superbalancita nur per serio de multaj malsukcesoj. Kaj la metodoj de la bestoj ofte estis pli

taŭgaj kaj laborŝparaj. Taskoj kiaj, ekzemple, la forigado de fiherboj, estis plenumebaj per ĝisfundeco por homoj nebla. Kaj krome, pro tio ke neniu besto plu ŝtelas, ne plu necesis havi barilojn inter paŝtejoj kaj kultivebla grundo, kio ŝparis multe da laboro pri heĝoj kaj pordegoj. Tamen eksentiĝis dum la pludaŭro de la somero diversaj mankoj. Estis bezonataj parafinoleo, najloj, ŝnuretoj, biskvitoj por la hundoj kaj fero por la hufoj de la ĉevaloj, de kiuj neniu estisprodukteblaj sur la farmo. Poste estis ankaŭ bezonataj semoj kaj artefaritaj sterkoj, krom certaj iloj kaj, fine, la maŝinaro por la ventmuelilo. Kiel ĉio ĉi estu akirata, neniu sciis.

Unu dimanĉan matenon, kiam la bestoj kunvenis por ricevi siajn ordonojn, Napoleono anoncis, ke li decidis novan politikon. Ekde nun Besto-Farmo interkomercados kun la najbaraj farmoj: kompreneble ne pro iuj ajn komercaj celoj, sed por havigi certajn urĝe bezonatajn materialojn. La konstruado de la ventmuelilo, li diris, supergravas ĉion ceteran. Li do aranĝas la vendadon de amaso da fojno kaj de parto de la ĉi-jara rikolto de tritiko, kaj poste, se estus bezonata pli da mono, tio estus elbilancigenda per la vendado de ovojn, por kiuj ĉiam estis merkato en Vilindono. La kokinoj, diris Napoleono, devus bonvenigi ĉi tiun oferon kiel sian propran specialan kontribuon al la konstruo de la ventmuelilo.

Denove la bestoj ekkonsciis malklaran necertecon. Neniaj internegocadi kun homoj, neniam komercadi, neniam uzi monon – ĉu ĉi tiuj ne estis unuj el la rezolucioj, akceptitaj dum tiu unua triumfa kunveno post la forpelo de Jonaido? Ĉiuj bestoj memoris la akcepton de tiaj rezolucioj: aŭ almenaŭ opiniis, ke ili memoras. La kvar junaj porkoj, kiuj protestis kiam Napoleono aboliciis la kunvenojn, timeme tevis la voĉon, sed ili abrupte eksilentis pro tremiga murmurego de la hundoj.

Tiam, kiel kutime, la ŝafoj eklekis, „Kvarpiedulo, jen bonulo!” kaj la momenta embaraso reordiĝis. Fine Napoleono levis antaŭpiedon, kiel signon eksilenti, kaj anoncis, ke li jam ĉion aranĝis. Ne necesus ke iu ajn el la bestoj entute havu kontaktojn kun la homoj, kio kompreneble estus plej maldezirinda. Li intencas preni la tutan ŝarĝon sur siajn proprajn ŝultrojn. Iu sinjoro Vimpero, advokato loĝanta en Vilindono, konsentiĝi agi kiel peranto inter Besto-Farmo kaj la ekstera mondo, kaj estis vizitonta la bieneton ĉiun lundon matene, por ricevi siajn instrukciojn. Napoleono finis sian paroladon per sia kutima krio „Vivu Besto-Farmo!” kaj post la himno „Bestoj anglaj” la bestoj estis rajtigataj foriri.

Poste Kvikulo vizitis bestojn en ĉiuj partoj de la farmo kaj trankviligis ilian menson. Li certigis ilin, ke la rezolucio kontraŭ komercado kaj monuzado neniam akceptiĝis, nek eĉ iam ajn sugestiĝis. Ĝi estis pura fantazio, verŝajne deveninta de mensogoj disvastigitaj de Neĝobulo. Kelkaj el la bestoj ankoraŭ dubetis, sed Kvikulo ilin ruze demandis: „Ĉu vi estas certaj, gekamaradoj, ke vi tion ne revis? Ĝu vi posedas dokumenton pri tia rezolucio? Ĉu ĝi estis je ajn skribita?” Kaj pro tio, ke certe ne ekzistas io tia skribita, la bestoj konvinkiĝis, ke ili eraras.

Ĉiun lundon sinjoro Vimpero, kiel aranĝite, vizitadis la bieneton. Li estis ruzaspekta viro, malgranda, kun vang-haroj, advokato malgrand-skala, sed sufiĉe inteligenta, ke li komprenis antaŭ ol ĉiuj aliaj, ke Besto-Farmo iam bezonos peranton, kaj la procentaĵoj havos ioman valoron. La bestoj observis kun ia timo lian ir- kaj revenadon, kaj laŭeble evitis lin. Tamen la vido de Napoleono, kvarpiedulo, ordonanta al Vimpero, dupiedulo, fierigis ilin kaj parte helpis al ili rezigne akcepti la novan aranĝon. Iliaj rilatoj kun la homoj ne plu estis la samaj kiel antaŭe. La homoj mem neniel malpli malamis Besto-Farmon en ĝia nuna prosperado;

ili ja pli ol antaŭe ĝin malamis. Ĉiu homo estis estinta absolute certa, ke la farmo pli-malpli baldaŭ bankrotiĝos, kaj, plejgrave, ke la ventmuelilo malsukcesos. Ili kunvenadis en trinkejoj kaj pruvadis unu al la alia per desegnaĵoj, ke la ventmuelilo nepre kolapsos, aŭ se ĝi ne kolapsos, ĝi tamen neniam funkcios. Kaj tamen, kontraŭvole, ili evoluigis al si certan respekton por la efikeco, per kiu la bestoj gvidis siajn proprajn aferojn. Unu indico pri tio estis ke ili komencis nomi Besto-Farmon per ĝia ĝusta nomo kaj ĉesis insisti, ke ĝi nomiĝu Nobeldoma Farmo. Ili ankaŭ lasis sian defendadon de Jonaido, kiu perdis ĉiun esperon, reakiri sian bieneton kaj foriris por loĝi en alia regiono. Kun la escepto de Vimpero ekzistis ankoraŭ neniu kontakto inter Besto-Farmo kaj la ekstera mondo, sed konstante onidiradis, ke Napoleono faros definitivan komercakordon aŭ kun sinjoro Pilkintono de Vulpoboska Farmo aŭ kun sinjoro Frederiko de Pinĉokampa Farmo – sed neniam, oni rimarkis, kun ambaŭ samtempe.

Guste ĉirkaŭ tiu tempo la porkoj subite ekloĝis la mastrodomon. Denove la bestoj memoris, ke akceptiĝis en la frua tempo rezolucio kontraŭ tio, kaj denove Kvinkulo povis ilin konvinki, ke tio ne veras. Absolute necesas, li asertis, ke la porkoj, la cerbo de la farmo, havu trankvilan lokon por labori. Ankaŭ pli konvenis al digno de la estro (ĉar li lastatempe eknomadis Napoleleon per la titolo „estro“), ke li loĝu en domo anstataŭ en nura porkejo. Tamen, kelkaj el la bestoj maltrankviliĝis, aŭdinte ke la porkoj ne nur prenadas siajn manĝojn en la kuirejo kaj uzas la salonon kiel amuzejon, sed ankaŭ dormas en la litoj. Boksulo laŭkutime tion ignoris, dirante, „Napoleono ĉiam pravas!“ Sed Trifolia, opiniante ke ŝi memoras specifan regulon kontraŭ litoj, iris al la fojnejo kaj penis malenigmigi la Sep Ordonojn tie enskribitajn. Ne povante pli multe legi ol unuopaj literoj, ŝi venigis Murielan.

„Muriela” – ŝi diris – „legu al mi la Kvaran Ordono. Ĉu ĝi ne malpermesas ajnan dormadon en lito?”

Kun iom da malfacileco Muriela literon post litero ĝin tralegis:

Ĝi ordonas: „Neniu besto dormu en lito kun litotuko”, ŝi fine anoncis.

Strange, Trifolia ne memoris, ke la Kvara Ordono mencias litotukojn; sed, ĉar jen ĝi estis sur la muro, devas esti ke ĝi ilin menciis. Kaj Kvikulo, kiu hazarde ĝuste je tiu momento pasis, akompanate de du-tri hundoj, sciis starigi la aferon en klarigan lumon.

„Vi do aŭdis, kamaradinoj,” li diris „ke ni porkoj nun dormas en la litoj de la mastrodomo. Kaj kial ne? Certe vi ne imagas, ke ekzistas regulo kontraŭ litoj? La vorto lito signifas simple loko por dormi. Amaso da fojno en stalo estas lito, en strikta senco. La regulo estas kontraŭ litotukoj, homa inventaĵo. Ni forigis litotukojn de la litoj en la mastrodomo, kaj dormas inter la litkovraĵoj. Kaj komfortaj litoj ili estas, kamaradinoj! Sed ne pli komfortaj ol ni bezonas, tion mi povas atesti, konsiderante nian ĉiaman nunan ĉerbumadon. Vi ja ne rabus al ni nian ripozon, ĉu, kamaradinoj? Vi ne deziras, ke ni estu tro lacaj por plenumi nian devon? Certe neniu el vi ambaŭ deziras la revenon de Jonaido?”

La bestoj recertigis lin pri tio kaj nenio pli estis dirata pri la dormado de la porkoj en la litoj. Kaj kiam post kelke da tagoj anonciĝis, ke ekde tuj la porkoj ellitiĝos ĉiumatene unu horon malpli frue ol la aliaj bestoj, pri tio ankaŭ neniu plendis.

Ĝis aŭtuno la bestoj estis lacaj sed kontentaj. Ili estis travivintaj malfacilan jaron, kaj post la vendo de parto de la fojno kaj greno la manĝoprovizoj por la vintro ne estis ege multaj, sed la ventmuŝelilo ĉion rekompencis. Post la rikolto estis periodo de klara, seka vetero, kaj la bestoj laboris pli diligente ol iam, opini-

ante ke valoras la tutan tagon trenadi ŝtonegojn, se tio efektivigus eĉ malgrandan plialtiĝon de la muroj. Boksulo eĉ nokte eliradis, laborante unu-du kromhorojn en la radioj de la aŭtuna luno. Dum siaj liberaj momentoj la bestoj ĉirkaŭiradis la muelejon, admirante la fortecon kaj vertikalecon de ĝiaj muroj, kaj mirante, ke ili entute povus konstrui ion tiel imponan. Nur la maljuna Benjamenino rifuzis entuziasmiĝi pri la ventmuelilo, kvankam, kiel normale, li nenion diris escepte la strangan rimarkigon ke azenoj longe vivas.

Venis novembro, kun furiozaj sud-okcidentaj ventoj. La konstruado devis esti ĉesigita, ĉar estis tro malseke por la mikado de cemento. Fine venis nokto kiam la ventego estis tiel forta, ke la konstruaĵoj ŝanceliĝis sur siaj fundamentoj, kaj kelke da tegoloj forbloviĝis de la fojnejo. La kokinoj vekiĝis kun terura klukaĉado, ĉar ili ĉiuj samtempe sonĝis pri distanca pafo. La sekvan matenon la bestoj, forlasante siajn lokojn, trovis la flagmaston faligita de la vento, kaj ulmon ŝe la rando de la fruktarbareto elflikita kiel rafaneto. Ili estis ĵus rimarkintaj tion, kiam krio de malespero saltis el la gorĝo de ĉiu. Terura vidaĵo trafis iliajn okulojn. La ventmuelilo estis ruino.

Unuanime ili rapidis al la loko. Napoleono, kiu malofte pli rapide moviĝis ol normala iro, kuris antaŭ ĉiuj. Jes, jen ĝi kuŝis, la frukto de ilia luktado, faligita al la nivelo de sia fundamento – la ŝtonoj, kiujn ili tiel penegre rompis kaj altrenis, kuŝis dise ĉirkaŭe. Komence, ne povante paroli, ili funebre rigardis la falintan ŝtonan rubaĵon. Napoleono silente paŝadis tien kaj reen, de tempo al tempo flarante la teron. Lia vosto estis rigidiĝinta kaj vipetis akre de flanko al flanko, signo ĉe li de intensiva mensa aktiveco. Subite li haltis, kvazaŭ li ion decidis.

„Gekamaradoj“, li diris kviete, „ĉu vi scias kiu estas la malamiko kiu nokte venis kaj faligis nian vent-

muelilon? Neĝobulo!" – li subite per tondra voĉo muĝis. „Neĝobulo ĉi tion faris! Pro pura malico, pensante ke li malprogresigos niajn planojn kaj venĝos sin pro sia malglora elpeliĝo, tiu perfidulo venaĉis, kaŝita de la nokto, kaj detruis nian laboron de preskaŭ unu jaro. Gekamaradoj, mi jene kaj nune deklaras la mortpunon por Neĝobulo. Tiu besto, kiu lin liveros al la justeco, ricevos la ordenon de „Besta Heroo, Dua Klaso“ kaj duon-buŝelon da pomoj. Kiu lin kaptos viva ricevos tutan buŝelon!”

La bestoj estis neelmezureble ŝokitaj, lerninte, ke eĉ Neĝobulo kapablas fari ion tian. Leviĝis indigna krio, kaj ĉiuj komencis plani, kiel kapti Neĝobulon, se li revenos. Preskaŭ tuj la piedspuroj de porko estis trovitaj en la herbo, ne malproksime de la malgranda monteto. Ili estis sekveblaj nur kelke da metroj, sed ŝajne kondukis al truo en la heĝo. Napoleono profunde priflaregis ilin, kaj anoncis ke ili estas de Neĝobulo. Li opiniis ke Neĝobulo verŝajne venis el la direkto de Vulpoboska Farmo.

„For la hezitado, gekamaradoj!“ diris Napoleono post la esplorado de la piedspuroj. „Farendas laboro! Ĉimatenes tuj ni komencos la rekonstruadon de la ventmuelilo, kaj ni konstruados dum la tuta vintro, ĉu pluvos, ĉu sunas. Ni montros al tiu mizera perfidulo, ke li ne tiel facile povas detrui nian laboron. Memoru, gekamaradoj, devas esti neniuj ŝanĝoj en niaj planoj! Ili akurate plenumiĝos. Antaŭen, gekamaradoj! Vivu la ventmuelilo! Vivu Besto-Farmo!”

TIO ESTIS AMARA vintro. La ŝtorma vetero estis sekvata de neĝo, kaj post tio de fortega frosto, kiu ne ĉesis ĝis longe post la komenco de februaro. La bestoj laŭpove daŭrigis la konstruadon de la ventmuelilo, bone konsciente, ke la ekstera mondo ilin observas kaj ke la enviemaj homoj ĝojus kaj jubilus, se la muelilo ne estus ĝustatempe finkonstruita.

Pro spito la homoj afektis ne kredi, ke Neĝobulo estas la detruinto de la ventmuelilo: Ili asertis, ke ĝi pro tio disfalis, ĉar la muroj estis tro maldikaj. La bestoj sciis, ke tio estas malvero. Tamen decidiĝis, ke ilia dikeco estu ĉifoje duobligita, tiel ke necesis kolekti multe pli grandajn kvantojn da ŝtonoj. Dum longa tempo la ŝtonejoj estis plenaj je neĝo, kaj nenio estis farbla. Fariĝis iom da progreso dum la seka frost-vetero kiu sekvis, sed la laboro estis kruela, kaj la bestoj ne povis esti tiel esperemaj kiel antaŭe. Ili ĉiam frostis, kaj ili normale ankaŭ malsatis. Nur Boksulo kaj Trifolia neniam perdis la kuraĝon. Kvikulo prezentis bonegajn prelegojn pri la ĝojo de l' servado kaj la digno de laborado, sed la aliajn bestojn pli inspiris la forto de Boksulo kaj lia ĉiama krio „Mi pli klopodos!”

En januaro la kvanto da nutraĵoj malmultiĝis. La porcioj da greno draste reduktiĝis, kaj estis anoncita, ke ĉiu ricevos ekstran porcion da terpomoj por tion kompensi. Tiam oni konstatis, ke la pli granda parto de la terpom-rikolto estis frostiĝinta, ĉar ne sufiĉe bone kovrita. La terpomoj estis molaj kaj malbonkoloraj, kaj nur kelkaj esis manĝeblaj. Dum tutaj tagoj la bestoj havis nenion escepte de hakita fojno kaj rapabetoj por manĝi. Ŝajne staris vidavide al ili la malsatmorto.

Estis nepra, ke ĉi-fakto estu kaŝata de la ekstera mondo. Pro la detruigo de la venmuelilo kuraĝigitaj, la homoj inventadis freŝajn mensogojn pri Besto-Farmo.

Denove cirkulis famoj, asertantaj ke ĉiuj bestoj mortas pro malsato kaj malĝano, daŭre interbataladis kaj komencis praktiki kanibalismon kaj infanmurdadon. Napoleono bone konsciis pri la malbonaj rezultoj povantaj sekvi, se la veraj faktoj pri la nutrada situacio sciigus, kaj li decidis eluzi sinjoron Vimperon por la disvastigado de mala impresio. Ĝis tiam la bestoj havis malmultan aŭ entute neniun kontakton kun Vimpero dum ties ĉiusemajnaj vizitoj: sed nun kelkaj elektitaj, ĉefe ŝafoj, ricevis instrukcion, neglekte tiel menciis, ke li aŭdu, ke la porcioj estas pligrandigitaj. Krome, Napoleono ordonis, ke la preskaŭ malplenaj grenujoj en la provizejo estu plenigitaj preskaŭ ĝissupre per sablo, kiun oni poste kovris per la restinta greno. Pro iu konvena preteksto Vimpero estis kondukita tra la remizo, por ke li „hazarde“ vidu la grenujojn. Li trompiĝis, kaj daŭrigis siajn raportojn al la ekstera mondo pri tio, ke ne estas malsufiĉo da nutraĵoj ĉe Besto-Farmo.

Tamen, ĉirkaŭ la fino de januaro evidentiĝis, ke estos necese havigi de ie pli da greno. Dum tiu tempo Napoleono malofte operadis en la publiko, ĉiam restante en la mastrodomo, ĉe ĉiu pordo gardata de la hundoj. Kiam ajn li tamen eliris, li tion faris ceremonie, kun eskorto de ses hundoj, kiuj lin ĉirkaŭis kaj grumbliis, se iu ajn tro proksimiĝis. Ofte li eĉ dimanĉmatene ne aperis, sed sendis siajn ordonojn pere de aliaj porkoj, normale pere de Kvikulo. Unu dimanĉmatenon Kvikulo anoncis, ke la kokinoj, ĝuste venintaj por denove meti ovojn, devos siajn ovojn oferi. Napoleono estis pere de Vimpero akceptinta kontrakton pri kvarcent ovoj po semajno. La prezo de ili sufiĉus por vivteni la farmon ĝis la somero, kiam la kondiĉoj estos pli bonaj.

Tion aŭdinte, la kokinoj komencis teruran vekriadon. Oni estis jam ilin avertinta, ke tiu mezuro eble necesiĝos, sed ili ne kredis ke tio vere okazos. Ili ĝuste

estis preparantaj sian kovaĵon por la printempa kovado, kaj protestis, ke nuna forpreno de la ovoĵ estas murdo. Por la unua fojo depost la forpelo de Jonaĵdo, estis io simila al ribelo. Estrate de tri kokinetoj de la nigra-minorka raso, la kokinoj obstine klopodis malhelpi la plenumadon de la deziroj de Napoleono. Ilia metodo estis, flugi sur la traboĵn kaj tie meti siajn ovoĵn, kiuj falis kaj disrompiĝis sur la tero. Napoleono rapide kaj senkompate agis. Li ordonis reteni la porcion de la kokinoj, dekretante, ke iu ajn besto, donanta eĉ unu graĵnon da greno al kokino, suferu la mortpunon. Pri la plenumado de la ordonoj zorgis la hundoj. Kvin tagoĵn la kokinoj eltenis, tiam ili kapitulaciis kaj reiris al siaj nestoskatoloj. Intertempe naŭ kokinoj estis mortintaj. Oni enterigis ilin en la fruktarbaro kaj cirkuligis informon, ke ili mortis pro malsano. Vimpero eksciis pri tiu ĉi afero nenion, kaj la ovoĵ estis kiel interkonsentite liveritaj – ŝarĝaŭtomobilo de magazeno de vivrimedoj ĉiusemajne venadis por ilin preni.

Neĝobulo dum tiu tuta tempo ne plu estis vidata. Laŭrakonte li kaŝe loĝis ĉe unu el la najbaraj farmoj, aŭ ĉe Vulpoboska Farmo aŭ ĉe Pinĉokampa Farmo. Napoleono nun havis pli bonajn rilatojn ol antaŭe kun la aliaj farmistoj. Hazarde estis en la korto staplo da ligno, antaŭ dek jaroj tie stapligita, kiam estis faligita densejo de betuloj. Ĝi estis bone maturiĝinta, kaj Vimpero konsilis al Napoleono ĝin vendi; kaj sinjoro Pilkintono kaj sinjoro Frederiko urĝe deziris ĝin aĉeti. Napoleono hezitis inter ambaŭ, ne volante decidi. Rikarikiĝis ke, ĝuste kiam li ŝajnis esti preta kun Frederiko interkonsenti, anonciĝis ke Neĝobulo estas ĉe Vulpoboska Farmo kaŝita, kaj kiam li iomete al Pilkintono inkliniĝis, onidiriĝis, ke Neĝobulo estas ĉe Pinĉokampa Farmo.

Subite, komence de l' printempo, eksciĝis terura fakto. Neĝobulo dumnokte sekrete frekventadis la far-

mon! La bestoj estis tiel ekscititaj, ke ili apenaŭ povis dormi. Ĉiunokte, oni diris, li elglitadis, kaŝite de la malhelo, kaj faris ĉiuspecajn friponaĵojn. Li ŝtelis la grenon, li elŝutis la lakton, li rompis la ovojn, li piedobatis la sem-bedojn, li demordis la ŝelon de la fruktarboj. Oni kutimis kulpigi Neĝobulon, kiam ajn io malbone funkciis. Se estis fenestro rompita aŭ defluejo ŝtopita, senescepte iu diris, ke venis Neĝobulo dum la nokto kaj faris tion; kaj kiam perdiĝis la ŝlosilo de la provizejo, la tuta farmo estis konvinkita, ke Neĝobulo ĝin ĵetis en la puton. Tiu konvinko strange persistis eĉ post kiam la mismetita ŝlosilo estis trovita sub sako de faruno. La bovinoj unuanime deklaris, ke Neĝobulo ŝtele eniris ilian stalon kaj melkis ilin dum ili dormis. La ratojn, kiuj dum la pasinta vintro kaŭzis sufiĉe da ĉagreno, oni sukpektis pri kunlaborado kun Neĝobulo.

Napoleono dekretis, ke estu funda esploro pri la agoj de Neĝobulo. Akompanate de siaj hundoj, li zorge faris inspekt-rondiron de farma domaro, kaj la aliaj bestoj sekvis respektoplene je inda distanco. Post ĉiu dua-tria paŝo Napoleono haltis kaj flaris la teron por detekti per (li asertis) laodoro, la piedspurojn de Neĝobulo. Li flaris en ĉiu angulo, en la fojnejo, en la bovinejo, en la kokinejoj, en la legomo-ĝardeno, kaj li trovis preskaŭ ĉie spurojn de Neĝobulo. Li proksimigis sian nazegon al la tero, plurfoje profunde flaris, kaj deklaris per terura voĉo, „Neĝobulo! Li estis ĉi tie! Mi flaras lin klare!“ kaj je la vorto „Neĝobulo“, ĉiuj hundoj eligis sangofrostigan grumbladon kaj montris la flankajn dentojn.

La bestoj estis plene terurigitaj. Ŝajnis al ili, ke Neĝobulo estas iu nevidebla influo, pleniganta la aeron ĉirkaŭ ili kaj per ĉiaj danĝeroj minacanta ilin. Vespere Kvikulo ilin kunvokis kaj kun zorgoplena mieno diris al ili, ke li havas seriozan novaĵon por raporti.

„Gekamaradoj!“, kriis Kvikulo, farante nervecajn saltetojn, „estas malkovrita plej terura afero. Neĝobulo sin vendis al Frederiko de Pinĉokampa Farmo, kiu nun jam planas nin ataki kaj forpreni nian farmon! Neĝobulo estas agonta kiel lia gvidanto; kiam la atako komencos. Sed estas io eĉ pli malbona. Ni opiniis ke la ribelo de Neĝobulo estas kaŭzita de liaj vanteco kaj ambicio. Sed ni malpravis, gekamaradoj. Ĉu vi scias la veran kaŭzon? Neĝobulo jam de la komenco estis aliancano de Jonaĉo! Li estis dum la tuta tempo sekreta agento de Jonaĉo. Ĉio estas pruvita pere de dokumentoj, kiujn li postlasis kaj kiujn ni ĵus malkovris. Tio klarigas al mi multon, gekamaradoj. Ĉu ni ne mem vidis kiel li provis – feliĉe nesukcese – malvenkigi kaj detrui nin dum la Batalo de la Bovinejo?“

La bestoj estas mutigitaj. Tio estis friponaĵo, kiu multe transiris la de Neĝobulo efektivigitan detruon de la ventmuelilo. Daŭris kelke da minutoj ĝis ili povis ĝin tute akcepti. Ili ĉiuj memoris, aŭ opiniis ke ili memoras, kiel ili vidis Neĝobulon sturmantan antaŭ si dum la Batalo de la Bovinejo, kiel li reunuigis kaj kuraĝigis ilin dum la tuta afero, kaj kiel li eĉ ne unu minuton paŭzis, eĉ kiam vundis lian dorson la kugloj de Jonaĉo. Estis komence sufiĉe malfacile kompreni, kiel tio al Jonaĉo helpis. Eĉ Boksulo, kiu malofte fariĝis demandojn, estis konsternita. Li ekkruŝis, faldis la antaŭhufojn sub la bruston, fermis la okulojn, kaj per forta peno sukcesis organizi siajn pensojn.

„Tion mi ne kredas“, li diris. „Neĝobulo kuraĝe batalis dum la Batalo de la Bovinejo. Mi mem lin vidis. Ĉu ni tuj poste ne donis al li la ordenon ‚Besta Heroo, Unua Grado‘?“ „Tio estis nia eraro, kamarado. Ĉar ni nun scias – ĉio estas skribita en la sekretaj dokumentoj, kiujn ni trovis – ke li fakte klopodis nin logi al nia ruiniĝo!“

„Sed li estis vundita“ – diris Boksulo. „Ni ĉiuj vidis kiel li sangas.“

„Tio estas parto de la aranĝo!“ Kvikulo kriis. La pafado de Joanido lin nur gratis. Mi povus tion al vi montri en lia propra manskribo, se vi povus ĝin legi. La fiplano estis, ke Neĝobulo je la decida momento donu la signalon por fuĝo kaj lasu al la malamiko la kampon. Kaj li preskaŭ sukcesis – mi diros eĉ, gekamaradoj, ke li estus sukcesinta, se ne estus interveninta nia heroo estro, kamarado Napoleono. Ĉu vi nun ne plu memoras kiel, je tiu momento kiam Jonaido kaj liaj dungitoj eniris la korton, Neĝobulo subite sin turnis kaj fuĝis, kaj multaj bestoj lin sekvis? Kaj ĉu vi ne ankaŭ memoras, ke ĝuste je tiu momento kiam la paniko estis kreskanta kaj ĉio ŝajnis perdita, kamarado Napoleono saltis antaŭen kun krio „Morton al la homaro!“ kaj penetrigis siajn dentojn en la gambon de Jonaido? Certe vi tion memoras, gekamaradoj?“ – diris Kvikulo, saltetante de flanko al flanko.

Nun, kiam Kvikulo tiel klare priskribis la scenon, ŝajnis al la bestoj, ke ili efektive rememoras. Ĉiukaze ili rememoris, ke Neĝobulo je la decida momento de la batalo sin turnis kaj fuĝis. Sed Boksulo ankoraŭ ne estis certa.

„Mi ne kredas ke Neĝobulo dekomence estis perfidulo“, li fine diris. „Tio kion li poste faris estas alia afero. Sed mi kredas, ke dum la Batalo de la Bovinejo li estis bona kamarado.“

„Nia estro, kamarado Napoleono“, anoncis Kvikulo, parolante tre malrapide kaj firme, „kategorie deklaris – kategorie, kamarado – ke Neĝobulo jam de la komenco mem estis agento de Jonaido; jes, kaj eĉ longe antaŭ ol la revolucio estis konceptita.“

„Ha, tio estas alia afero!“, diris Boksulo. „Se kamarado Napoleono tion diras, ĝi devas esti vera.“

„Tio estas la ĝusta spirito, kamarado!“, reagis Kvinkulo, sed rimarkiĝis, ke li per siaj briletantaj okuloj ĵetis tre malfavoran rigardon al Boksulo. Li turnis sin por iri, tiam haltis kaj impone aldonis: „Mi admonas ĉiujn bestojn de tiu ĉi farmo esti ege observemaj. Ĉar ni havas kaŭzon kredi, ke eĉ ĉi-momente embuskas inter ni sekretaj agentoj de Neĝobulo!“

Kvar tagojn pli poste, en la posttagmeza tardo, Napoleono ordonis al ĉiuj bestoj, kunveni en la korto. Kiam ĉiuj estis kunvenintaj, Napoleono eliris el la mastrodomo, portante ambaŭ siajn ordenojn (ĉar li estis lastatempe premiinta sin per „Besta Heroo, Unua Grado“ kaj „Besta Heroo, Dua Grado“), kun siaj naŭ hundegoj, kiuj kuretadis ĉirkaŭ li kaj grumbladis, tiel ke tremis la spinoj de ĉiuj bestoj. Ĉiuj silente kaŭris sur siaj lokoj, kvazaŭ antaŭsciante, ke estas okazonta io terura.

Napoleono staris severe superrigardante sian aŭdantaron; tiam li eligis altpiĉan ĝemon. Senhezite la hundoj saltis antaŭen, kaptis per la orelo kvar el la porkoj, kaj trenis ilin, pro doloro kaj teruro vegruntantaj, antaŭ la piedojn de Napoleono. La oreloj de la porkoj sangis, la hundoj estis gustumintaj la sangon, kaj dum kelke da minutoj ili ŝajnis tute freneziĝintaj. Je ĉies konsterniĝo, tri el ili ĵetis sin sur Boksulon. Boksulo vidis ilin veni, kaptis unu el la hundoj en la aero, kaj premis ĝin al la tero. La hundo kriaĉis ĝis kompatelvoko kaj la aliaj du fuĝis kun la vosto inter la gamboj. Boksulo rigardis Napoleonon por sciiĝi ĉu li mortpremu aŭ liberigu la hundon. La mieno de Napoleono ŝanĝiĝis, kaj li akre ordonis al Boksulo, ke li liberigu la hundon, je kio boksulo levis la hufon, kaj la hundo forrampis, lezita kaj hurlanta.

Iom post iom la tumulto trankviliĝis. La kvar porkoj atendis, tremante, kun kulpo skribita sur la tuta vizaĝo. Tio estis la samaj porkoj, kiuj protestis kiam Na-

poleono abolis la dimanĉajn kunvenojn. Sen plua urĝado ili konfesis, ke ili estis ekde la elpelo de Neĝobulo sekrete en konstanta kontakto kun li, ke ili kunlaboris kun ti je la detruo de la ventmuelilo, kaj ke ili interkonsentis kun li transdoni al sinjoro Frederiko Besto-Farmon. Ili aldone diris, ke Neĝobulo private konfesis al ili, ke li estis jam dum jaroj sekreta agente de Jonaido. Kiam ili finis sian konfeson, la hundoj akurate elŝiris iliajn gorgojn, kaj per teruriga voĉo Napoleono demandis, ĉu iu alia besto havas ion por konfesi.

La tri kokinoj kiuj estis la estrintoj de la provita ribelo pro la ovoj, nun venis kaj deklaris, ke Neĝobulo estis aperinta al ili en sonĝo kaj instigis ilin, malobei la ordonojn de Napoleono. Ilin oni ankaŭ buĉis. Poste venis anserino kaj konfesis, ke ŝi kaŝis dum la pasintjara rikolto ses spikojn da greno, kaj manĝis ilin dum la nokto. Tiam ŝafino konfesis, ke ŝi – laŭ urĝado de Neĝobulo – urinis en la trink-lageton; kaj du aliaj ŝafinoj konfesis la murdon de maljuna virŝafo, aparte sindona disĉiplo de Napoleono, lin persekutadante ĉirkaŭ kampad-fajrego dum li suferis pro tusado. Ĉiuj estis surloke mortigitaj. Tiel la konfesado kaj ekzekutado daŭrigis, ĝis kuŝis antaŭ piedoj de Napoleono amaso da kadavroj, kaj la aero estis densa pro laodoro de sango, kio depost la forpelo de Jonaido tie neniam estis spertita.

Kiam tio estis finita, la ceteraj bestoj, escepte de la porkoj kaj hundoj, foriris en amaso. Ili estis ŝokitaj kaj mizeraj. Ili ne sciis, kio estas pli ŝoka – la perfido de la bestoj, kiuj kunlaboris kun Neĝobulo, aŭ la kruela puno kiun ili ĵus atestis. En la malnova tempo estis estintaj scenoj de sangoverŝado same teruraj, sed ŝajnis al ili ĉiuj, ke estas multe pli terura nun, kiam ĝi okazas inter ili mem. Depost Jonaido forlasis la farmon, neniu besto estis mortiginta alian beston. Eĉ ne rato estis mortigita. Ili iris al la monteto kie staris la duon-konstruita

ventmuelilo, kaj unuanime ili ekkuŝis, kyazaŭ kunkuŝante, por akiri la varmon unu de alia – Trifolia, Muriela, Benjameno, la bovinoj, la ŝafoj, kaj tuta aro da anserinoj kaj kokinoj – ja ĉiuj escepte la katino, kiu estis subite malaperinta, ĝuste antaŭ ol Napoleono ordonis la kunveniĝon de la bestoj. Dum ioma tempo neniu parolis. Nur Boksulo restis staranta. Li moviĝadis tien kaj reen, viŝante la flankojn per sia longa, nigra vosto, kaj de tempo al tempo lasante heneton de surprizo. Fine li diris:

„Mi ne komprenas. Mi ne estus kredinta, ke tiaj eventoj povus okazi sur nia farmo. Devas esti pro iu nia manko. La solvo, kiel mi ĝin imagas, estas: pli klopodi. Ekde nun mi, ellitiĝos ĉiumatene unu hoŝon pli frue.“

Kaj li foriris laŭ sia maleleganta trotmaniero direkte al la ŝtonejo. Alveninte li kolektis sinsekve du ŝarĝojn da ŝtonoj kaj trenis ilin al la ventmuelilo, antaŭ ol iri dormi.

La bestoj premis sin al Trifolia, senparole. La monteto sur kiu ili kuŝis donis al ili larĝan vidon trans la pejzaĝo. La plimulto de Besto-Farmo estis en ilia vid-kampo – la longa paŝtejo etendiĝanta ĝis la ĉefŝoseo, la fojno-kampo, la vepraro, la trinklageto, la plugitaj kampoj, kie la juna tritiko estis densa kaj verda, kaj la ruĝaj tegmentoj de la farma domaro kun la fumo bukliganta el la kamentuboj. Estis klara printempa vespero. La herbo kaj la ekvastiĝantaj heĝoj estis orumataj de la ebenaj radioj de la suno. Neniam la farmo – kaj kun ia surprizo ili ekrememoris, ke ĝi estas ilia propra farmo, ĉiu centimetro ilia propra posedaĵo – ŝajnis al ili tia dezirinda loko. Dum Trifolia malsupren rigardis laŭ la inklino de la monteto, ŝiaj okuloj pleniĝis je larmoj. Se ŝi estus povinta esprimi siajn pensojn, tio estus por diri, ke tio ĉi ne estas jeno, kion ili celis, decidintaj antaŭ tri jaroj labori por la faligo de la homaro. Tiuj ĉi scenoj de teroro kaj buĉado ne estas jeno, kion ili tiun

vesperon anticipis, kiam Olda Majoro ilin la unuan fojon agitis al revolucio. Se ŝi mem havis iun imagon pri la estonteco, tiu estis pri societo de bestoj liberigitaj de malsato kaj vipoj, ĉiuj egalaj, ĉiu laboranta laŭ sia kapablo, la fortaj protektantaj la malfortajn, same kiel ŝi protektis la lastan anasidaron je la vespero de la parolado de Majoro. Anstataŭe — ŝi ne sciis kial — venis tempo, kiam neniu kuraĝas diri sian opinion, kiam grumblantaj hundoj ĉie vagadas, kaj kiam oni devas observi, kiel la propraj gekamaradoj disŝiriĝas post konfeso de ŝokaj krimoj. Ne estis en ŝia menso pensoj pri revolucio aŭ pri malobeco. Ŝi konsciis, ke eĉ se la situacio estas tia, oni tamen pli bone fartas ol en la tempo de Jonaido, kaj ke antaŭ ĉio estis necese malhelpi la revenon de la homoj. Sed tio malgraŭe ne estis jena, por kio ŝi kaj la aliaj bestoj estis esperintaj kaj laborintaj. Ne por tio ili konstruis la ventmuelilon kaj kontraŭstaris la kuglojn el la pafiloj de Jonaido. Tiaj estis ŝiaj pensoj, kvankam al ŝi mankis la vortoj por ilin esprimi.

Finfine, sentante ke tio estas iel anstataŭaĵo por la vortoj, kiujn ŝi ne povis trovi, ŝi komencis kanti „Bestoj Anglaj“. La aliaj bestoj ĉirkaŭ ŝi komencis kunkanti, kaj ili ĝin trifoje kantis — tre melodie, sed lante kaj melankolie, laŭ tute nova maniero.

Ili estis ĝuste finantaj ĝin la trian fojon kiam Kvikulo, akompanate de du hundoj, alproksimiĝis kun maniero kiu indikis, ke li volas diri ion gravan. Li anoncis ke per speciala dekreto de Napoleono „Bestoj Anglaj“ estas abolita. Ekde tuj estis malpermesite ĝin kanti.

La bestoj estis ŝokitaj.

„Kial?“ kriis Muriela.

„Ĝi ne plu estas bezonata, kamaradino“, Kvikulo diris malmol-voĉe. „„Bestoj Anglaj“ estis la kanto de la revolucio. Sed la revolucio estas nun efektivigita. La ekzekutigo de la perfiduloj hodiaŭ posttagmeze estis la fina ago. La malamiko estas venkita, kaj interne kaj

ekstere. En „Bestoj Anglaj” ni esprimis nian sopiron al venonta pli bona societo. Sed tiu societo estas nun jam establita. Tiu ĉi kanto klare ne plu havas iun ajn utilon.”

Malgraŭ sia timigiteco, kelkaj el la bestoj estus protestintaj, sed je tiu ĉi momento la ŝafoj komencis sian normalan blekadon de „Kvarpiedulo, jen bonulo! Dupiedulo – malbonulo”, kio daŭris kelkajn minutojn plu kaj tiel finiĝis la dikutado.

Do „Bestoj Anglaj” ne plu estis aŭdata. Anstataŭ ĝi Minimo, la poeto, komponis alian kanton, kiu komenciĝis per:

Besto-Farmo, Besto-Farmo, Besto-Farmo nia,
Se al vi domaĝ' okazos, kulp' ne estas mia!

kaj tiu ĉi kanto estis kantata ĉiun dimanĉ-matenon post la levigo de la flago. Sed iel nek la teksto nek la melodio iam ajn tiel plaĉis al la bestoj kiel tiuj de „Bestoj Anglaj”.

KELKE DA TAGOJ poste, kiam kvietiĝis la teruro, kaŭzita de la ekzekutigoj, pluraj el la bestoj rememoris – aŭ opiniis rememori – ke la Sesa Ordonon dekretis: „Neniu besto mortigu iun ajn alian beston“. Kaj kvankam neniu emis tion tiel menci, ke hundoj aŭ porkoj ĝin aŭdu, oni sentis ke la okazintaj mortigoj ne tute konformas al tio. Trifolia petis Benjaminon, ke li laŭtleĝu al ŝi la Sesan Ordonon, kaj kiam Benjaminon kiel kutime diris, ke li rifuzas enmiksiĝi en tiaj aferoj, ŝi venigis Murielan. Muriela laŭtleĝis por ŝi la ordonon. Ĝi tekstis: „Neniu besto mortigu iun ajn alian beston sen kaŭzo“. Iel la bestoj estis forgesintaj tiun finan vorton. Sed ili nun vidis, ke la ordono ne estas malobeita, ĉar memevidente ekzistis kaŭzo mortigi la perfidulojn, komplotintajn kun Neĝobulo.

Dum tiu tuta jaro la bestoj eĉ pli diligente laboris ol dum la pasinta. Rekonstruo de la ventmuelilo, kun muroj duoble pli dikaj kaj laŭprograma kompletigo de ĝi, kune kun la normala laboro de la farmo, estis tre ampleksa tasko. Je diversaj momentoj ŝajnis al la bestoj, ke ili pli longe laboras kaj pli malmulte manĝas ol dum la tempo de Jonaido. Dimanĉe matene, tenante per sia antaŭpiedo longan strion de papero surtere, Kvikulo legadis al ili listojn de statistikoj, pruvantaj ke la produktado de ĉiu speco de nutraĵoj respektive je 200, 300 aŭ 500 po cent plimultiĝis. La bestoj ne havis kaŭzon al ti ne kredi, ne plu kapablante klare rememori, kiaj estis la kondiĉoj antaŭ la revolucio. Tamen ili de tempo al tempo estus preferintaj pli da nutraĵo kaj malpli da statistikoj.

Ĉiuj ordonoj estis nun perataj de Kvikulo aŭ de unu el la aliaj porkoj. Napoleono ekkutimis eĉ dum tuta dusemajno ne vidiĝadi en publiko. Se li entute aperis, li estis akompanata ne nur de sia hundeskorto, sed

ankaŭ de nigra virkoketo, kiu marŝadis antaŭ li, agante kiel ia trompetisto kaj laŭte klukante, antaŭ ol Napoleono ekparoladis. Onidiriĝis ke en la mastrodomo Napoleono eĉ loĝas en apartementoj apartigitaj de tiuj de la aliaj. Li ĉiam sola manĝis, servate de du hundoj kaj uzante la manĝilaron „Crown Derby“, trovitan en la vitroŝranko en la salono. Krome anonciĝis, ke oni ĉiun jaron per la fusilo salutpafos, honore je la datreveno de la naskiĝo de Napoleono, same kiel por ambaŭ aliaj datrevenoj.

Napoleono jam neniam plu estis nomata simple „Napoleono“. Oni ĉiam formstile nomis lin „nia estro, kamarado Napoleono“, kaj la potkoj volonte inventadis por li titolojn kiaj: patro de ĉiuj bestoj, teruro de l' homaro, protektanto de l' ŝafaro, amiko de l' anasidoj, kaj similaj. En siaj paroladoj Kvikulo kun larmoj sur la vangoj laŭdadis la saĝon, la bonkorecon kaj la amon de Napoleono por ĉiuj bestoj, eĉ, kaj precipe, por la bestoj kiuj ankoraŭ vivas en nescio kaj sklaveco sur aliaj farmoj. Kutimiĝis direkti al li laŭdojn pri ĉiu ajn sukcesa atingajo, eĉ hazarda feliĉo. Oni ofte aŭdis kiel unu kokino al alia diras: „Sub la gvidado de nia estro kamarado Napoleono, mi dum ses tagoj metis kvin ovojn“; aŭ kiel du bovinoj, trinkante ĉe la lageto, deklamas, „Dank' al la estrado de kamarado Napoleono, kiel bone gustas la akvo!“ La ĝenerala sinteno de la tuta farmo estis bone esprimita en poemo kun la titolo „De Kamarad' Napoleon'“, de Minimo verkita kaj jene tekstanta:

Amiko de l' senpatraj!
Fonto de l' feliĉo!
De l' nutraĵ-sitel' Sinjor'!
Kiel flamas mia kor'
je l' vid' de la trankvila
rigard' sagaca, brila
de Kamarad' Napoleon'!

Puran pajlon kaj
stomakon plenan donis
vi al via kreitar'.
Sen timo dormas la bestar',
ĉu grandaj aŭ ĉu malaj
sub vaĉ-okuloj ŝtalaj
de Kamarad' Napoleon'!

Se hayus mi porkidon,
ĝi montrus jam la fidon,
per donac de vinbotel',
eldirante pro fidel'
per unua ekgruntad'
nomon de la kamarad'
Amikego Napoleon'!

Napoleono aprobis tiun ĉi poemon kaj enskribigis ĝin sur la muron de la granda fojnejo, je la kontraŭa fino al la Sep Ordonoj. Super ĝi estis de Kvikulo en blanka farbo pentrita portreto de Napoleono en profilo.

Intertempe, pere de Vimpero, Napoleono estis okupita pri komplika negocado kun Frederiko kaj Pilkintono. La staplo de ligno ankoraŭ ne estis vendita. El ambaŭ Frederiko estis pli avida ĝin akiri, sed li ne volis oferti konsidereblan prezon. Samtempe cirkuliĝadis onidiroj pri planado flanke de Frederiko kaj lia dungitaro ataki Besto-Farmon kaj detruj la ventmuelilon, kies konstruiĝo estis vekinta en li furiozan ĵaluzon. Estis konate ke Neĝobulo ankoraŭ embuskas ĉe Pinĉokampa Farmo. Je somermezo la bestoj estis ŝokitaj, aŭdinte ke tri kokinoj sin prezentis kaj konfesis ke, de Neĝobulo inspirite, ili estis partoprenintaj komploton atenci Napoleonon. Ili estis senhezite ekzekutitaj, kaj estis prenitaj specialaj mezuroj pri la sekureco de Napoleono. Dumnokte kvar hundoj gardis lian liton, po unu ĉe ĉiu angulo, kaj juna porko kun la nomo Rozokulo ri-

cevis la taskon ĉiam provi liajn manĝaĵojn, por konstati ĉu ili estas venenitaj.

Proksimume je la sama tempo sciigis ke Napoleono aranĝis vendon de la ligno al sinjoro Pilkintono; li ankaŭ estis faronta interkonsenton pri regula interŝanĝado de certaj varoj inter Besto-Farmo kaj Vulpoboska Farmo. La rilatoj inter Napoleono kaj Pilkintono, kvankam nur pere de Vimpero negocataj, estis preskaŭ amikecaj. La bestoj malfidis al Pilkintono pro tio ke li estas homo, sed ili fin multe pli preferis ol Frederikon, kiun ili kaj timis kaj malamis. Dum la somero daŭris kaj la konstruado de la ventmuelilo iom post iom kompletigadis, la famoj pri baldaŭa, malica atako pli kaj pli fortiĝis. Frederiko, oni diris, intencas venigi kontraŭ ili dudek virojn, ĉiuj armitaj per pafiloj, kaj li estis jam subaĉetintaj la magistratojn kaj la policon, tiel, ke se li povus kapti la dokumentojn de posedo de Besto-Farmo, ili ne faru demandojn. Krome, oni aŭdadis pri teruraj kruelaĵoj faritaj de Frederiko kontraŭ ties bestoj. Li estis ĝismorte vipinta maljunan ĉevalon, li lasis malsati siajn bovinojn, li mortigis hundon, ĝin ĵetante en fornegon, li amuzis sin vespere bataligante virkokojn sur kies ergotoj li fiksigus razil-klingerojn. Ekboldis la sango de la bestoj, kiam ili aŭdis pri la farado de tiaj fiagoj kontraŭ iliaj kamaradoj, kaj de tempo al tempo ili petegis, esti rajtigataj eliri en amaso kaj ataki Pinĉokampan Farmon, forpeli la homojn, kaj liberigi la bestojn. Sed Kvikulo konsilis al ili eviti senpripensajn agojn kaj fidi je la strategio de Napoleono.

La ĉagreno kontraŭ Frederiko tamen restis forta. Unu dimanĉon matene Napoleono aperis en la fojnejo kaj klarigis, ke ti neniam ajn konsideris vendon de la ligno al Frederiko; ke li rigardas intertraktadon kun tiaspecaj friponoj sub sia digno. Al la kolomboj, ankoraŭ alsendataj por disvastigi la sciigojn pri la revolucio, estis malpermesite alteriĝi sur iun ajn parton de

Vulpoboska Farmo, kaj ili ricevis krome ordonon, ĉesi la uzadon de sia slogano „Morton al la Homaro!“, ĝin anstataŭigante per „Morton al Frederiko!“. Dum la somera malfruo malkaŝiĝis plua maŝinacio de Neĝobulo. La tritiko estis minacata de forta fiherbaro, kaj malkovriĝis, ke Neĝobulo, dum unu el siaj noktaj vizitoj, miksis kun la tritikaj semoj tiujn de herbaĉo. Viransero kunkomplotinta konfesis al Kvikulo sian kulpon kaj tuj memmortigis sin, englutante venenajn berojn de beladono. La bestoj nun ankaŭ lernis, ke Neĝobulo neniam – kiel multaj ĝistiam kredis – ricevis la ordonon „Besta Heroo, Unua Grado“. Tio estis nura legendo disvastigita de Neĝobulo mem, mallonge post la Batalo de la Bovinejo. Ja ne ordenita sed maltaŭdita li estis, pro malkuraĝo en la batalo. Denove kelkajn el la bestoj tio konfuzis, sed Kvikulo povis baldaŭ ilin konvinki ke malpravas ilia memoro.

En la aŭtuno, per streĉega, elĉerpiga penado – ĉar ili devis preskaŭ samtempe rikolti – ili finis la ventmuelilon. Estis ankoraŭ instalenda la maŝinaro, kaj Vimpero negocis ĝian aĉeton, sed la konstruaĵo mem estis kompletigita. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, spite al nesperteco, al la primitivaj iloj, al la malbona sorto kaj al la perfidado de Neĝobulo, la laboro estis finita, akurate je la planita tago! Lacegaj sed fieraj, la bestoj ĉirkaŭradis sian majstroverkon, kiu por iliaj okuloj estis eĉ pli belega ol kiam ili ĝin la unuan fojon konstruis. Krome, la muroj estis duoble dikaj. Nun nur eksplodigiloj povus ĝin detrui! Kaj kiam ili pripensis sian penegadon, la superitajn malkuraĝigojn, kaj la vastskalan ŝanĝon, kiun la turniĝontaj veloĵ kaj la funkciontaj dinamoj efektivigos en ilia vivo – kiam ili ĉi ĉion pripensis, la laco forlasis ilin kaj ili saltkuradis ĉirkaŭ la ventmuelilo, triumfkriante. Napoleono mem, asistate de siaj hundoj kaj sia virkoketo, venis por inspekti la kompletigitan laboron; li persone gratulis la bestojn pri ilia atingaĵo,

kaj anoncis ke la ventmuelilo nomiĝos Muelilo „Napoleono“.

Du tagojn pli poste la bestoj estis kunvokitaj por speciala kunveno en la fojnejo. Ili mutiĝis pro surprizo kiam Napoleono anoncis ke li vendis la staplon da ligno al Frederiko. La sekvantan tagon venis la ĉaroj de Frederiko kaj fortransportis ĝin. Dum la tuta tempo de sia ŝajna amikeco kun Pilkintono, Napoleono estis sekrete interkonsentita kun Frederiko.

Ĉiuj rilatoj kun Vulpoboska Farmo rompiĝis kaj oni sendis al Pilkintono insultajn mesaĝojn. La kolomboj ricevis ordonon, eviti Pinĉokampan Farmon kaj anstataŭsian sloganon „Morton al Frederiko!“ per „Morton al Pilkintono!“. Samtémpe Napoleono certigis la bestojn ke la famoj pri okazonta atako kontraŭ Besto-Farmo estas tute neveraj, kaj ke la rakontoj pri la krueleco de Frederiko kontraŭ liaj bestoj estis ege troigitaj. Ĉiuj ĉi famoj verŝajne devenis de Neĝobulo kaj ties agentoj. Ŝajnis nun, ke Neĝobulo tamen ne estis kaŝita ĉe Pinĉokampa Farmo, kaj fakte dum sia tuta vivo neniam estis tie: li vivis – laŭdire en konsiderinda lukso – ĉe Vulpoboska Farmo, kaj vere estis jam de jaroj pensiita de Pilkintono.

La porkoj estis ravegitaj pri la ruzeco de Napoleono. Ŝajnigante amikecon kun Pilkintono, li atingis ke Frederiko je dekdu pundoj pligrandigu sian oferton. Sed la pli alta kvalito de la racio de Napoleono, diris Kvikulo, montriĝas en la fakto, ke li al neniuj aĵoj fidis, eĉ ne al Frederiko. Frederiko volis pagi la lignon per tielnomata „ĉeko“, kio, ŝajne, estas ia folio de papero, sur kiu estas skribita promeso pagi. Sed Napoleono lin superruzis. Li postulis la pagon en veraj kvin-pundaj biletoj, transdonataj antaŭ forigo de la ligno. Frederiko estis jam paginta, kaj la pagita sumo ĝuste sufiĉis por aĉeti la maŝinaron por la ventmuelilo.

Dume, la ligno estis rapide forportata. Kiam ĝi estis for, alia speciala kunveno estis aranĝata en la fojnejo, por ke la bestoj povu rigardi la monbiletojn de Frederiko. Bone rigardante kaj portante ambaŭ ordenojn, Napoleono kuŝis sur pajla lito sur la platformo, kun la mono apud si, nete staplita sur porcelana telero el la kuirĉejo de la mastrodomo. La bestoj malrapide pasis antaŭ la telero, rigardante ĝissate. Boksulo malleviis la nazon por priflari la monbiletojn, kaj la delikataj blankaj folioj moviĝis kaj susuris en la aero, vibrante de lia spirado.

Post tri tagoj estis terura ekscitiĝo. Vimpero, kun mortpala vizaĝo, venis per sia biciklo rapidege laŭ la vojeto, en la korto terenĵetis ĝin, kaj kuris rekte al la mastrodomo. Post unu momento el la kvartiroj de Napoleono aŭdiĝis muĝo. La novaĵo kovris la tutan farmon kiel nehaltigebla incendio. La mono estis falsa! Frederiko senkoste ricevis la lignon!

Napoleono tuj kunvokigis la bestojn kaj per terura voĉo deklaris por Frederiko la mortpunon. Kaptite, li dekretis, ke Frederiko estu viva boligita. Samtempe li admonis, ke post tiu fifaro estas atendebla nur la plej malbona. Frederiko kaj liaj uloj povus ĉiumomente lanĉi sian longe atenditan atakon. Oni postenigis ĉe ĉiuj alirvojoj vaĉantojn. Krome, oni sendis al Vulpoboska Farmo kvar kolombojn kun mesaĝo de paĉpropono kiu, oni esperis, helpus reestabli kun Pilkintono bonajn rilatojn.

Tuj la sekvantan matenon venis la atako. La bestoj ĵus estis matenmanĝintaj kiam la vaĉantoj alkuris kun sciigo, ke Frederiko kaj liaj kunuloj jam trairis la kvin-stangan pordegon. Sufiĉe kuraĝe la bestoj avancis por ilin konfronti, sed ĉi-foje ili ne atingis tian facilan venkon kiel en la Batalo de la Bovinejo. Atakis dekkvin homoj kun seso da pafiloj, kaj ili ekpafis jam je distanco de kvindek metroj. La bestoj ne povis kontraŭstari

la timigan krakadon kaj la pikajn kugletojn, kaj malgraŭ la penoj de Napoleono kaj Boksulo ilin reorganizi, ili baldaŭ repeliĝis. Kelkaj estis jam vunditaj. Ili serĉis rifuĝejon en la farma domaro kaj singardeme rigardis eksteren tra fendetoj kaj branĉotruoj. La tuto de la granda paŝtejo, inkluzive la ventmuelilon, estis en la manoj de la malamiko. Je tiu momento eĉ Napoleono ŝajne ne sciis kion fari. Li senvorte paŝadis tien kaj reen, kun la vosto rigida kaj tremanta. Oni sendis al Vulpoboska Farmo sopirajn rigardetojn. Se Pilkintono kaj ties viroj helpus, la situacio povus esti savita. Sed je tiu momento la kvar kolomboj, senditaj la pasintan tagon, revenis, unu portante slipon de Pilkintono. Sur ĝi estis krajon-skribitaj vortoj: „Tion vi meritas.”

Intertempe Frederiko kaj liaj kunuloj haltis ĉirkaŭ la ventmuelilo. La bestoj ilin observis, kaj ekaŭdiĝis murmuro de malespero. Du el la homoj havis levostangon kaj martelegon. Ili volis faligi la ventmuelilon.

„Neeble!” – Napoleono kriis. „Ni ja konstruis ia murojn tro fortaj. Tio ja tuŝan semajnon daŭros. Kur-aĝon, gekamaradoj!”

Sed Benjamenon atente observis la agadon de la homoj. La du kun la menciitaj iloj boris per ili truon en la fundamento de la ventmuelilo. Malrapide, kvazaŭ amuzite, Benjamenon ŝanceligis sian longan kapon.

„Ĝuste tion mi opiniis”, diris li. „Ĉu vi ne vidas, kion ili faras? Post unu momento ili enpakos eksplodigan pulvoron en tiun truon.”

Terurigite, la bestoj atendis. Nun ne plu eblis forlasi la protekton de la domaro. Post kelke da minutoj la viroj kuris, ŝajne en ĉiuj direktoj. Sekvis surdiga tondrego. La kolomboj kirligis en la aero, kaj ĉiuj bestoj, escepte Napoleono, sin ĵetis ventralteren kaj kaŝis la vizaĝon. Kiam ili denove leviĝis, pendis super la iama situo de la ventmuelilo vasta fumonubo. La vent-

eto malrapide fordrivigis ĝin. La ventmuelilo estis ĉesinta ekzisti!

Je la vido de tio la kuraĝo de la bestoj revenis. La timo kaj malespero, kiujn ili antaŭ unu momento sentis, estis forglutitaj en la furiozo kontraŭ tiu ĉi vulgara kaj malestiminda ago. Leviĝis kriego je venĝo, kaj, ordonojn ne atendente, ili unuanime sturmis rekte al la malamiko. Ili ĉifoje malatentis la hajlon de kugletoj. La homoj pafadis kaj ree pafadis, kaj kiam la bestoj proksimiĝis, ili batadis per la bastonoj kaj pezaj botoj. Mortis bovino, tri ŝafoj kaj du anserinoj, kaj vundiĝis ĉiuj. Eĉ Napoleono, kiu de la malantaŭaj viroj direktis la agadon, perdis pere de kugleto la pinton de sia vosto. Sed ankaŭ la homoj ne eskapis senvunde. Al tri Boksulo rompis la kapon per siaj hufoj; al alia la bovino per korno trapikis la ventron; plua preskaŭ perdis la pantalonon, disŝiritan de Jesinjo kaj Viola. Kaj kiam la naŭ hundoj de la persona gvardio de Napoleono, kiujn li instrukciis, fari ĉirkaŭvojon kaŝite de la heĝo, aperis minacgrincante kaj bojegante sur la dekstra flanko de la homoj, ilin kaptis paniko. Ili vidis, ke ekestis danĝero, esti ĉirkaŭataj. Frederiko kriis al la siaj, ke ili forkuru dum ankoraŭ eblas, kaj post unu momento la malamiko kuregis pro la kara vivo. La bestoj ilin persekutis ĝis la fino de la kampo, kaj per kelkaj lastaj tretoj sukcesis trafi, dum la homoj trarampis la dornoplenan heĝon.

Ili estis venkintaj, sed lacaj kaj sangaj. Malrapide ili lametis reen al la farmo. Vidante la mortigitajn gekamaradojn sur la herbo, kelkaj esploris. Kaj dum mallonga tempo ili haltis en funebra silento ĉe la loko, kie estis starinta la ventmuelilo. Jes, ĝi estis for; preskaŭ ĉiu spuro de ilia laboro estis forviŝita! Eĉ la fundamento estis parte detruita. Kaj por la rekonstruado ĉi-foje ne eblus uzi la falintajn ŝtonojn. Ĉi-foje ankaŭ

la ŝtonoj estis malaperintaj. Estis kvazaŭ la ventmuelilo neniam ekzistis.

Dum ili alproksimiĝis al la farmo, Kvikulo, kiu dum la batalo estis neklarigite mankinta, salte kuris al ili svingetigante la voston kaj ridetante pro kontenteco. Kaj la bestoj aŭdis el la direkto de la farma domaro la solenan tondradon de la pafilo.

„Pro kio estas pafigata la fusilo?“, demandis Boksulo.

„Por festi nian venkon!“, kriis Kvikulo.

„Kiun venkon?“, Boksulo scivolis. Sangis liaj genuoj, li perdis hufieron, kaj seso da kugletoj estis penetrinta en unu el liaj malantaŭaj gamboj.

„Kiun venkon, kamarado? Ĉu ni ne forpelis la malamikon de nia tero – de la sankta tero de Besto-Farmo?“

„Sed ili detruis la ventmuelilon. Kaj ni dum du jaroj ĝin konstruis.“

„Ha! Tio ne gravas! Ni konstruos alian ventmuelilon. Ni konstruos ses, se ni volas. Vi ne sufiĉe taksas, kamarado, la grandiozan faron, kiun ni efektivigis. La malamiko okupis tiun ĉi teron, sur kiu ni staras. Kaj nun dank' al la estrado de kamarado Napoleono – ni regajnis ĉiun centimetron de ĝi.“

„Do, ni tion regajnis kion ni antaŭe posedis“, diris Boksulo.

„Tio estas nia venko“, respondis Kvikulo.

Ili lamis reen en la korton. La kugletoj sub la haŭto de la gambo de Boksulo dolore pikis. Li vidis antaŭ si la pezan taskon de elfundamenta rekonstruado de la ventmuelilo, kaj en spirito li jam preparis sin por tio. Sed li unuan fojon ekkonsciigis pro la fakto, ke li estas dekunu-jaraĝa kaj ke liaj fortikaj muskoloj ne plu estas samfortaj.

Tamen, kiam la bestoj vidis la verdan flagon flir-tanta, kaj aŭdis la fusilon denove pafinta – entute sep-

foje ĝi estis pafigita – kaj aŭskultis la paroladon kiun faris Napoleono, ĉiujn pro ilia konduto gratulante, ŝajnis tamen al ili, ke ili atingis grandan venkon. La batalo mortigitaj bestoj ricevis solenan entombigan ceremonion. Boksulo kaj Trifolia tiris la ĉaron, kiu servis kiel funebra veturilo, kaj Napoleono mem gvidis la procesion. Dum du tutaj tagoj oni festis. Oni kantis, paroladis, plupafigadis la fusilon, kaj specialan donacon de po unu pomo ricevis ĉiu besto, resp. po du uncoj da greno por ĉiu birdulo kaj po tri biskvitoj por ĉiu hundo. Anonciĝis, ke la batalo estos nomata la Batalo de la Ventmuelilo, kaj ke Napoleono kreis novan ordenon, la Medalo de la Verda Flago, per kiu li distingis sin mem. En la ĝenerala jubilado la malfeliĉa afero de la monbiletoj forgesiĝis.

Kelke da tagoj post tio la porkoj hazarde trovis en la kelo de la mastrodomo keston da viskio. Oni estis ĝin pretervidinta dum la komenca okupado de la mastrodomo. Tiun vesperon aŭdiĝis en la mastrodomo laŭta kantado en kiu, je ĉies surprizo, estis intermiksita melodio de „Bestoj Anglaj“. Ĉirkaŭ la naŭa kaj duono oni klare vidis Napoleonon, portantan malnovan melonforman ĉapelon de sinjoro Jonaïdo, emerĝi el la malantaŭa pordo, rapide galopi en arko tra la korto, kaj remalaperi en la domon. Sed la sekvintan matenon pendis sur la mastrodomo profunda silentego. Moviĝis neniu porko. Ĉirkaŭ la naŭa aperis Kvikulo, malrapide kaj malgaje irante, kun okuloj senbrilaj, kun la vosto malrigide pendanta, kaj kun aspekto de trea malsaneco. Li kunvokis la bestojn kaj informis ilin, ke ti havas teruran novaĵon. Mortas Napoleono!

Leviĝis vekrio. Oni metis pajlon sur la teron ĉirkaŭ la pordoj de la mastrodomo, kaj la bestoj iris sur piedpintoj. Kun larmoplenaj okuloj ili demandis unu la alian, kion ili faru, se al ili la estro estos forprenita. Ĉirkuliĝis famo asertanta, ke Neĝobulo tamen sukcesis

venenigi la nutraĵojn de Napoleono. Je la deknua horo Kvikulo venis kun nova sciigo. Kiel sian plej lastan agon surteran Napoleono starigis solenan dekreton: la trinkado de alkoholaĵoj estas mortpuninda.

Sed tiun vesperon Napoleono tamen iom pli bone fartis, kaj la sekvan matenon Kvikulo povis informi la bestojn ke li resaniĝis. Je la vespero de tiu tago Napoleono jam denove laboris, kaj post plua tago oni eksciis, ke li instrukciis al Vimpero aĉeti en Vilindono kelke da broŝuroj pri bierfarado kaj destilado. Post unu semajno Napoleono ordonis, ke la malgranda ĉevalkampo malantaŭ la fruktarbaro, iam intencita esti paŝejo por bestoj ne plu laborkapablaj, estu plugata. Oni asertis, ke la paŝejo estas elĉerpita kaj devas esti resemata; sed baldaŭ sciigis, ke Napoleono intencas ĝin semi per hordeo.

Proksimume je tiu tempo okazis stranga afero, kiun apenaŭ iu ajn povis kompreni. Unu nokton, ĉirkaŭ noktomezo, estis laŭta bruego en la korto, kaj la bestoj kuris el siaj staloj. Estis hel-luna nokto. Ĉe la piedo de la ekstrema muro de la granda fojnejo, kie estis skribitaj la Sep Ordonoj, kuŝis ŝtupetaro rompita en du pecoj. Kvikulo, duon-senkonsciigita, kuŝis apud ĝi, kaj en la proksimeco estis lanterno, peniko kaj renversita poto de blanka farbo. La hundoj tuj ĉirkaŭis Kvikulon kaj, kiam ti denove kapablis iri, lin akompanis reen al la mastrodomo. Neniu el la bestoj povis imagi, kion tio signifas, escepte la maljuna Benjamenino, kiu en maniero de sciulo kapjese svingadis la muzelon, ŝajne komprenante, sed nenion dirante.

Sed post kelkaj tagoj Muriela, relegante al si la Sep Ordonojn, rimarkis ke estas ankoraŭ unu, kiun la bestoj nekorekte memoris. Ŝi opiniis ke la Kvina Ordono tekstas „Neniu besto trinku alkoholaĵojn“, sed estis ankoraŭ unu vorto, kiun ili forgesis. Fakte la Ordono tekstis: „Neniu besto trinku alkoholaĵojn ĝi s e k s c e s e.“

LA FENDITA HUFO de Boksulo longe ne resaniĝis tute. La rekonstruado de la ventmuelilo komenciĝis tuj je la tago, kiu sekvis la venkofeston. Boksulo rifuzis eĉ unu tagon manki ĉe la laboro, kaj dependigis sian honoron de nemontrado de siaj doloroj. Vespere li konfesis al Trifolia ke la hufo sufiĉe multe lin ĝenas. Trifolia provis la hufon kuraci per bandaĝoj el herbaĵoj, kiujn ŝi per maĉado preparis, kaj ŝi kaj Benjamenino ambaŭ rekomendis al Boksulo malpli intensive labori. „La pulmoj de ĉevalo ne eterne eltenas“, ŝi diris al li. Sed Boksulo ne aŭskultis. Li diris, ke li havas nur unu veran ambicion – vidi la rekonstruadon de la ventmuelilo, bone komencita antaŭ ol li atingis la aĝon de pensiigo.

Komence, kiam la leĝoj de Besto-Farmo estis nove formulitaj, la pensia aĝo por ĉevaloj estis fiksita je dekdu, por bovinoj je dekkvar, por hundoj je naŭ, por ŝafoj je sep, kaj por kokoj kaj anseroj je kvin. Oni interkonsentis pri liberalaj pensioj. Ankoraŭ neniuj bestoj estis pensiitaj, sed lastatempe la temo estis pli kaj pli diskutata. Nun, kiam la kampeto malantaŭ la fruktarbarto estas rezervita por hordeo, onidiriĝis, ke estas barota angulo de la granda paŝtejo kaj transformota en paŝtejon por superaĝaj bestoj. Por ĉevaloj, oni diris, la pensio estos kvin funtoj da greno potage, kun karoto aŭ eble pomo okaze de la publikaj festotagoj. La dekdua datreveno de naskiĝo de Boksulo estis dum la somerfino de la venonta jaro.

Intertempe la vivo estis malfacila. La vintro estis same malvarmega kiel la pasinta, kaj la nutraĵoj sufiĉis eĉ malpli. Denove estis reduktitaj ĉiuj porcioj, escepte tiuj de la porkoj kaj la hundoj. Tro rigida egaleco de porcioj, Kvikulo klarigis, estus kontraŭa al la principoj de bestarismo. Li ĉiukaze facile provis al la aliaj bestoj, ke ili ne efektive havas malpli da manĝaĵoj, kiel ajn la

afero aspektas. Kompreneble, estis provizore necese re-alĝustigi la distribuon de la porcioj (Kvikulo ĉiam parolis pri re-alĝustigo, ne pri redukto), sed kompare kun la tempo de Jonaido la plibonigo estis konsiderinda. Per alta, rapida voĉo laŭtleĝante la ciferojn, li detale pruvis al ili, ke ili havas pli da aveno, pli da fojno, pli da rapoj – ol en la tempo de Jonaido; ke ili laboras malpli da horoj, ke ilia trinkakvo estas plibonkvailita, ke ili pli longe vivas, ke pli granda procento de iliaj idoj postvivas la infanecon, kaj ke ili havas pli da paŝlo en siaj staloj kaj suferas malpli pro puloj. La bestoj ĉiun vorton kredis. Verdire, Jonaido kaj lia tuta signifo estis preskaŭ malaperintaj el ilia memoro. Ili sciis ke la nuntempa vivo estas maldolĉa kaj senĝoja, ke ili ofte sentas malsaton kaj malvarmon, kaj ke ili normale laboras kiam ili ne dormas. Sed sendube estis pli malagrabla en la malnova tempo. Ili volonte tion kredis. Krome, tiam ili estis sklavoj kaj nun ili estas liberaj, kaj tio konsistigas la tutan diferencon, kiel Kvikulo ilin senlace atentigadis.

Estis nun pli da stomakoj plenigendaj. En aŭtuno ĉiuj kvar porkinoj preskaŭ samtempe naskis, donante vivon al entute tridek unu porkidoj. La porkidoj ĉiuj estis mikskoloraj, kaj ĉar Napoleono estis la sola plenkreskinta virporko de la farmo, eblis diveni ilian parencecon. Anonciĝis ke poste, kiam estos aĉetitaj brikoj kaj ligno, oni konstruos en la mastrodoma ĝardeno lernejon. Intertempe la porkidoj estis instruotaj de Napoleono mem en la kuirejo de la mastrodomo. En la mastrodoma ĝardeno ili faris sian korpan ekzercadon, kaj estis malaprobite, ke ili ludu kun la aliaj bestidoj. Proksimume je tiu tempo estis ankaŭ farita nova regulo, nome ke kiam porko kaj iu ajn alia besto renkontiĝas sur vojeto, la alia besto devas cedi la antaŭiran rajton, kaj krome, ke ĉiu porko de iu ajn rango havu la privilegion ĉiudimanĉe porti sur la vosto verdajn rubendojn.

La farmo havis sufiĉe sukcesan jaron, sed mankis ankoraŭ mono. Estis aĉetendaj la brikoj, sablo kaj katko por la lernejo, kaj ankaŭ denove necesis komenci la ŝparadon por la maŝinaro de la ventmuelilo. Krom tio estis bezonataj lamp-oleo kaj kandeloj por la mastro-domo, sukero por la propra tablo de Napoleono (li tion malpermesis al la aliaj porkoj pro tio, ĉar ĝi ilin korpulentigus), kaj ĉiuj normalaj anstataŭigendaĵoj, ekz.: iloj, najloj, ŝnuretoj, karbo, drato, malnova fero kaj biskvitoj por la hundoj. Oni vendis po parto de la fojna kaj terpoma rikoltoj, kaj la kontrakto por ovoj estis pligrandigita ĝis sescent semajne, tiel ke dum tiu jaro la kokinoj elkovis apenaŭ sufiĉe da kokidoj por ke iliaj nombroj restu la samaj. La porcioj, en decembro reduktitaj, en februaro denove reduktiĝis, kaj lanternoj en la staloj estis malpermesataj, por ŝpari oleon. Sed la porkoj aspektis sufiĉe komfortemaj, eĉ plidikiĝis. Unu posttagmezon en februaro flariĝis varma, riĉa, apetitigaodoro, de la bestoj neniam antaŭe flarita, kiu drivis trans la korto el la malgranda bierfar-dometo kiu staris aliflanke de la kuirejo, kaj kiu en la tempo de Jonaŭdo estis neuzata. Iu diris, ke tio estasodoro de kuirata hordeo. La bestoj malsate flarumadis la aeron kaj scivolis, ĉu estas io varma preparata por ilia vespermanĝo. Sed ne venis varma manĝo, kaj la sekvan dimanĉon anonciĝis, ke la hordeo estas ekde tuj rezervita por la porkoj. La kampo malantaŭ la fruktarbaro estis jam semita per hordeo. Kaj baldaŭ eksciĝis, ke ĉiu porko nun ricevas duonlitron da biero potage, dum Napoleono mem ricevas du litrojn, servatajn al li ĉiam en la supujo de la teleraro „Crown Derby“.

Sed se estis ankoraŭ malfacilaĵoj por elteni, ili parte kompenciĝis per tio, ke la vivo nun estis pli digna ol antaŭe. Estis pli da kantoj, pli da paroladoj, pli da procesioj. Napoleono ordonis ke okazu ĉiusemajne evento nomita Spontana Demonstracio por festi la luk-

tojn kaj triumfojn de Besto-Farmo. Je la ordonita tempo la bestoj forlasis sian laboron kaj marŝis en militista formacio laŭ la periferio de la farmo, kun la porkoj gvidantaj, poste la ĉevaloj, tiam la bovinoj, tiam la ŝafoj kaj fine la birdularo. La hundoj flankumis la procesion kaj je la pinto de ĉiuj marŝis la nigra virkoketo de Napoleono. Boksulo kaj Trifolia ĉiam portis inter si verdan transparenton kun la hufo kaj la korno kaj la surskribo „Vivu Kamarado Napoleono!“ Sekvis recitado de poemoj verkitaĵoj je la honoro de Napoleono kaj parolado de Kvikulo, kiu sciigis la plej aktualajn plimultiĝojn de nutraĵoj, kaj de tempo al tempo oni pafigis la fusilon. La plej ardaĵ partoprenantoj de la Spontana Demonstracio estis la ŝafoj, kaj se iu ajn plendis (kiel kelkaj faris, kiam ne estis porkoj aŭ hundoj en la proksimeco), ke oni malŝparas tempon kaj sufiĉe multe staradis en la malvarmo, oni povis kalkuli pri tio, ke la ŝafoj tiujn tuj silentigus per plenvoĉa „Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – malbonulo!“ Sed ĝenerale la bestoj ĝuis tiujn festojn. Estis konsole, esti rememorigataj, ke ili tamen estas la propraj mastroj kaj ke la laboro, kiun ili faras, estas por la propra bono. Tiel per la kantoj, la procesioj, la ciferlistoj de Kvikulo, la tondrado de la paŝilo, la klukado de la virkoketo, kaj la flirtado de la flago, ili povis almenaŭ de tempo al tempo forgesi, ke la stomako estas malplena.

En aprilo Besto-Farmo estis deklarita respubliko, kaj necesiĝis elekti prezidanton. Estis nur unu kandidato, Napoleono, kiu unuanime elektiĝis. Samtage anonciĝis, ke estas malkovritaĵ novaj dokumentoj, malkaŝantaĵ pluajn detalojn pri la komplikado de Neĝobulo kun Jonaido. Konstatigis ke Neĝobulo ne nur, kiel la bestoj antaŭe supozis, pere de strategia movo klopodis malgajnigi la Batalon de la Bovinejo, sed malkaŝe batalis sur la flanko de Jonaido. Eĉ pli, li mem estis la estro de la homaj fortoj, kaj atakis kun krio „Vivu la Homaro!“ la

vundoj sur la dorso de Neĝobulo, kiujn pluraj bestoj memoris, estis faritaj per la dentoj de Napoleono.

Meze de la somero la korvo Moseo reaperis sur la farmo, post plurjara neĉeesto. Li estis tute neŝanĝita, ankoraŭ ne laboris kaj ankoraŭ sammaniere babiladis pri Sukerbombonuĵo. Li birdsidiĝis sur stumpo, svingis la nigrajn flugilojn kaj dum horoj parolis al iu ajn aŭskultemulo. „Tie supre, gekamaradoj“, li diris serioze, montante per sia granda beko al la ĉielo – „ĝuste tie, malantaŭ tiu griza nubo – tie troviĝas Sukerbombonuĵo, tiu feliĉa lando, kie ni povraj bestoj post nia laborado eterne ripozos!“ Li eĉ asertis, ke li dum unu el siaj pli altaj flugoj tie vizitis kaj vidis la eternajn kampojn de trifolio kaj la linsemkukojn kaj sukerbulojn kreskantajn sur la heĝoj. Multaj bestoj kredis al li. Ilia vivo nuna, ili rezonis, estas plena je malsato kaj laboro; ĉu ne estas ĝuste kaj juste, ke ekzistu aliloke pli bona mondo? Malfacile divenebla estis la sinteno de la porkoj pri Moseo. Ili ĉiuj malestime deklaris, ke liaj rakontoj pri Sukerbombonuĵo estas mensogoj, kaj tamen ili permesis ke li restu sur la farmo, ne laborante, tage ricevante okonon de litro da biero.

Kiam la hufo de Boksulo estis resaniĝinta, li pli diligente laboris ol iam. Ja, ĉiuj bestoj tiujare laboris kiel sklavoĵoj. Aparte de la normala farmlaboro kaj la rekonstruado de la ventmuelilo, estis ankaŭ farata la konstruado de la ternejo por la junaj porkoj, en marto komencigita. De tempo al tempo la longaj horoj de laborado kun nesufiĉa nutrado estis malfacile elteneblaj, sed Boksulo neniam hezitis. En nenio, kion li faris aŭ diris, estis iu ajn signo, ke lia forto ne plu estas la sama. Nur lia aspekto estis iom ŝanĝita: lia felo estis malpli brila, kaj liaj grandaj koksoj ŝajnis esti malkreskintaj. La aliaj diris: „Boksulo pli bone fartos, kiam la printempa herbo elkreskos“; sed la printempo venis kaj Boksulo ne plidikiĝis. De tempo al tempo, sur la klinga

vojo al la supro de la ŝtonejo, kiam li streĉis la muskolojn kontraŭ la pezo de iu granda ŝtonego, ŝajnis ke nenio, escepte la volo, daŭrigos lin teni staranta. Je tiaj tempoj oni observis, kiel liaj lipoj formas la vortojn „mi pli klopodos“; voĉon li ne plu havis. Denove Trifolia kaj Benjamenio lin admonis zorgi pri sia sano, sed Boksulo ne atentis. Alproksimiĝis lia dekdua naskiĝtaga datreveno. Por li ne gravis, kiø okazos, escepte ke estu kolektita sufiĉe granda stoko da ŝtonoj antaŭ lia pensiigo.

En la malfruo de iu somera vespero trakuris la farmon subita famo: okazis io al Boksulo. Li estis elirinta sola por treni ŝarĝon de ŝtonoj al la situo de la ventmuelilo. Kaj efektive, la famo estis vera. Post kelke da minutoj alflugis du kolomboj kun la sciigo: „Boksulo falis! Li kuŝas sur la flanko kaj ne povas leviĝi!“

Proksimume duono de la bestoj rapidis al la ronda monteto, kie staris la ventmuelilo. Tie kuŝis Boksulo inter la tirstangoj de la ĉaro, kun la kolo etendita, ne kapabla levi eĉ la kapon. Liaj okuloj estis vitrecaj, lia felo feltiĝinta pro ŝvito. Fluetis el lia buŝo maldika strio de sango. Trifolia genuis ĉe lia flanko.

„Boksulo!“, ŝi kriis, „kio estas?“

„Estas mia pulmo“, respondis Boksulo per malforta voĉo. „Ne gravas. Mi opinias, ke vi povos sen mi kompletigi la ventmuelilon. Kolektiĝis jam sufiĉe granda stoko da ŝtonoj. Mi ĉiukaze havis nur unu monaton ankoraŭ. Honeste dirite, mi jam ĝojis pri mia pensiigo. Kaj eble, ĉar Benjamenio ankaŭ maljuniĝis, oni permesos, ke li samtempe pensiigu kaj estu por mi kunulo.“

„Ni devas tuj venigi helpon“, diris Trifolia. „Iu kuru kaj venigu Kvikulon...“

La ceteraj bestoj ĉiuj kuris al la mastrodomo por sciigi al Kvikulo la aferon. Restis nur Trifolia, kaj Benjamenio, kiu ekkuŝis flanke de Boksulo kaj senparole forpeladis per sia longa vosto la muŝojn. Post proksimu-

me kvaronhoro aperis Kvikulo, plena je simpatio kaj zorgo. Li diris ke kamarado Napoleono kun plej profunda bedaŭro eksciis pri tiu ĉi malfeliĉo, okazinta al unu el la plej lojalaj laborantoj de la farmo, kaj ke li jam aranĝis, por transportigi Boksulon al Vilindono cele de flegado en la tiea malsanulejo. La bestoj maltrankviliĝis. Escepte de Manjo kaj Neĝobulo neniuj bestoj iam forlasis la farmon, kaj ili ne ŝatis la imagon de sia kamarado en homaj manoj. Tamen, Kvikulo facile konvinkis ilin, ke la best-kuracisto en Vilindono multe pli kontentige povas trakti la kazon de Boksulo ol estus eble sur la farmo. Kaj ĉirkaŭ unu horo pli poste, kiam Boksulo iomete pli bone fartis, oni kun malfacileco lin starigis, kaj li sukcesis lami reen al sia stalo, kie Trifolia kaj Benjameneto estis por li preparintaj bonan pajlan liton.

Dum la sekvaj du tagoj Boksulo restis en sia stalo. La porkoj sendis botelon da rozkolora medikamento, kiun ili trovis en la medikament-ŝranketo en la banejo, kaj Trifolia ĝin dozadis al Boksulo ĉiun tagon dufoje post la manĝoj. Vespere ŝi kuŝis en lia stalo kaj konversaciis kun li, dum Benjameneto forpeladis la muŝojn. Boksulo asertis, ke li la okazintan ne bedaŭras. Se li bone resaniĝus, li povus vivi ankoraŭ tri jarojn, kaj li kun ĝojo anticipos pacajn tagojn, kiujn li pasigos en la angulo de la granda paŝtejo. Tio estus la unua eblico por li, havi libertempon por studado kaj plibonigado de la spirito. Li diris, ke li intencas dediĉi la reston de sia vivo al lernado de la restaĵ dudekdu literoj de la alfabeto.

Tamen, Benjameneto kaj Trifolia povis nur post la laboro esti ĉe Boksulo, kaj dum la tagmezo venis la ĉaro por lin forporti. Sub kontrolo de porko, ĉiuj bestoj eltiradis herbaĉojn el bedo de rapoj, kiam je ilia surprizego algalopis Benjameneto de la mastrodomo, plenvoĉe i-a-ante. La unuan fojon ili vidis Benjameneton eks-

citita – ja la unuan fojon iu ajn lin vidis galopi. „Haste, haste!“ – li kriis. „Venu tuj! Oni forportas Boksulon!“ Ne atendente ordonon de la porko, la bestoj ĉesis labori kaj kuregis en la direkto al la farma domaro. Efektive, tie en la korto staris granda fermita liverĉaro tirata de du ĉevaloj, kun literoj sur la flankoj kaj ruzaspekta homo sur la direktista benko. Kaj la stalo de Boksulo estis neokupata.

La bestoj amasiĝis ĉirkaŭ la ĉaro. „Ĝis revido, Boksulo!“ – kriadis ili kune, – „ĝis revido!“

„Stultuloj, stultuloj!“ i-a-adis Benjamenon, ĉirkaŭkurante kaj per siaj hufetoj stampante la teron. „Stultuloj! Ĉu vi ne vidas, kio estas skribita sur la flanko de tiu ĉi ĉaro?“

La bestoj paŭzis kaj eksilentis. Muriela komencis el-literumi la vortojn. Sed Benjamenon ŝin flanken-puŝis kaj legis en la morteskaj silento:

„Alfredo Simono, Ĉeval-Buĉisto kaj Gluaĵ-Faristo Vilindono. Komercanto de Feloj kaj Ostopulvoro. Staloj disponataj. Ĉu vi ne komprenas, kion tio signifas? Oni transportas ĉin al la ĉevalmortigisto!“

Eksplodis krio de teruro el ĉiuj bestoj. Je tiu momento la homo sur la direktista benko vipis siajn ĉevalojn kaj la ĉaro eliris je vigla troto el la korto. La bestoj sekvis, plenvoĉe blekadante. Trifolia trapuŝis sin al la antaŭo. La ĉaro komencis plirapidiĝi. Trifolia penis galopigi siajn malelastajn membrojn, kaj sukcesis galopeti. „Boksulo! – ŝi henis – Boksulo! Boksulo! Boksulo!“ Kaj ĝuste je tiu momento, kvazaŭ li aŭdis la eksteran bruegon, Boksulo aperigis sian vizaĝon, kun la blanka strio laŭ la nazego, ĉe la fenestreto en la malantaŭa muro de la ĉaro.

„Boksulo!“, per terura voĉo kriis Trifolia. „Boksulo! Liberigu vin! Liberigu vin tuj! Ili portas vin al via morto!“

Eklekadis ĉiuj bestoj: „Liberigu vin, Boksulo, liberigu vin!” Sed la ĉaro iom post iom atingis rapidecon kaj malproksimiĝis de ili. Estis necerte ĉu Boksulo tion komprenis kion Trifolia diris. Sed post momento lia vizaĝo malaperis el la fenestreto kaj ekaŭdiĝis tondra batado de hufoj interne de la ĉaro. Iam estis tempo, kiam kelke da tretoj de la hufoj de Boksulo estus farintaj el la ĉaro alumeto-stangetojn. Sed ve! — lia forto estis lin forlasinta; kaj post kelke da minutoj la tamburado de la hufoj maltaŭtiĝis kaj senaŭdiĝis. En malespero la bestoj komencis apelacii al la du ĉevaloj tirantaj la ĉaron, ke ili haltu. „Ne portu vian propran fraton al lia morto!” Sed la stultaj bruoj, tro sensciaj por kompreni kio okazas, nure kuŝigis la orelojn kaj plirapidigis sian kuron. La vizaĝo de Boksulo ne reaperis en la fenestreto. Tro malfrue venis al iu la ideo, antaŭkuri kaj fermi la pordegon; post plua momento la ĉaro ĝin trarulis kaj rapide malaperis laŭ la vojo. Boksulo vidiĝis la plej lastan fojon.

Post tri tagoj anonciĝis, ke li mortis en la malsanulejo en Vilindono, malgraŭ ĉia flegado, kian ĉevalo povas ricevi. Venis Kvikulo por sciigi la informon al la aliaj. Li asertis, ke li ĉeestis dum la finaj horoj de Boksulo.

„Tio estis la plej kortuŝa vido de mia vivo!”, diris Kvikulo, per sia antaŭpiedo forviŝante larmon. „Mi estis je la plej lasta momento ĉe lia lito. Kaj je la fino, preskaŭ tro malforta por paroli, li flustris al mi, ke lia sola bedaŭro estas, ke li forpasas antaŭ la kompletigo de la ventmuelilo. „Antaŭen, gekamaradoj!” — li flustris. „Antaŭen en la nomo de la revolucio. Vivu Besto-Farmo! Vivu Kamarado Napoleono! Napoleono ĉiam pravas.” Tio, gekamaradoj, estis liaj plej lastaj vortoj.”

Je tio la mieno de Kvikulo subite ŝanĝiĝis. Dum momento li silentis, kaj liaj malgrandaj okuloj ĵetadis

suspekto-plenajn rigardetojn de flanko al flanko, antaŭ ol li daŭrigis.

Li diris, ke li eksciis pri stulta kaj malbona famo cirkuligita je la tempo de la forportado de Boksulo. Kelkaj bestoj rimarkis, ke la ĉaro, en kiu Boksulo estis transportata, havas la surskribon „Ĉeval-Bučisto“, kaj efektive haste konkludis, ke Boksulo estas forsendata al ĉevalmortigisto. Estas nekredeble, diris Kvikulo, ke iu ajn besto povus esti tiel stulta. Certe – li indigne kriis, vipetante per la vosto kaj dancetante de flanko al flanko – certe ili pli bone konas sian amatan estron Kamaradon Napoleonon? Sed la klarigo estis vere simpla: La ĉaro antaŭe apartenis al ĉevalmortigisto, kaj estis aĉetita de la bestkuracisto, kiu ankoraŭ ne estis foriginta la malnovan surskribon. Jen kio estis la fonto de la eraro.

Tion aŭdinte, la bestoj multe trankviliĝis. Kaj kiam Kvikulo per kvazaŭ fotografaj detaloj daŭrigis la priskribon de la morto de Boksulo, la admirinda flegado, kaj la multekostaj medikamentoj kiujn, sen penso pri la kosto, Napoleono pagis, iliaj duboj malaperis, kaj la bedaŭro, kiun ili sentis pro la morto de sia kamarado estis mildigita pro la penso, ke almenaŭ li mortis feliĉa.

Napoleono mem aperis dum la kunveno de la sek-vanta dimanĉo kaj deklamis mallongan oracion je la honoro de Boksulo. Ne eblis, li informis, reportigi la restaĵojn de la kamarado por enterigo sur la farmo, sed li estis ordoninta, fari el la laŭroj kreskintaj en la ĝardeno de la mastrodomo grandan girlandon kaj ĝin meti sur la tombon de Boksulo. Kaj la porkoj intencis post kelke da tagoj aranĝi memoran bankedon je la honoro de Boksulo. Napoleono finigis sian paroladon per memorigo pri la du preferitaj maksimumoj de Boksulo: „Mi pli klopodos“ kaj „Kamarado Napoleono ĉiam pravas“ – maksimumoj, li diris, indaj ke ĉiu besto ilin prop-rigu al si.

Je la tago rezervita por la bankedo, liverĉaro de nutraĵ-magazeno venis el Vilindono kaj liveris en la mastrodomon grandan keston. Tiun vesperon aŭdiĝis el la mastrodomo laŭta kantado, sekvita de bruo, kiu sonis kvazaŭ granda kverelo, kiu finiĝis ĉirkaŭ la dudektria horo per terura krakado de vitro. En la mastrodomo moviĝis neniu antaŭ ol tagmezo de la posta tago, kaj fra la tuta farmo eksciĝis, ke la porkoj de ie havigis al si sufiĉe da mono por aĉeti novan keston da viskio.

PASIS jaroj. Venis kaj iris sezonoj, fuĝis la kurtaj bestaj vivoj. Venis tempo, kiam pri la malnova epoko antaŭ la revolucio memoris neniu escepte Trifolia, Benjamen, la korvo Moseo kaj kelke da porkoj.

Muriela estis mortinta; Viola, Jesinjo kaj Grifo forpasis. Ankaŭ mortinta estis Jonaido – en ebria sanatorio en alia parto de la lando li mortis. Neĝobulo estis forgesita, escepte de tiuj malmultaj, kiuj lin persone konis. Trifolia estis nun maljuna korpulenta ĉevalino kun mallelastaj artikoj kaj kun emo al reumatismo. Ŝi estis du jarojn pli aĝa ol la pensiiga aĝo, sed neniu besto efektive pensiigis. Jam delonge estis ĉesinta la diskutado pri angulo de la paŝtejo, rezervota por superaĝaj bestoj. Napoleono jam estis matura virporko kun cent kvindek kilogramoj da pezo. Kvikulo estis tiel grasa, ke li nur malfacile vidis el siaj okuloj. Nur Benjamen estis pli-malpli la sama, escepte ke li estis iom pli griza ĉirkaŭ la muzelo, kaj, post la morto de Boksulo, pli malfabla kaj silentema ol iam.

La farmo nun havis multe pli da bestoj, kvankam ne tiom, je kiom oni en pli fruaj jaroj kalkulis. Naskiĝis multaj bestoj, por kiuj la revolucio estis nur malklara tradicio, buŝe transdonita, kaj aliaj estis aĉetitaj, kiuj antaŭ sia alveno neniam aŭdis pri tia afero. La farmo posedis krom Trifolia ankoraŭ tri ĉevalojn. Ili estis bonegaj, decaj bestoj, diligentaj laborantoj kaj bonaj kamaradoj, sed tre stultaj. Neniu el ili montriĝis kapabla lerni pli ol „B” de la alfabeto. Ili akceptis ĉion, kion oni diris al ili pri la revolucio kaj la principoj de bestarismo, precipe kion diris Trifolia, por kiu ili havis preskaŭ filecan respekton; sed estas dube ĉu ili multon de tio komprenis.

La farmo estis pli prospera kaj pli bone organizita: ĝi eĉ pligrandiĝis je du kampoj aĉetitaj de sinjoro Pil-

kintono. La ventmuelilo estis finfine kompletigita, kaj la farmo posedis proprajn draŝmaŝinojn kaj fojnlifton, kaj estis konstruitaj diversaj novaj domoj. Vimpero estis aĉetinta al si hundoĉareton. La ventmuelilo tamen ne estis uzata por generado de elektra povo. Ĝi estis uzata por muelado de greno, kaj enspezigis belan monan profiton. La bestoj diligente konstruis pluan ventmuelilon; kiam tiu estos finita, oni diras, estos instalataj la dinamoj. Sed la luksaĵoj, kiujn Neĝobulo instruis ilin prirevi, la staloj kun elektra lumigado kaj varmega kaj malvarma akvo, kaj la tri-taga semajno ne plu estis priparolataj. Napoleono tiajn ideojn proklamis kontraŭaj al la spirito de bestarismo. La plej vera feliĉo, li asertis, estas en diligenta laborado kaj ŝparema vivo.

Iel ŝajnis, ke la farmo pliriĉiĝis sen pliriĉigi la bestojn mem – escepte, kompreneble, la porkojn kaj la hundojn. Eble la kaŭzo de tio estis la fakto, ke estis tiom multe da porkoj kaj hundoj. Ne estis tiel, ke tiuj bestoj ne siamaniere laboris. Estis, kiel Kvikulo senlace klarigadis, senfina laboro en la superrigardo kaj organizado de la farmo. Multa tia laboro estis super la kompren-kapablo de la aliaj bestoj. Kvikulo informis ilin, ke la porkoj ĉiutage devas laboregi super misteraj aferoj nomitaj „kartotekoj“, „raportoj“, „protokoloj“ kaj „memorandoj“. Tio estis grandaj folioj de papero, dense kovrendaj per skriboj, kaj, kovritaj, forbrulendaj en la fornego. Tio estis, laŭ Kvikulo, ekstreme grava por la bono de la farmo. Sed tamen, nek porkoj nek hundoj produktis propralabore iun ajn nutraĵon; kaj ili estis multaj kaj ĉiam havis bonan apetiton.

Koncerne la aliajn, ilia vivo estis, laŭ ilia scio, la sama kiel ĉiam. Ili normale malsatis, ili dormis sur pajo, ili trinkis el la lageto, ili laboris en la kampoj; vintre ilin ĝenis frido kaj somere muŝoj. De tempo al tempo la pli maljunaj inter ili streĉegis sian nebuleman memo-

ron kaj penis konstati, ĉu en la fruaj tagoj de la revolucio, kiam la elpelo de Jonaido ankoraŭ estis ĵusa, la cirkonstancoj estis pli aŭ malpli bonaj ol nun. Ili ne kapablis rememori. Estis nenio, kun kiu ili povus kompari sian nunan vivon: ilia sola komparebleco estis la listoj de Kvikulo, kiuj senescepte pruvadis, ke ĉio pli kaj pli boniĝadas. La bestoj konstatis la problemon nesolvebla; ĉiukaze ili havis malmultē da tempo por tia konjektado. Nur la maljuna Benjamenio asertis, ke li ĉiun detalon rememoras de sia longa vivo kaj ke li scias, ke la cirkonstancoj neniam estis nek povas esti multe pli bonaj nek multe pli malbonaj – malsato, malfacileco kaj seniluziigado estas, laŭ li, la neŝanĝebla leĝo de la vivo.

Kaj tamen, la bestoj neniam ĉesis esperi. Krome, ili neniam perdis, eĉ unu momenton, sian senton de honoro kaj privilegio esti aĵoj de Besto-Farmo. Ili ankoraŭ estis la sola farmo en la tuta graflando – ja en tuta Anglujo – posedata kaj administrata de bestoj. Neniu el ili, eĉ ne la plej junaj, nek eĉ la novuloj venigitaj de farmoj dudek aŭ kvardek kilometrojn distancaj, iam ajn ĉesis primiri tiun fakton. Kaj kiam ili aŭdis la tondradon de la pafilo kaj vidis la verdan flagon flirtanta ĉe la masto-pinto, ilia koro ekŝvelis pro nemortigebla fiero, kaj oni ĉiam ekbabilis pri la malnovaj heroaj tempoj, pri la forpelo de Jonaido, la skribado de la Sep Ordonoj, la grandaj bataloj, en kiuj la homaj invadintoj estis venkitaj. Al la Respubliko de la Bestoj, profetita de Majoro, kiam la verdaĵ kampoj de Anglujo estos ne plu surpaŝataj de homaj piedoj, oni ankoraŭ kredis. Iam ĝi estas venonta, eble ne baldaŭ, eble ne dum la vivotempo de iu ajn besto nun vivanta, sed tamen – venonta. Eble eĉ la melodio de „Bestoj Anglaj” estis ie sekrete zumata: ĉiukaze estis fakto, ke ĉiu besto de la farmo ĝin sciis, kvankam neniu aŭdacis ĝin laŭkanti. Agnoskende, ilia vivo estis malfacila kaj ne ĉiuj iliaj esperoj realiĝis; sed ili konsciis, ke ili ne estas kiel

aliaj bestoj. Se ili malsatas, do ne pro nutrado de tiranaj homoj; se ili multege laboras, do almenaŭ por si mem. Neniu kreito el ili iradis dupiede. Neniu kreito el ili nomis alian kreiton, „Mastro“. Ĉiuj bestoj estas egalaj.

Iam en la komenco de somero Kvikulo ordonis al la ŝafoj, ke ili lin sekvu, kaj ilin kondukis al peco da neuzata grundo je la alia fino de la farmo, superkreskita de novaj betuletoj. La ŝafoj tie pasigis la tutan tagon, sub la observado de Kvikulo, paŝtigante ĉe la folioj. Vespere li mem reiris al la mastrodomo, sed, ĉar estis malvarma vetero, li ordonis al la ŝafoj tie resti. Ili finfine dum tuta semajno tie restis, dum kiu tempo la aliaj bestoj ilin tute ne vidis. Kvikulo kun ili pasigadis la pliparton de ĉiu tago. Li klarigis, ke li instruas al ili novan kanton, por kio privateco estas necesa.

Guste post la reveno de la ŝafoj, dum unu agrabla vespero, kiam la bestoj ĵus estis ĉesintaj la laboradon kaj estis survoje reen al la farma domaro, ekaŭdiĝis en la korto terura ĉeval-henado. Timigite la bestoj haltis. Estis la voĉo de Trifolia. Denove ŝi henis, kaj ĉiuj bestoj ekgalopis kaj rapidis al la korto. Tiam ili tion vidis, kion vidis Trifolia.

Estis porko, iranta dupiede!

Jes, tio estis Kvikulo. Iom mallerte, kvazaŭ li ne kutimiĝis tiamaniere teni sian konsiderindan pezon, sed kun perfekta balanco, li promenis tra la korto. Kaj post momento eliris el la pordo de la mastrodomo longa vico de porkoj, ĉiuj irantaj dupiede. Kelkaj pli lerte iris ol aliaj, unu-du aspektis kvazaŭ ili ŝatus havi la apogon de bastono, sed ĉiuj sukcese promenis en la korto. Kaj finfine estis tremiga bojado de hundoj kaj altpiĉa klukado de la nigra virkoketo, kaj jen elvenis Napoleono mem, majeste rekta, ĵetante de flanko al flanko malhumilajn rigardojn, kaj la hundoj ĉirkaŭ li kuretantaj.

Per la antaŭpiedo li portis vipon.

Estis tombeska silento. Ŝokite, terurite, kunpremiĝinte, la bestoj observis kiel la longa vico de porkoj marŝas laŭ la korta periferio. Estis kvazaŭ la mondo estus renversita. Tiam venis momento, kiam la komenca ŝoko perdis la efikon kaj kiam spite al ĉio – spite al ilia timo antaŭ la hundoj kaj al la kutimo dumjara de neplendado, nekritikado, kio ajn okazis – ili eble estus protestintaj. Sed ĝuste je tiu momento, kvazaŭ je signalo, ĉiuj ŝafoj laŭtege ekblekis:

„Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – **plibonulo!** Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – **plibonulo!** Kvarpiedulo, jen bonulo; dupiedulo – **plibonulo!**...”

Tio dum kvin minutoj senĉese daŭriĝis. Kaj ĝis la ŝafoj silentiĝis la ŝanco protesti estis jam pasinta, ĉar la porkoj jam remarŝis en la domon.

Benjamenino sentis kiel frotetas lian ŝultron ies muzelo. Li rigardis. Estis Trifolia. Ŝiaj maljunaj okuloj aspektis malpli klaraj ol iam. Nenion dirante, ŝi tiris liajn kolharojn kaj kondukis lin al la ekstrema muro de la granda fojnejo, kie estis surskribitaj la Sep Ordonoj. Dum unu-du minutoj ili rigardis la gudritan muron kaj ĝiajn blankajn literojn.

„Miaj okuloj malfortiĝas”, ŝi fine diris. „Eĉ kiam mi estis juna, mi ne povis legi la tie skribitan. Sed ŝajnas al mi nun, ke tiu muro malsame aspektas. Ĉu la Sep Ordonoj estas la samaj kiel ĉiam, Benjamenino?”

Por la unua fojo Benjamenino konsentis rompi sian regulon, kaj li laŭtlegis al ŝi tion kio estis skribita sur la muro. Estis tie nenio plu krom unu Ordono. Ĝi tekstis:

ĈIUJ BESTOJ ESTAS EGALAJ
SED KELKAJ BESTOJ ESTAS
PLI EGALAJ OL LA ALIAJ

Post tio ne estis strange, kiam la sekvantan tagon la porkoj, supervidantaj la farmlaboron, ĉiuj portis vi-

pon. Ne estis strange ekscii, ke la porkoj aĉetis al si radioricevilon, aranĝis instali telefonon kaj abonis **John Bull**, **Tit-Bits** kaj **Daily Mirror**. Ne estis strange, kiam oni observis, ke Napoleono promenis en la ĝardeno kun pipo en la buŝo – ne, eĉ ne kiam la porkoj prenis el la garderoboj la vestaĵojn de sinjoro Jonaido kaj surmetis ilin: Napoleono mem aperis en nigra ĵako, griza pantalone kaj blankaj gamaŝoj, dum lia preferata porkino portis la silkan robon kiun sinjorino Jonaido iam portadis dimanĉe.

Post unu semajno alveturis ĉaro da hundoĉaretoj al la farmo. Reprezentantaro de najbaraj farmoj estis invititaj por inspekta trarigardo. Ili estis gvidataj tra la tuta farmo kaj esprimis grandan admiron pri ĉio, kion ili vidis, precipe pri la ventmuelilo. La bestoj estis forigantaj la herbaĉon el la rapokampo. Ili diligente laboris, apeŝaŭ levante la vizaĝon de la tero, ne sciante kiun pli timi, la porkojn aŭ la homajn vizitantojn.

Vespere aŭdiĝis el la mastrodomo laŭta ridado kaj kantado. Kaj subite, je la sono de la intermiksitaĵoj, la bestoj estis kaptitaj de scivolemo. Kio povas nun esti okazanta en la domo, dum tiu unua renkontiĝo inter bestoj kaj homoj sur egaleca nivelo? Unuanime oni decidis mallaŭte eniri la ĝardenon de la mastrodomo. Ĉe la pordego ili hezitis, duone timante eniri, sed Tri-eso de la pli eminentaj porkoj; Napoleono mem okupis folia kondukis. Ili iris sur piedpintoj al la domo, kaj la bestoj sufiĉe grandaj rigardis tra la manĝeja fenestro. Tie sidis, ĉirkaŭ la longa tablo, seso da farmistoj kaj la honoran sidlokon ĉe la frunto de la tablo. La porkoj aspektis tute komfortaj en siaj seĝoj. La festantaro estis ĝuanta kartludon, sed evidente oni ĝin interrompis, por tosti. Estis ĉirkaŭportata granda kruĉo, kaj la kruĉoj estis replenigataj per biero. Neniu rimarkis la mirantajn vizaĝojn de la bestoj rigardantaj tra la fenestro.

Sinjoro Pilkintono el Vulpoboska Farmo estis ekstarinta kun la kruĉo en la mano. Post unu momento, li diris, li petos la ĉeestantaron trinki toston. Sed antaŭe estis kelke da vortoj, kiujn li sentis sin devigata diri.

Estis al li ege kontentige, li diris – kaj, li estis certa, al ĉiuj aliaj ĉeestantoj – konstati ke la longa tempo de malfidemo kaj miskompreno estas nun pasinta. Iam estis tempo – ne ke li aŭ iu ajn el la ĉeestantaro havis tiajn sentojn – sed iam estis tempo, kiam la estimataj posedantoj de Besto-Farmo estis rigardataj, li ne volis diri kun malamikeco, sed eble kun certa mezuro da malfidemo, flanke de siaj najbaroj. Estis okazintaj certaj malfeliĉaj eventoj, estis disvastigitaj eraraj ideoj. Oni sentis, ke la ekzisto de farmo, posedata kaj administrata de bestoj, estas iel nenormala kaj povus havi malkvietigan influon sur la najbarecon. Tro da farmistoj resumis, sen inda esplorado, ke sur tia farmo regus spirito de permesemo kaj sendisciplineco. Ili estis maltrankvilaj pri la efiko sur la proprajn bestojn, aŭ eĉ sur la homajn dungitojn. Sed nun estis ĉiuj tiaj duboj for. Hodiaŭ li kaj liaj amikoj estis vizitintaj Besto-Farmon kaj per la propraj okuloj inspektis ĉiun centimetron de ĝi, kaj kion ili trovis? Ne nur la plej modernajn metodojn, sed disciplinon kaj ordon, kiuj devus esti modelo por ĉitieaj farmistoj. Li opiniis, ke li pravus dirante, ke la subaj bestoj de Besto-Farmo faras pli da laboro kaj ricevas malpli da nutraĵo ol iuj ajn bestoj de la graflando. Ja fakte, li kaj liaj kunvizitantoj estis vidintaj multajn metodojn, kiujn ili intencas tuj enkonduki sur la propraj farmoj.

Li finos siajn rimarkigojn, li diris, ankoraŭfoje emfazante la amikecon kiu ekzistas, kaj devus ekzisti inter Besto-Farmo kaj ĝiaj najbaroj. Inter porkoj kaj homoj ne estis, nek devis esti, iu ajn kolizio de intereso. Iliaj luktoj kaj problemoj estis komunaj. Ĉu la problemoj de laborfortoj ne estas ĉie la sama? Tie ĉi evidentiĝis ke

li intencas surprizi la ĉeestantaron per iu zorge preparita spritaĵo, sed dum momento li mem estis tro amuzita, por ke li povu ĝin diri. Post multe da strangolado, dum kiu purpuriĝis liaj diversaj mentonoj, li sukcesis ĝin elparoli: „Se vi havas zorgajn pro viaj subaj bestoj“, li diris, „ni ja havas zorgojn pro niaj subaj klasoj!“ Tiu ĉi **bon mot** puŝis la ĉeestantaron en muĝan ridadon; kaj sinjoro Pilkintono ree gratulis al la porkoj pro la malgrandaj porcioj, la multaj laborhoroj kaj la ĝenerala manko de dorlotado, kiujn li observis ĉe Besto-Farmo.

Kaj nun, li fine diris, li petas la ĉeestantaron ekstari kaj certigi ke iliaj kruĉoj estas plenaj. „Sinjoroj“, konkludis sinjoro Pilkintono, „mi proponas toston: je la prosperado de Besto-Farmo!“

Estis entuziasma huraado kaj stampado. Napoleono estis tiel kortuŝita, ke li forlasis sian lokon kaj ĉirkaŭiris la tablon por tintigi sian kruĉon per tiu de sinjoro Pilkintono, antaŭ ol ĝin malplenigi. Kiam la jubulado kvietigis, Napoleono, kiu restis staranta, indikis ke ankaŭ li havas ion por diri.

Kiel ĉiuj paroladoj de Napoleono, ĝi estis konciza kaj laŭ-tema. Ankaŭ li, li diris, ĝojas pri tio, ke la tempo de miskompreno pasis. Dum longa tempo estis famoj – cirkuligitaj, ti opinias, de iu malica malamiko – ke estas io subverziva kaj eĉ revolucia en la sinteno de li kaj liaj kolegoj. Oni asertis, ke ili provis inciti ribelojn inter la bestoj de la najbaraj farmoj. Nenio povus esti pli malvera! Ilia sola deziro, nun kaj tiam, estis vivi en paco kaj en normalaj komercaj rilatoj kun siaj najbaroj. Tiu ĉi farmo, li aldonis, kiun ti havas la honoron administri, estas kooperativa entrepreno. La legitimiloj de posedo, kiujn li mem havas, estas komuna propraĵo de la porkoj.

Li ne kredas, li diris, ke postrestas iuj ajn el la malnovaj suspektoj, sed certaj ŝanĝoj estis antaŭnelonge faritaj en la farma rutino, kiuj devus havi la efikon pli-

fortigi la trankvilon. Ĝisnune la bestoj havis la stultan kutmon alparoli unuj la aliajn „kamarado“. Tio estas subpremota. Estis ankaŭ alia stranga kutimo de nekonata origino, ĉiun dimanĉan matenon pretermarŝi la kranion de virporko najlitan sur fosto en la ĝardeno. Tio ankaŭ estas subpremota kaj la kranio estis jam enterigita. Liaj vizitantoj eble rimarkis la verdan flagon flirtantan sur la masto. Se jes, ili eble rimarkis ke la blankaj hufo kaj korno, per kiuj ĝi antaŭe estis markita, estas forigitaj. Ekde nun estos nur simpla verda flago. -

Li havis nur unu kritikon, ti diris, pri la bonega kaj najbareca parolado de sinjoro Pilkintono. Sinjoro Pilkintono la tutan tempon parolis pri „Besto-Farmo“. Li ne povis scii – ĉar li, Napoleono, nur nun la unuan fojon tion anoncas – ke la nomo „Besto-Farmo“ estas abolita. Ekde nun la nomo estos Nobeldoma Farmo – kiu, li kredas, estas ĝia korekta kaj origina nomo.

„Sinjoroj“, Napoleono konkludis, „mi proponas al vi la saman toston kiel antaŭe, sed en alia formo. Plenu viajn kruĉojn ĝissupre. Sinjoroj, jen mia tosto: Je la prosperado de Nobeldoma Farmo!“

Sekvis la sama kora jubilado kiel antaŭe, kaj la kruĉoj estis malplenigitaj ĝisfeĉe. Sed dum la bestoj gapis al la sceno, ŝajnis al ili, ke okazis io stranga. Kio tio estis, kio ŝanĝiĝis en la vizaĝo de la porkoj? La maljunaj, malfortaj okuloj de Trifolia saltetadis de unu vizaĝo al alia. Kelkaj havis kvin mentonojn, kelkaj havis kvar, kelkaj havis tri. Sed kio tio estis, kio ŝajnis fandiĝi, ŝanĝiĝi? Poste, kiam finiĝis la aplaŭdado, la ĉeestantaro denove prenis siajn kartojn kaj daŭrigis la interrompitan ludon, kaj la bestoj silente foriris.

Sed apenaŭ ili iris dudek metrojn kiam ili subite haltis. El la mastrodomo venis bruego de voĉoj. Ili rekuris kaj denove trarigardis la fenestron. Jes, oni furio-

ze kverelis. Estis kriĉado, frapado sur la tablon, akraj suspektplenaj rigardoj, furiozaj dementoĵ. La fonto de la miskompreno ŝajnis esti, ke Napoleono kaj sinjoro Pilkintono samtempe malkovris po unu pikan ason.

Dekdu voĉoj kriis ĉagrenite, kaj ĉiuj sonis same. Ne plu estis dubo, kio okazis al la vizaĝoj de la porkoj. La bestoj ekstere rigardis de porko al homo, kaj de homo al porko, kaj denove de porko al homo; sed jam ne plu eblis distingi kiu estas kiu.

Novembro 1943 – februaro 1944.